HUNGARIA VIVO

MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

87/5. 16,- Ft



CHEMO CAOLA

Komuna Entrepreno de Ekstera Komerco
por Kosmetikaĵoj kaj Dommastrumaj Kemiajoj

1113 BUDAPEST Bocskai út 90. Hungario
Telekso: 022-4333 Telefono: 0036-1-666-622

viro kaj virin' en ĉiu aĝo
gesinjoroj, kies agojn direktas saĝo
vian domon faros pura, vian korpon sorĉos bela
vian sanon tenos bona kaj perfekta kaj modela...

CAOLA

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség nyomdájában. Felelős vezető: Varjassy Ágnes, Munkaszám: 87-0042. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben és a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V., József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft, fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft.

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Felső, P.: Jubilea Kongreso en la naskiĝurbo de la lingvo 162
Vaha, B.: Inter esperantistoj, en Zagrebo 168
D-ro Máthé, Á.: D-ro István Szerdahelyi (1924-1987) 170
Révész, S.: Timoj, faktoj kaj esperoj pri Hungario 2. 172
Belartaj Konkursoj '87 174
Usakiewicz, W.: Lingvoĉizistoj kaj splitkaptantoj 175
Štimec, S.: Aŭstralio 177
Dek, L.: Laŭra 178
Piškorec, V.: Viveroj 179
Panoramo 180
Paĝo de komencantoj (*János Sárközi*) 182
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 183
Belonenko, E.: Fabelo pri skarlata floro 184
Gilmore, K.: Tukpinĉiloj 185
Gällmo, G.: Kaj mi mortis... 185
Culbert, R.: Ĉio estas en viaj manoj I. 186
Golden, B.: Identigo de la misteraj Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter 189
Recenzoj 191
Elektronikaj instrumentoj al la industrio *(Ervin Fenyvesi)* 194
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 198
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 199
Korespondi deziras, Leterkesto 200

Sur la frontpaĝo: Inaŭguro de la 72a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (Foto de Z. Fejér)

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
I. Szentháromság tér 1-3.
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXVIIa jaro 1987 n-ro 5
(135)

MESz nyomda 87-0085

LA JUBILEA JARO...

jam proksimiĝos al sia fino, kiam tiu ĉi numero atingos niajn abonantojn ekster Eŭropo, kaj venos la tempo fari la bilancon, kiom ni sukcesis profiti el la jubileo por efike disvastigi la lingvon.

Por faciligi tion, ni aperigas ampleksajn raportojn pri la amasa 72a Universala Kongreso en Varsovio, kaj pri la malpli altkvante partoprenita, sed altkvalita aranĝo en Zagrebo. Tiuj ĉi raportoj stimulu nin ĉiujn almenaŭ konservi la elanon de la agado dum la nuna jaro, kvankam, sincere dirite, tiu elano estis tre diversgrada en la diversaj landoj, kaj ekstreme variis eĉ ene de unu lando. Tio, kompreneble, pruvas nian malfortecon, nome tion, ke la aferoj dependas de la entuziasmo de nur unu-du homoj:

La Jubilea Jaro alportis ankaŭ funebron por la esperantista mondo – forpasis d-ro István *Szerdahelyi*, kiu faris netakseble gravan plenumon sur la kampo de la esperantologio kaj interlingvistiko. La nekrologo pri li estas nepre tiu ero en tiu ĉi numero, pri kiu ni rezignus plej volonte...

Ni daŭrigas la artikolserion de Sándor *Révész* pri la ekonomia-socia krizo en kiun trafis Hungario. Bernard *Golden* siavice kontribuis interesan eseon pri la misteraj Peter *Peneter* kaj lia filo...

Literaturamantojn certe ĝojigos tiu ĉi numero, kaj ankaŭ la sekva, ĉar en tiuj du numeroj ni aperigas *senescepte ĉiujn* premiitajn verkojn de la ĉijaraj Belartaj Konkursoj. Laŭ nia scio ĝis nun neniam estis eblo por la vasta publiko vidi kune la tutan rikolton – la plimulto de la premiitaj pecoj aperis dissemite en diversaj revuoj, se ili entute aperis. Nun oni havos okazon pesi la rikolton, kaj por la kazo, se iu trovos, ke li/ŝi kapablus elplumigi ion superan al la ĉijare premiitaj verkoj, ni aperigas ankaŭ informojn pri la kondiĉoj de la Konkursoj.

Kompreneble tiuj verkoj postulas sufiĉe multan spacon, kaj ni pardonpetas tiujn niajn legantojn, kiujn ne aparte allogas literaturo – ni promesas, ke en la postaj numeroj literaturo okupos ne pli da amplekso, ol kutime ĝis nun.



JUBILEA KONGRESO EN LA NASKIĜURBO DE LA LINGVO

Ofte ni tro facilanime uzas la epiteton „historia". Ni estu pli singardaj epitetante la 72-an Universalan Kongreson, ja por la objektiva prijuĝo de la ĉi-jara UK estas bezonata paso de iom da tempo. Sed jam nun estas konstateble, ke ĉi tiu kongreso ne estis nur unu el la cetere tre impona serio komenciĝinta en 1905. Sendube, ankaŭ ĉi-jare ne mankis la foireca karaktero de la plej grava esperantista aranĝo. Ĉi tiun karakteron oni ofte kritikas, ne tute senbaze. Aliflanke, oni devas konsideri la fakton, ke la provetoj por reformi la kongresojn malsukcesis pro la bezonoj de la movadon finance vivtenanta „popolo" aŭ pro la tradiciemo de la lokaj kongresaj komitatoj. Ŝajnas, ke ankaŭ estonte la kongresoj organiziĝos pli-malpli laŭ la tradiciaj manieroj, kaj ni agos plej saĝe, se ni klopodos eluzi la eblecojn – ĝis nun ne ĉiam ekspluatatajn – de la nuna sistemo. Ekzemple, la bunteco en si mem ne devas esti nur malavantaĝo, ja dank' al tio la diversaj homoj povas elekti inter la diverstipaj kaj diversnivelaj aranĝoj.

Rekorda partoprenantaro

La UK en Varsovio altiris rekordnombran partoprenantaron: la 5941 aliĝintoj reprezentis 61 landojn. Laŭ la taksoj, krom la aliĝintoj ĉeestis pliaj 2-3000 esperantistoj. Du semajnojn antaŭ la komenciĝo de la kongreso venis la averto de la LKK, ke la solenan inaŭguron oni devos aranĝi en du partoj, ĉar en la plej granda salono de la kongresejo, la Palaco de la Kulturo kaj Scienco, samtempe povas sidi maksimume 3000 personoj. La unuan inaŭguron rajtis ĉeesti posedantoj de la kongresnumeroj inter 1 kaj 1500 kaj inter 3001 kaj 4500. Por la aliaj estis dediĉita la dua, posttagmeza inaŭguro. Multaj opiniis, ke la du inaŭguroj ne estos samrangaj, ĉar la unua estos la „vera". Aŭdinte la akrajn plendojn mi pensis, ke multaj malkontentaj „duainaŭguranoj" klopodos ensôviĝi jam antaŭtagmeze. Mi sincere timis, ke la dua jarcento de Esperanto komenciĝos per tumultaj eventoj, kun multaj vunditoj. La kongresanoj kondutis tamen mirinde disciplinite: ne estis tumultoj antaŭ la unua inaŭguro kaj ankaŭ dum la dua solena aranĝaĵo la salonego estis plenplena. Laŭ mia prijuĝo la dua inaŭguro estis eĉ pli impona ol la unua, precipe pro tio, ĉar la teknikaj malglataĵoj spertitaj dum la unua, ne ripetiĝis. D-ro Humphrey *Tonkin,* la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio faris du diversajn paroladojn por la publikoj de la du inaŭguroj, kaj la dua prezidanta parolado estis eĉ pli enhavoriĉa ol la unua. En ambaŭ inaŭguroj ĉeestis diplomatoj, dufoje parolis al la kongresanaro s-ro Nigel *Casar,* la persona reprezentanto de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kaj la alta protektanto de la kongreso, s-ro Roman *Malinowski,* marŝalo de la Sejmo, la pola parlamento.

La Solena Inaŭguro. La dua de dekstre József Bölcskei, intertempa aferŝarĝito de la Hungara Ambasado en Varsovio, la tria Oszkár Princz, sekretario de HEA

Ofte okazis, ke la alta protektanto ĉeestis la inaŭguron kaj en iu posta tago li akceptis la reprezentantojn de la kongreso. S-ro *Malinowski* ne nur faris tion, sed li preskaŭ ĉiutage partoprenis iun kongresan programon kaj kelkfoje li eĉ embarasis la organizantojn per neatendita alveno. S-ro *Malinowski* starigis interesan proponon al UEA: li iniciatis, ke en Bjalistoko, naskiĝurbo de d-ro Zamenhof estu fondita Internacia Centro de Esperanto-Kulturo. Ĝi servu samtempe kiel monumento al Zamenhof kaj renkontejo de la Esperanto-movado. La Centro estu loko por ĉiuspecaj kunvenoj, seminarioj, konferencoj kaj kursoj pri Esperanto. Ĝi funkciu ankaŭ kiel studcentro pri esperantologio kaj rilataj temoj, kaj kiel muzeo pri la frua periodo de Esperanto. Nuntempe ekzistas en Bjalistoko universitata branĉo, kiu baldaŭ fariĝos memstara universitato. La Centro povos esti ligita al tiu universitato. Kvar hektaroj estas jam rezervitaj en la mezo de la urbo por konstruo de la Centro, kiun ĉefe financos lokaj instancoj kaj entreprenoj. Tamen estas proponate, ke la esperantistoj helpu per modesta sumo por formi fondan kapitalon. UEA pozitive traktas la proponon, kvankam la Asocio ne povas preni

sur sin la financan respondecon pri la konstruado kaj la posta funkciigado de la Centro.

Al la jubilea kongreso estis invititaj ankaŭ la anoj de la familio Zamenhof, kiuj vivas dise en la sistemoj povas multon fari por kulturi en la mensoj, sed nek la abstraktaj lecionoj nek la amaskomunikiloj povas anstataŭi la senperajn kontaktojn, la senperan komunikadon inter la popoloj. La senpera kontaktado

La aŭtomobilo de HEA transportis centojn da libroj al la kongresa libroservo, kaj nun ĝi ripozas antaŭ la Kongresejo

mondo. Ĉeestis la nepo de la iniciatinto de nia lingvo, d-ro Ludoviko *Zaleski-Zamenhof*. Li vivas en Francio kaj estas internacie rekonata fakulo pri la projektado de surmaraj konstruaĵoj, kiuj servas la naftoproduktadon. D-ro *Zaleski-Zamenhof* alparolis ankaŭ la kongresanojn. Li akcentis, ke Esperanto ne estas ia familia afero. Por substreki tion li intence malofte partoprenas kongresojn, sed la centjara jubileo estas eksterordinara okazaĵo, pro tio li akceptis la inviton.

La Deklaro de Bjalistoko

La partoprenantoj de la kongreso ankaŭ ĉi-jare havis la kutiman ekskursan tagon. Nun la ekskursa tago estis destinita al pilgrimado, por la vizito al la naskiĝurbo de Zamenhof. En Bjalistoko la ĉeestantoj akceptis gravan deklaron direktitan al ŝtatestroj kaj registaroj de la mondo. La Deklaro de Bjalistoko konstatas, ke unu el la plej grandaj kaŭzoj de la malamikeco inter la diversaj landoj de la mondo estas la manko de scioj, ĉar ĉi tiu manko nutras la antaŭjuĝojn kaj miskomprenojn. Kvankam la edukaj postulas komunan lingvon. La lernado de aliaj naciaj lingvoj povas esti utila, sed Esperanto konsistigas aparte facilan kaj efikan vojon por atingi internacian interkompreniĝon je tutmonda skalo, kaj ĝi estas la plej bona enkondukilo al lingvolernado. La Deklaro uzante ankaŭ aliajn argumentojn rekomendas al ŝtatestroj, registaraj kaj kompetentaj aŭtoritatoj, instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo.

La kongresa ĉeftemo titoliĝis: „Esperanto – cent jaroj de internacia kulturo". La partoprenantoj pridiskutis la temon dum la dua ĝenerala kunsido de UEA, sub la gvido de d-ro Vilmos *Benczik*. La kvar enkondukaj referaĵoj kaj la naŭ alparoloj tuŝis tre variajn aspektojn de la temo. La kunsido konstatis la efektivan rolon de Esperanto sur la kampo de la kulturo, malgraŭ oftaj malaj asertoj el neinformitaj rondoj. Lanĉiĝis interalie la demando pri la nejusta distribuado de la esperanta kulturo, t.e. kulturaj objektoj, libroj ktp.

Unu el la kongresaj rezolucioj, notinte, ke dum sia unua jarcento Esperanto faris gravan kontribuon kiel peranto de kulturaj valoroj inter la popoloj kaj subtenanto de reciproka respekto kaj interkompreniĝo inter la diversaj kulturoj de la mondo, konstatas, ke Esperanto evoluigis sian propran kulturon. La rezolucio atentigas pri la neceso pli intense konigi la Esperanto-kulturon inter ne-parolantoj de Esperanto. La dokumento alvokas al pli aktiva strebado por la normigo kaj la larĝigo de la faka terminaro, tiel ke ĝi plej efike kontentigu la bezonojn de la internacia scienco kaj tekniko. La rezolucio rekomendas al ĉiuj edukaj kaj sciencaj institucioj, kulturaj instancoj, bibliotekoj, informcentroj kaj universitatoj, ke ili dediĉu seriozan atenton al Esperanto kaj al la rolo kiun ĝi ludis, ludas kaj ankoraŭ ludos en la monda kulturo.

Dum la 72a Universala Kongreso oni akceptis ankaŭ „Internan rezolucion". Ĉi tiu dokumento emfazas interalie la neceson pliprofesiigi la laboron por Esperanto sur ĉiuj terenoj, alprenante aktualajn metodojn, utiligante modernajn teknikilojn kaj pli efike mastrumante la disponeblajn homajn kaj financajn rimedojn. La Varsovia rezolucio forte rekomendas, ke en sia ekstera agado la Esperanto-organizaĵoj emfazu la Unesko-rezolucion de 1985 kaj instigu la registarajn kaj neregistarajn organizaĵojn, al kiuj ĝi estas direktata, plenumi ĝiajn rekomendojn. Nature, ĉiu rezolucio valoras tiom, kiom oni efektivigas el ĝi.

Ĉu UK en Kubo?

Por la komitatanoj de Universala Esperanto-Asocio la kongreso estis dektaga, ja la komitatkunsidoj komenciĝis antaŭ la kongresa semajno. La debatojn de la plej supera organo de UEA karakterizis vigleco. Mankis flataj vortoj, ofte esprimiĝis granda diferenco inter la opinioj. Malgraŭ tio oni evitis la personajn kverelojn, kaj tiel la komitatanoj povis dediĉi siajn fortojn al la vera laboro. La Komitato alprenis plurajn gravajn decidojn. El inter tiuj mi menciu la

fondon de nova institucio de UEA, kiu nomiĝas Terminologia Esperanto-Centro. Ĝi okupiĝos ĉefe pri la plibonigo kaj unuecigo de la fakaj terminoj. La ĉefa financa bazo de TEC estas la Fondaĵo Wüster. La Komitato devis kompletigi la Estraron de UEA, ĉar pro malsaniĝo la ĝisnuna estrarano pri financoj, d-ro Victor *Sadler* printempe demisiis. La nova estrarano pri financoj fariĝis s-ro Gian-Carlo *Fighiera.* Pri la kongresurboj decidas la Estraro, sed ankaŭ la komitatanoj diskutis pri la estontaj kongreslokoj. Por la sekvaj du jaroj jam ekzistas definitivaj decidoj: venontjare ni kongresos en Roterdamo, poste, en 1989 en Brajtono. Laŭ la Aŭgsburga decido de la Komitato ĝis la fino de ĉi tiu jardeko oni devus okazigi Universalan Kongreson en Afriko. Kvankam tre bele reprezentiĝis Afriko dum la jubilea UK, tamen montriĝas, ke la kondiĉoj ankoraŭ ne estas maturaj por la kongreso en tiu kontinento. Ĝis nun la plej forta kandidato estis Abiĝano, la ĉefurbo de Ebura Bordo, sed formala invito ankoraŭ ne venis el tiu lando. Laŭ la Varsovia decido de la Komitato la Estraro devas rapide trovi solvon pri la loko de UK en 1990 kaj la Komitato rekomendis aparte studi la inviton de Kubo. Tielmaniere nun Havano ŝajnas esti la plej favorata kandidato por 1990. La Estraro plu ekzamenas la eblecon kongresi en Afriko. Tiu UK supozeble okazos en iu posta jaro. Oni parolas ankaŭ pri okazigo de iu konferenco en Abiĝano, eventuale jam en ĉi tiu jardeko. Cetere, ne mankas la invitoj por la Universalaj Kongresoj. Post 1989 oni ŝatus aranĝi kongreson krom Havano en Prago, Milano, Valencio kaj Bergen. Por 1992 Valencio ŝajnas esti la plej serioza kandidato.

Antaŭ, dum kaj post la 72a Universala Kongreso plurfoje kunsidis la Estraro de UEA. El inter ĝiaj decidoj mi elstarigu la fondon de Azia Centro. La financa bazo de Azia Centro estos la 200.000 dolara donaco de japana esperantisto, s-ro *Gotoo*. La Centro provizore funkcios en Tokio, sed oni pripensas ĝian translokigon al Pekino. La ĉefa celo de la Azia Centro estos la stabiligo de la ĝisnunaj belaj rezultoj en Azio, precipe en Ĉinio.

Laŭ la tradicioj ankaŭ dum tiu ĉi UK kunvenis la membroj de diversaj fakaj organizaĵoj esperantistaj. En Varsovio 37 tiaj organizaĵoj havis kunsidojn. Ĉi-kongrese fondiĝis nova faka asocio, la Internacia Kooperativa Esperantista Organizo. Ĝian kunvenon salutis la Internacia Kooperativa Asocio, kiu estas unu el inter la plej grandaj neregistaraj organizoj, reprezentanta duonmiliardon da kooperativanoj. La nova esperantista faka asocio esprimis sian deziron por kunlaboro kun UEA.

Ankaŭ en Varsovio oni okazigis la „Tagon de la lernejo". Ĝia temo estis „Humuro, ludo kaj dramo en la instruado". La publiko plenigis la tutan salonon. La praktika prezentado de s-roj Georges *Sossios* kaj Stefan *MacGill* postulis la aktivan partoprenon de la ĉeestantoj.

La aranĝojn de la Pacotago gvidis s-ro Yoshimi *Umeda*, vicprezidanto de UEA. En la debatoj de la „Libera tribuno" partoprenis 20 alparolantoj antaŭ la 600 membra publiko. En la kadro de la Pacotago estis transdonita la nova premio de UEA, *Premio Onisaburo Deguĉi*. Ĝin iniciatis la Esperanta Propaganda Asocio de Oomoto. La unua laŭreato estas nederlandano, s-ro Hans *Bakker,* pro liaj meritoj rilate la disvastigon de Esperanto en la Tria Mondo. La kunlabora reto de s-ro *Bakker* traktis pli ol 5000 informpetojn el diversaj afrikaj landoj. Momente 350 afrikanoj lernas la Internacian Lingvon per la korespondaj kursoj sub la gvido de s-ro *Bakker.* Aliaj 200 lernas la lingvon en lokaj kursoj. La unuaj atingoj estis facile konstateblaj, ja en la Varsovia kongreso prezentiĝis esperantistoj el deko da afrikaj landoj. Hans *Bakker* en sia responda parolado substrekis, ke varbado al Esperanto kaj instruado de la lingvo ne estas tiel grava, kiel la utiligado de Esperanto. Precipe por afrikaj esperantistoj ĝis nun estas malfacile utiligi Esperanton. Tial Hans *Bakker* alvokis lokajn grupojn kaj landajn asocioj ĝemeliĝi kun lokaj movadoj en Afriko, por tiel subteni praktike kaj morale la agadon tie.

D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, intervjuata de Pál Felső

„En Eŭropo ie" – furoris

Al la programo de la Pacotago apartenis la premiero de Esperanto-dublaĵo de la fama hungara filmo, titolita „En Eŭropo ie". La Esperanto-varianto de la filmo estis farita honore al la centjara jubileo de la lingvo, dank' al la kunlaboro inter Hungara Esperanto-Asocio kaj la Hungara Filminstanco. La projekciadoj dum la kongreso okazis en plenegaj salonoj, akompanate de varma aplaŭdo de la publiko. Ankaŭ la ĉeestanta dublaĵreĝisoro, s-ro

István *Vajda* provis rikolti la meritajn gratulojn. Estis bonega ideo esperantigi la klasikan verkon de la hungara filmoarto, kaj ĝi certe varbos plurajn novajn amikojn por la hungara kulturo. Se la vidbendaj kopioj de la filmo kontentige vendiĝos, oni ankaŭ estonte pretigos en Budapeŝto Esperantan varianton de aliaj filmoj. Aliflanke, la tro ambiciajn planojn devas limigi la fakto, ke tie, kie la relativaj amasoj de Esperanto troviĝas, malmultas la videoaparatoj kaj ankaŭ la pagipova merkato estas sufiĉe malgranda por Esperanto-dublaĵoj de filmoj. (Donu la Senkorpa Mistero, ke la aŭtoro eraru... La Red.)

En la kulturo programo de la kongreso estis projekciitaj ankaŭ aliaj filmoj. El inter tiuj elstariĝas la verko de konata pola televidisto, s-ro Roman *Dobrzynski*: „Esperanto". La kvindekminuta filmo konsistas el registraĵoj faritaj en 14 landoj kaj ĝi pruvas la veran funkciadon de la lingvo sur kelkaj kontinentoj. Sen troigo oni rajtas paroli pri la giganteco de la ĉi-jara kongresa arta programo. En ĝiaj kadroj okazis 28 teatraj prezentadoj kun 680 plenumantoj el ses landoj. Inter la dek muzikaj koncertoj troviĝis recitalo de Chopin-verkoj, elstara prezentado de s-ino Teresita *Inez Alaniz* el Argentino. La gejunuloj ŝatis la koncertojn de la ensembloj „Amplifiki", „Persone" kaj multaj aliaj. En la folklora programo partoprenis ankaŭ hungaroj. Aparte menciindas la kanada kantistino, s-ino Joëlle *Rabu*, kiu pasintjare en Pekino aperis la unuan fojon antaŭ la kongresa publiko. Ŝia programo en Varsovio estis eĉ pli sukcesa. Dum la UK estis viziteblaj pluraj ekspozicioj en la kongresejo: ekzemple pri la polaj Esperanto-eldonaĵoj aŭ pri „Varsovio en la tempo de Zamenhof sur malnovaj fotoj".

Ankaŭ ĉi-kongrese oni anoncis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj. Inter la premiitoj troviĝis tri bohungaroj: la premion Luigi Minnaja de eseistoj gajnis s-ro Oldřich *Knichal*, trian premion ricevis en la drama branĉo s-ro Bernard *Golden* kaj la tria premio de prozistoj iris al s-ro Stefan *MacGill*.

20 prelegoj en IKU

Jubileis ankaŭ la Internacia Kongresa Universitato, kiu ĉi-jare okazis la kvardekan fojon. La 20 prelegantoj – inter ili multaj renomaj profesoroj – venis el 13 landoj: Britio, Hungario, Pollando, GDR, FR Germanio, Svislando, Japanio, Usono, Malto, Korea Respubliko, Nederlando, Norvegio kaj Soveta Unio. La temoj variis: oni pritraktis interalie literaturajn, movadhistoriajn, ekonomiajn, komputilajn, kemiajn, astronomiajn, psikiatriajn kaj medicinajn problemojn. La prelegojn sekvis multaj demandoj kaj kelkfoje vigla diskuto. La rektoro de la 40a Internacia Kongresa Universitato estis Profesoro Juan *Régulo Pérez*.

La programserio de la Esperantologia Konferenco estis sendube unu el la plej interesaj aranĝoj de la kongresa semajno. Ankaŭ ĉi tiu konferenco jubileis, ĉar en Varsovio ĝi okazis jam la dekan fojon. Prelegis d-roj *Lins, Blanke, Wells* kaj *Salvesen*. Ulrich *Lins* (FR Germanio) traktis problemojn rilate la esploradon de la historio de la Esperantomovado. Li substrekis la neceson esplori pli sisteme kaj pli profunde nian historion. John *Wells* (Britio) skizis kelkajn problemojn de la lingva evoluo de Esperanto. Detlev *Blanke* (GDR) traktis la lingvon kaj ĝian komunumon en socipolitika kadro. Li vortumis tre interesan proponon iniciatante la fondon de „Internacia Konsilantaro de Ekspertoj", kiu devus kunordigi ekzistantajn interlingvistikajn kaj esperantologiajn aktivecojn, stimuli novajn aktivecojn kaj ellabori rekomendojn por la plua evoluo de la lingvo kaj de ĝia komunumo, sojle de la dua jarcento. Ĉiujn prelegojn sekvis aro da alparoloj. La resumoj de la referaĵoj aperis en „Informilo por Interlingvistoj". Ĝin redaktas R. *Rokicki*, kiu modele preparis la Konferencon.

Ne mankis en Varsovio la tradiciaj kursoj, seminarioj. Kvankam multaj diras, ke ne estas ĝuste okazigi dumkongrese kursojn por komencantoj, ja por ili taŭgas plie aliaj aranĝoj, tamen la interesiĝo al tiaj kursoj ĉiam estas sufiĉe alta. En Varsovio la Cseh-kurson por komencantoj finis 97 partoprenantoj el 15 landoj. La Internacia Esperanto-Instituto regule organizas Csehseminarion por instruistoj en la kadro de la Universalaj Kongresoj. En Varsovio la seminarion partoprenis 40 personoj el 14 landoj. Ankaŭ la Konversacia Rondo estis populara Dum la tri kunvenoj ĝi altiris 120 interesiĝantojn, kiuj utiligis la eblecon por spertiĝi en la lingvouzo.

Se oni volas epiteti la laboron de la organizantoj, oni denove devas preni la vorton „giganta". La taskoj de la Loka Kongresa Komitato kaj

La foirplaco de la Malnova Urbo estis nepra celo de la enurbaj ekskursoj en Varsovio

La Komitato de UEA ankaŭ ĉijare diligente laboris

ĝia helpantaro estis eksterordinare grandaj. Sendube, dum la Varsoviaj tagoj kelkfoje okazis malglataĵoj kaj plurfoje iuj plendoj estis pravaj. Malgraŭ ĉio ĉi ni rajtas aserti, ke la organizantoj bone laboris. Verŝajne multe helpis al ili la nekutima disciplineco de la kongresanaro, kompare kun la partoprenantoj de la aliaj kongresoj.

144 ĵurnalistoj

Tre gravas, kio okazas inter la muroj de la kongresejo, sed eĉ pli grava estas la reago de la ekstera mondo. Ĉi-rilage ludas la plej signifan rolon la amaskomunikiloj. La interesiĝo de la diversaj amaskomunikiloj ĉi-jare superis la spertojn de la pasintaj Universalaj Kongresoj, dank' al la jubileo. De la Gazetara Servo 144 ĵurnalistoj petis akreditkarton. Inter tiuj troviĝis reprezentantoj de la novaĵagentejoj DPA, AP, Sin-hua. Sendis reprezentantojn la plej prestiĝa japana taggazeto Asahi Ŝinbum kaj multaj internacie konataj eŭropaj ĵurnaloj. El inter la pluraj ĉeestintaj televidaj skipoj aparte menciindas la fama usona NBC, kiu registris raportojn kaj aron da intervjuoj kun la kongresanoj. Nature, en la polaj gazetoj, radio- kaj televidaj programoj aperis multe da raportoj, artikoloj pri la kongreso kaj pri Esperanto ĝenerale. Dum la kongresa semajno oni kunvokis tri gazetarajn konferencojn, ĉiam kun partopreno de kelkdeko da ĵurnalistoj. La unuopaj gazetaraj konferencoj estis dediĉitaj al specialaj temoj. La ĵurnalistoj ĉiam estis tre aktivaj, starigante demandojn al la reprezentantoj de UEA. Bonege impresis la ĵurnalistojn, kiam dum la dua gazetara konferenco kelkpersona grupo de infanoj – partoprenantoj de la Infa-

Hungara folklora grupo antaŭ la Kongresejo

na Kongreseto – respondis al la demandoj de la ĵurnalistoj. La infanoj dum tiu gazetara konferenco kelkfoje embarasis la organizantojn, ĉar ili ne silentis pri la organizaj mankoj de la Kongreseto, sed eĉ tio estis bona propagando por Esperanto. En la gazetoj aperis tre favoraj opiniesprimoj pri la funkciado de la lingvo en infanaj buŝoj. La Gazetaran Servon prizorgis s-ro Andrzej *Pettyn,* estro de Esperanto-Redakcio de Pola Radio.

La eĥoj pri la jubilea kongreso kaj pri la centjariĝo daŭris ankaŭ post la UK. Eĉ tiaj renomaj gazetoj okupiĝis pri Esperanto, kiuj ĝis nun verŝajne tute ne menciis ion pri ĝi: Time, Chicago Tribune, Washington Post, Christian Science Monitor, Frankfurter Allgemeine Zeitung. Sendube, ne ĉiu artikolo estis plene bonintenca, sed en si mem estas iagrada rezulto la fakto, ke ankaŭ ili devis ion skribi pri ĉi tiu lingvo. La mondo pli multon scias pri ni ol ĝi sciis antaŭ la jubileaj eventoj. Nature, tio ne signifas, ke ni baldaŭ atingos mondskuajn sukcesojn. Antaŭ ni staras tre pena laboro, se ni volas stabiligi la gisnunajn rezultojn kaj daŭre teni la dinamismon, kion stimulis la jubileo kaj la jubilea kongreso.

Pál *Felső*

Ie en la Kongresejo. De maldekstre: Yoshimi Umeda, vicprezidanto de UEA, kaj Roman Dobrzynski, prezidanto de PEA

La hungara filmo „En Eŭropo ie" plurfoje estis prezentita antaŭ plenŝtopita spektejo
(Fotoj de Z. Fejér)

La ŝtuparo ĉe la enirejo de la Kongresejo estis ĉiama scenejo de amika babilado



Inter esperantistoj, en Zagrebo

Post la Universala Kongreso, inter la 2a kaj 9a de Aŭgusto, kolektiĝis ĉ. 350 personoj por – denove aŭ plu – ĝui Esperantan kulturon, ĉi-foje en Zagrebo. Partoprenis homoj el 39 landoj, inter ili el dek Afrikaj – dank' al la fondaĵo Azio–Afriko. Tricent kelkdek – estas multe malpli ol oni planis, sed tute sufiĉe por altnivela kaj amikeca festado.

Veninte al miaj gastigantoj, mi demetis la tornistron kun kvin filmujoj plenaj de „En Eŭropo ie", kaj eklegis salutvortojn en la Festkajero: „Jarcenton malproksime de la apero de la Unua Libro, kiom da tempo for de la fina venko? Ni ne profetu. Ĉu Esperanto havas estontecon? – oni demandas. Por ni ĝi havas nunon."

Vere, Zagrebanoj sukcesis impone pruvi nunecon de la Esperanta kulturo; ili pruvis ĝin per sia scienca simpozio, teatraj kaj literatura programoj, kinoprezentadoj kaj pupteatra festivalo tradicia. Kiu trasidis ĉiujn programojn, certe ne havis tempon vidi la indaĵojn de la urbo, nek ion aĉeti.

Pikniko sur batalkampo de la Bulgara Esperanto-teatro rikoltis sukceson kiel ĉiam. Leningrada Esperanto-teatro, kies trupanoj nun multe malpli reduktas vokalojn, ol antaŭ kelkaj jaroj, post Hamleto havis sukceson precipe dank' al *La sonĝo de ridinda homo* de Dostojevskij kaj ĉe pli al sia „aldona surprizo". Certe ludis eminente ankaŭ la trupoj el Beogrado kaj Zagrebo, sed tiun tagon mi, bedaŭrinde, ankoraŭ ne estis alveninta. Por informi vin: la trupo MEJS el Beogrado prezentis *La Lasta Fadeno* de M. Zablačanski, Seka Grupo el Zagrebo ludis *El la vivo de insektoj* de K. kaj J. Čapek.

Estis agrabla la kunveno de Esperantista Verkista Asocio. Feliĉe, ĝi kunvenis ne nur kun si, sed kun la publiko. Modeste prezidis kaj aŭskultis aliajn verkistojn Tibor Sekelj. Sed li ja havis bonŝancon: lian poemon *Mi vizitas mian farmon* citis alia famulo, Paul Thorsen, aŭtoro interalie de la poemaroj *Rozoj kaj urtikoj*, *Pluk*, *Sen parašuto*. Permesu, ke miaflanke mi citu iun el *liaj* poemoj:

Statistifiko

Se iuj tro manovras
per belaj statistikoj,
kredeble tio kovras
ke mankas la efikoj.

Ĉu lian poemon pri ŝtono en la Granda Murego de Ĉinujo oni povos legi en El Popola Ĉinio, ne estas sciate. – Postajn rakontojn de Tibor Sekelj pri iama konflikto kun indiĝenoj kaj aliaj aventuroj ni ĉiuj aŭskultis kun vera plezuro.

Julian Modest, populara prozisto kaj dramverkisto, ĉi tie prezentis du el siaj *eseoj: Naturo en la Esperanta poezio de Hilda Dresen;* kaj alian pri niaj *poetinoj*, precipe pri iliaj manieroj poezie priverki la amon. Diskutante kun li, Gerrit Berveling kaj Paul Thorsen emfazis oftiĝon de *sociaj* temoj en la virina poezio; pri tio Modest esprimis sian konsenton.

Spomenka Štimec, aŭtorino de *La nepagipova lando*, *Ombro sur interna pejzaĝo*, *Verda Majo*, *Vojaĝo al disiĝo*, ravis la publikon ne nur per la beleco de la prezentata proza fragmento, sed ankaŭ per sia maniero prezenti ĝin. Mi aldiru, ke la tuta festivalo portis stampon de ŝia multflanka laboro. Ŝi, laŭ esprimo de Zlatko Tišljar, estas admirinda „detalistino", kiu kapablas kaj penegas zorgi pri seĝo kun tri piedoj por ia kvina sceno aŭ pafilo el la pasinta jarcento aŭ perdita mansaketo de iu ajn; samtempe, komprenante ĉiun, ŝi pontas inter dramaj aktoroj kaj pupistoj, artistoj kaj simpluloj, Zagrebanoj kaj gastoj... kaj ne ĉesas organizi.

La etoson de la verkista kunveno varmigis ankaŭ Claude Piron. Li recitis sian baladon ĉi-foje sen melodio:

...Ho, kara, eble la valor'
de l' kantoj de la trobador'
kiu vin amas, neniiĝos.
Sed fidu, ĝis la lasta hor'
ne lia amo malfortiĝos.

Trovis ĝeneralan plačon *Nova kanto pri Dio*, poemo de Gerrit Berveling: la poemo tre sugeste kritikas ĉiajn politikajn kaj dogmajn ekstremojn de nia epoko:

La Dio de l' Blankuloj
la rason kreis pura
do: teni ĝin senspura
pri ajna gent' – jen dura
la tasko de la Buroj!

Zagrebo gastigis centojn da esperantistoj el 39 landoj

La Kristanisma Dio
kolektas eklezioju
ritarojn ciberiojn
pri domo novtrovita
li montras sin ravita

La Israela Dio
Palestinanojn pelis
por la Popol konkeris
landon laŭ la Biblio:
triumfas inflacio!

La Dio de Islamo
vualc kovras inojn
kaj lasas siajn idojn
Irano kaj Irako
plu loĝi en barako.

Sed
la Dio de la homoj
:.....
petegis en la rondo
subtenon por rezisto.

S-ro Li Shijun, konata tradukisto literatura kaj ĉefredaktoro de El Popola Ĉinio, tre ĉarmc, eĉ *kantis* sian solenan kanton al la publiko. – S-rino Emilija Lapenna, multflanka aktivulino, iama sekretariino de Belartaj Konkursoj, dramverkistino kaj unu el la vočoj sur la disko de UEA *Perfekta prononcado*, nun deklamis sian poemon dedičitan al *Urbo Zagreb*, entuziasme kaj kun imitinde preciza elparolo ankaŭ de la famaj propraj nomoj en la poemo, – kiuj laŭ mia memoro *ne estis malmultaj.*

Dum la simpozio *Lingvaj problemoj en internacia komunikado* prelegis interalie Giordani Formizzi, Li Shijun, Sinitiro Kawamura, Hans Michael Maitzen, Bart Papegaaij, Claude Piron. Oni tre alte taksis la informoričon kaj konkretecon de la prelego de Klaus Schubert. Temis en la prelego pri interlingvo por perkomputila tradukado; estis rimarkinda la aktiviĝo kaj lernemo de la publiko. – Nikola Rašič, kiu – se vi permesas šerceton – taksas iom pli alte la eblojn de statistiko ol s-ro Thorsen en la citita poemo – karakterizis esperantistojn surbaze de sociologia enketo; la titolo esits: *Cent jaroj da toleremo.*
Evidentiĝis interalie, ke esperantistoj plejparte estas nek ričaj, nek malričaj; ke ili kutime ne emas al ekstremoj kaj estas multrilate toleremaj. Tiajn kaj similajn kvalitojn eble ankaŭ vi povus supozi ĉe esperantistoj simple laŭ viaj spertoj; sed la afero sonas multe pli kredinda, kiam ĝin subtenas bone formulitaj, interesaj demandoj kun multege da respondoj el diversaj landoj kaj medioj. Estis interese aŭdi, ke 22 %-oj de la specimeno estis minoritatanoj; 40 %-oj devenis el miksa geedzeco. Plej multaj, laŭ lia statistiko, estas ekster partio; tuj poste sekvas komunistoj. Li povis konstati vastan simpation al centraj maldekstraj fortoj; konsiderindan malŝaton al Sudafrika Respubliko... Sed mi česas citi detalojn, esperante ke vi povos legi ian varianton de la teksto, pli aŭ malpli frue, en ia esearo.

Ne estas hazarde, ke plej multe intervjuataj de la Zagrebaj gazetaro kaj radiostacioj estis s-roj Kawamura kaj Maitzen, prelegintaj respektive pri *La lingva problemo en internacia komunikado el vidpunkto de japana natursciencisto* kaj *UN kaj la lingva problemo:* temoj kiuj interesas homojn plej diversajn, se la informantoj estas fidindaj. – Giordano Formizzi, parolante pri *Plurlingvismo kaj la Internacia Komunikado*, prezentis siajn pedagogiajn konsiderojn, substrekante, ke akcepti Esperanton signifas ankaŭ šanĝi vivostilon. – Laŭ la opinio de Ralph Harry agado de diplomatoj–esperantistoj estis kaj estas fruktodona, kaj estas kunordiginda. – Li Shijun interesveke kaj informriče parolis pri *Lingvoinstruado en Azio.*

Ni povis ĝui plurajn filmojn, interalie la konatajn *Angoroj* de A. Mahé kaj *27* de I. Špoljarec. Pro tempomanko oni ne projekciis la amuzan kaj vere Esperantan *Gastamo* de K. Tišljar – S. Štimec. El la prezentitaj artaj filmoj plej sukcesis *En Eŭropo, ie* de G. Radványi, certe pro la ĝenerale homa mesaĝo kaj pro la kvalitoj de la Esperanta dublo (dank' al la tradukinto, Imre Szabó, kaj al la sonreĝisoro István Vajda). – Koncerne dokumentajn filmojn, Krunoslav Tišljar ne havis rivalojn: li sola liveris kvin filmojn kun daŭro inter 25-50 minutoj: pri TEJO-kongresoj, pri renkontiĝo de esperantistaj familioj sur la insulo Pag; se ne paroli pri instrufilmoj, surbendigitaj teatraĵoj ks. – La instrufilmon de R. Rožič pri la Zagreba instrumetodo estus inde prezenti ankaŭ en Hungariaj kluboj, por akceli partan aŭ multflankan kunlaboradon de niaj pedagogoj.

Prelego de Zlatko Tišljar pri la Zagreba instrumetodo, pri la atingoj de ĝia aplikado en Jugoslavio kaj eksterlande estis klara, konvinka kaj sobra. Interalie li vočlegis kelkajn laboraĵojn de siaj kursanoj pri diversaj temoj. Plej edife estis aŭskulti la verketojn kun la titolo *Mia plej granda problemo.* Kelkaj infanoj, eble pli sinceraj ekster la lernejo kaj la hejmo, akre kritikis siajn instruistojn. Knabino skribis proksimume: *Mi ne šatas, ke mia patrino diradas; ke tia estas la vivo. Kio estas malbona, tion oni devas šanĝi.* Knabo skribis, ke li *preferus* morti; poste oni iom studis liajn cirkonstancojn kaj helpis ripari lian memfidon. Mi ĉi tie substrekas nur, ke ĉiu el la infanoj esprimis ja sin, siajn pensojn kaj emociojn – certe en atmosfero, kiu ilin kuraĝigis je tio. Kaj oni ja scias: lerninte iom da elementoj de la lingvo, plej sukcese oni povas evolui strebante esprimi sin.

Estis tre riča la pupteatra programo. El la naŭ viditaj pecoj al mi plej plačis *Rusa Salo;* prezentis ĝin la pupteatro Skomoroh el Tomsk, Sovetio. Če la kulmino de la agado oni ekscias, kiel Rusa junulo, malričulo-ruzulo sukcesis vendi salon al la Franca reĝo, neniam tion gustuminta, kontraŭ sampeza oro... Sed estis eĉ pli interese, kiel la trupo povis prezenti diversajn lokojn, mediojn, vivostilojn kaj atmosferojn tra landoj de Eŭropo.

Oni trovis tre bona la surscenejan lingvouzon de la infana trupo „Grilo" el la Hungara urbo Celldömölk, en la peco *La sorča krusto* de László Devecseri. Pluraj konstatis, ke „malgraŭ sia hungareco, ili konsekvence akcentas la antaŭlastan silabon." Tamen, ne tute senescepte. Šajnis al mi, ke iam – konforme al Hungara akcentado de *„nem" verbo* – ankaŭ Esperanta *ne* šteladis la akcenton de la verbo: *ne* forgesis (anstataŭ: ne forgesis; aŭ: *ne* forgesis). Simile: kiom ajn insiste kaj laŭte oni vokadas Leopoldon, la *čefa* akcento devas trafi la antaŭlastan silabon kaj ne la unuan. Aktor(et)oj devas eviti eĉ eraretojn kiel „audas", „familio", „bonvolu, bonvolu", „kostas neniom". – Mi scias kaj mem asertas, ke tiuj eraretoj, se oni konsideras la multegon bonan, estas bagatelaj; sed bonšance infanoj estas kaj ankoraŭ influeblaj, kaj ne tre ofendiĝemaj, do korekteti ilin certe estas inde. – Estas specialaĵo de la trupo, ke ili eklernis Esperanton pere de la rollernado, kune kun la entuziasma instruistino Márta Nagy, kiu entreprenis la aferon laŭ konsilo de s-rino Katalina Smidélius. Salutinde. La gvidantino de la grupo, la reĝisoro, la tradukinto Péter Murányi meritas gratulon kaj kuraĝigon.

Fidele repartoprenis la festivalon la Hungaraj Roberto Bánki kaj Gyöngyi Blasek, prezentante siajn „Neregulajn ludojn" kun la sama sukceso, kiel aliajn fojojn. Roberto Bánki uzas Esperanton tre sprite kaj facile, sur kaj ekster scenejo. Liaj pupoj estas admirindaj. Kelkfoje en rimvortoj la akcento misglitas ankaŭ če li. Šajne, li eldiris *„cuker-"* anstataŭ *„suker-"* kaj *sojfo* anstataŭ *soifo*

Hungara Štata Pupteatro reprezentis sin ankaŭ per *„Foiraj pupludoj,* tre konvenaj por infana publiko. La teksto estis magnetofona, tamen ĝi enhavis eraretojn facile forigeblajn: „Ču vi ne audas?" „Bone, mi *fartis* tion" (ču en la senco 'Bone mi antaŭsentis, supozis tion?'), „kuŝpnaza," „kuŝeneto."

Pinokjo de la Teatro Tindipic kaj Teatro dell Aggeggio (Italio) interesis per sia originaleco prefere plenkreskulojn. *Doktoro Faust* de la Pupteatro Pupilla el Wells (Aŭstrio) estis tre bone ellaborita, sed kun relative malmulta Esperanta teksto, praktike kun resumoj. Estis vidinda kaj arte interesa la *Pupmozaiko* de Teatro Pupella & Nogues el Genova, sed denove kun ne tre multe da Esperanto. Male, la unupersona *La timema lupo* de la Eta Teatro Dusko Radović el Beogrado kaj ludis, kaj parolis tre bone sur la scenejo, kvankam ekster ĝi – neniom. Cetere la lupo estis pli homeca ol pupeca: ludis aktoro, uzante de tempo al tempo maskon. Sed ja pli gravas, ču la verko estas bona, ol ču la ĝenro estas tia aŭ alia. Ĝi al mi plačis. Cetere, malgraviĝon de pupoj oni povis rimarki ankaŭ en aliaj pecoj, ekz. en Rusa Salo: tie pupoj kaj homoj rolis kvazaŭ paralele.

Mi scias, ke mia raporto ne estas proporcia. Precipe el arta vidpunkto, čiu ludinto meritus pli detalan kaj kompetentan pritrakton ol la mia ĉi tie.

Mi ne povas ne mencii, ke la pupfestivalo denove estis tre amuza kaj eduka por infanoj sufiče preparitaj, kvankam, pro spektakloj en malfrua vespero kaj disa loĝado, ĝi estis por kelkaj ankaŭ laciga. Mi, kiel Hungaro, aparte ĝojis, ke krom la trupo el urbo Celldömölk, česstis infana grupo ankaŭ el urbo Kecskemét. Tio montras eblecon de – espereble pli kaj pli glata – kunlaborado.

Fine, mi gratulas s-ron Zlatko Tišljar (alie Pajon), direktoron de Internacia Kultura Servo, pro la valora iniciato; lin kaj la tutan kolektivon de IKS pro la sukcesa realigo de la jubilea kultura festivalo.

Blazio *Vaha*

D-ro István SZERDAHELYI 1924–1987

La 21-an de aŭgusto forpasis d-ro István Szerdahelyi, elstara personeco de la hungara kaj internacia Esperanto-movado. Li estis lingvisto, universitata docento, estro de la Esperanto-fako en Universitato „Eötvös Loránd" (Budapeŝto), vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, akademiano de Esperanto kaj Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio.

Li naskiĝis antaŭ 63 jaroj en Transilvania vilaĝo Avasfelsőújfalu (nun Negresti en Rumanio) en hungara familio. En la bazlernejo oni instruis rumane, en la mezlernejo ankaŭ france. Tiujn ĉi tri lingvojn li regis, kiam li finis siajn gimnaziajn jarojn en 1942. Li fariĝis studento de Ŝtatadministra kaj Jura Fakultato de Universitato en Kolozsvár (nun Cluj-Napoca en Rumanio). Pro la milito tie li studis nur du semestrojn. Kiel militkaptito li – aŭtodidakte – ellernis ankaŭ la rusan lingvon. Li doktoriĝis en 1951 en Budapeŝto, en la Jura Fakultato de Universitato „Pázmány Péter". Dum siaj jurstudentaj jaroj li vizitis ankaŭ kurson pri diplomatio kaj ekstera politiko de la Hungara Instituto pri Eksterlandaj Aferoj. En 1953 li akiris diplomon pri la rusaj lingvo kaj literaturo en la Filologia Fakultato de Universitato „Eötvös Loránd" (ELTE, Budapeŝto).

Jam en 1950 aperis lia unua lernolibro pri rusa lingvo. En la sekvaj jardekoj li fariĝis specialisto de la instrumetodo de la rusa lingvo en diversgradaj hungaraj lernejoj. Li verkis pli ol 20 lernolibrojn kaj faklibrojn pri la instruado de la rusa lingvo.

Esperanto – kiel multajn el inter ni – atingis lin hazarde. Niaj fervojistaj samideanoj juste fieras pro la esperantistigo de István Szerdahelyi. En unu el siaj lastaj studentaj jaroj, en 1949, li konatiĝis kun Esperanto dank' al sia onklo, Lajos Dér, konata fervojisto-esperantisto en Budapest. En 1950 Szerdahelyi jam instruis la Internacian Lingvon, kaj li gvidis diversajn kursojn ankaŭ post la reviviĝo de la hungara Esperanto-movado en la dua periodo de la 50-aj jaroj. Liaj unuaj Esperanto-lernolibroj aperis en formo de kvar multobligitaj kajeroj en 1963.

Li plenumis diversajn postenojn en la instrukomisiono de HEA. Li iniciatis pli modernan instrupolitikon de Esperanto, laŭ liaj proponoj oni enkondukis en 1964/65 la ĝusnunan trigradan (A,B,C) kursokaj ekzamen-sistemon de Hungara Esperanto-Asocio. En la renoma „Gvidlibro por supera ekzameno" li verkis la instrumetodikan ĉapitron.

En 1964 li fondis kaj prezidis la Esperantologian Fakkomitaton de HEA. Dank' al la altiĝo de la prestiĝo de Esperanto en Hungario, la 1-an de oktobro 1963 aperis ministeria dekreto pri la instruado de Esperanto – kiel libervole elektebla studobjekto – en la hungaraj lernejoj. Ekde 1966 – kadre de la landaj ŝtataj lingvoekzamenoj – oni povis akiri diplomon ankaŭ pri Esperanto. D-ro Szerdahelyi estis la prezidanto de ŝtata ekzamenkomisiono pri Esperanto en Hungario.

Por ebligi la realigon de la favora ministeria dekreto estis bezonataj fakuloj, diplomitaj pedagogoj, kiuj kapablas kaj rajtas instrui Esperanton en diversaj gradoj de la hungara instrusistemo. D-ro Szerdahelyi unue kadre de la Junulara Organizajo (KISZ) de la Jura Fakultato de ELTE (Budapeŝto) organizis sciencan studrondon. Dum 1964 kaj 1965 liaj aktivaj studentoj aperigis eĉ du valorajn revuojn („Studento" kaj „Universo").

La epoka, revolucia paŝo okazis en la jaro de la tre sukcesa Budapeŝta Universala Kongreso (1966). Antaŭ Koós, la tiama sekretario de HEA – proprainiciate – kun apogo de akademiano Géza Bárczi, la plej elstara hungara lingvisto, sukcesis atingi ĉe la Minis-

terio pri Edukado permeson por enkonduki Esperanto-fakon en la Filologia Fakultato de ELTE D-ro Szerdahelyi organizis kaj gvidis tiun ĉi – ĝis nun unikan – universitatan Esperanto-fakon kadre de la Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko (tiam Katedro pri Ĝenerala Lingvistiko kaj Fonetiko).

Oni rajte taksas tiun ĉi, pioniran, skolokrean agadon de d-ro Szerdahelyi lia vivoverko, ja lia vivo en la lastaj du jardekoj estis forte ligita al tiu ĉi fako. Dum 20 jaroj pli ol cent esperantistoj el 5 landoj ricevis tie universitatan diplomon pri Esperanto-lingvo kaj literaturo. El inter ili pli ol 60 verkis sian universitatan faklaborajon en aŭ pri Esperanto aŭ interlingvistiko. Kvin disĉiploj jam atingis universitatan doktoran titolon pri Esperanto aŭ interlingvistiko, aliaj kvin laboras super siaj doktorigaj disertacioj.

Profesoro Szerdahelyi apartenis al la plej elstaraj, tre popularaj pedagogoj, instruistoj de la Universitato ELTE. Liaj eksterordinara klereco, personeco, altiris la atenton de multaj talentaj gestudentoj, kiuj laŭ la instrukcioj, proponoj de d-ro Szerdahelyi okupiĝis pri diversaj terenoj de interlingvistiko kaj esperantologio.

Oni apenaŭ kredus, ke pli ol dek jarojn nur li mem instruis samtempe por 4 kursoj en la Universitato, ne kalkulante la korespondajn kursojn. Dumtempe, sub lia gvido aperis 8 universitataj bazaj studmaterialoj (lernolibroj) por studentoj de la Esperanto-fako. Krome li organizis sciencan studrondon, kie liaj disĉiploj per siaj studrondaj eseoj, studoj gajnis plurajn premiojn en la Landaj Konferencoj de Sciencaj Studrondoj. Inter 1971 kaj 1976 ĉiujare estis organizitaj – laŭ la iniciato de d-ro Szerdahelyi – Universitataj kaj Altlernejaj Esperanto-Tagoj en Hungario. Do, ne estas mirinde, ke la famo de la Esperanto-fako kaj ties gvidanto disvastiĝis en la tuta mondo esperantista. Li estis kore atendata preleganto en ĉiuj en- kaj eksterlandaj porstudentaj aranĝoj, fakaj seminarioj. Ekde 1966 la Fako estis pedagogia-didaktika centro de la internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La gvidan laboron de la renoma Kvinlanda Internacia Pedagogia-Didaktika Eksperimento (1967-1977) faris d-ro Szerdahelyi mem. Dank' al tiuj ĉi laboroj evidentiĝis la didaktika valoro de Esperanto en la instruado de fremdaj lingvoj.

En 1960, en la Budapeŝta E-klubo „Konkordo" okazis lia unua prelego en Esperanto sub titolo „János Bolyai, la genia matematikisto kaj lia lingvoplano". Mi dubas, ĉu oni sukcesos kompili kompletan liston de liaj prelegoj en centoj da diversaj E-kluboj, seminarioj kaj en Hungario kaj en eksterlando. Lia eksterlanda prelegista kariero komenciĝis en 1970, en la Somera Universitato de la Universala Kongreso en Vieno. Post tri jaroj li prelegis en La Chaux-de Fonds (Svisio) pri interlingvistikaj temoj, poste pri metodologio en Pollando. Post du jaroj oni ĝuis liajn klerajn, instruajn prelegojn en Finnlando. Li ĉeestis la mejloŝtonan konferencon de Centra Laborrondo de GDR en 1978 pri la scienca esploro kaj aplikado de Esperanto. Li estis konstanta preleganto de la interlingvistikaj laborkonferencoj de la Paderborna Pedagogia-Kibernetika Instituto (FR Germanio). Li estis unu el la fondintoj kaj estraranoj de Internacia Scienca Akademio en San Marino.

Liaj pli ol 200 artikoloj aperintaj en diversaj en- kaj eksterlandaj movadaj kaj fakaj revuoj atestan lian gravan verkistan agadon. Li estas aŭtoro de pli ol 20 libroj en aŭ pri Esperanto. Liaj konataj kaj rekonataj lernolibroj („Esperanto 1" kaj „Esperanto 2"), la volumo „Metodologio", krome la hungarlingva verko „Bábeltől a világnyelvig" (De Babelo ĝis la mondlingvo") estas bone konataj kaj legataj en diversaj partoj de la mondo. Li sukcesis finredakti sian lastan verkon, aperontan ĉe Akadémiai Kiadó (Akademia Eldonejo). Temas pri la delonge atendata Magyar-Eszperanta Meza Vortaro, listiganta ĉ. 70 mil kapvortojn). Li preskaŭ finis sian kandidatigan disertacion pri interlingvistiko. La ĉiamaj porstudentaj kaj pormovadaj aktualaĵoj prokrastigis la kompiladon de la atendata disertacio.

Li membris en Hungara Lingvoscienca Societo (Magyar Nyelvtudományi Társaság) kaj Moderna Filologia Societo (Modern Filológiai Társaság) kaj li estis membro de la sekvaj internaciaj lingvistikaj asocioj: Internacia Asocio pri Aplika Lingvistiko, Internacia Kibernetika Asocio, Internacia Societo de Funkcia Lingvistiko.

En la lastaj kvin jaroj oni elektis lin Honora Membro de UEA (1983), prezidanto de ILEI (1985), akademiano de Esperanto (1985) kaj vicprezidanto de HEA (1986). Li elane eklaboris kaj ĉe ILEI, kaj ĉe HEA kie li gvidis kaj respondecis pri la instruaj kaj lingvistikaj aferoj. Tuj post sia elektiĝo li klopodis modifi la statuton de Akademio de Esperanto, malfavoran por reprezentantoj de malgrandaj lingvoj.

Pro tiom da laboroj kaj rezultoj oni distingis lin relative malofte. Li ricevis de HEA ĝian plej grandan honorigon „Pro Esperanto" en 1980, kaj en 1984 la Konsilio de Ministroj de Hungara Popolrespubliko distingis lin per insigno „Pro eminenta laboro".

La esperantista mondo estis ŝokita pro la subita morto de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la mondo. La esperantista agado, verkaro kaj lia vivoverko, la funkcianta Esperanto-fako prezentas al ni unikan homon, la plej elstaran hungaran esperantiston de nia epoko.

Universitato „Eötvös Loránd" kaj Hungara Esperanto-Asocio konsideras lin, kiel sian propran mortinton. La funebra ceremonio okazis la 4-an de septembro en la tombejo Farkasréti (Budapeŝto) en ĉeesto de centoj da hungaraj esperantistoj. Nia Asocio planas eldoni memorlibron pri profesoro Szerdahelyi por inde kaj vaste rememori pri lia esperantista kaj lingvista-pedagoga agado.

Nun antaŭ liaj disĉiploj kaj kunlaborintoj staras apenaŭ plenumebla tasko: daŭrigi lian poresperantan agadon en la universitatoj kaj lingvistikaj rondoj. Nur tiel oni povos inde omaĝi al profesoro Szerdahelyi.

d-ro Árpád Máthé



Sándor Révész

Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario

Dua parto: La ekonomio II.

Tiu ĉi artikolserio estis verkita komence de la kuranta jaro. Post ĝia verkiĝo okazis vastaj debatoj en la hungara socio, kaj komence de julio la CK de la Hungara Socialisma Laborista Partio akceptis rezolucion pri la programo de ekonomia-socia disvolviĝo. En la spirito de tiu rezolucio eksoficis julie la nova ĉefministro de Hungario, Károly Grósz. Malgraŭ la fakto, ke la nuna kaj la sekva parto de tiu ĉi artikolserio ne povis konsideri la konstatojn de la nomita rezolucio, ĝi plene taŭgas por doni objektivan kaj senlakan bildon pri la nuno de Hungario. (La Red.)

En tiu ĉi parto temos pri la instituciaj-funkciaj mekanismoj de la hungara ekonomio, ni trarigardos la plej gravajn ŝanĝojn, kiuj okazis en ili dum la unua duono de la 80aj jaroj. Poste ni okupiĝos pri la „kurac-metodoj", reform-paŝoj, kiujn la ekonomikistoj proponas.

La specifo de la hungara plan-ekonomio estas tio, ke la ekonomiaj planoj (laŭ la leĝo pri la ekonomia planado, akceptita en 1972) estas devigaj nur por la registaro kaj la Nacia Banko. La principo de la leĝo pri la ŝtataj entreprenoj (1977) estas tio, ke la ŝtata administrado direktas la entreprenojn ne rekte, ne ordone, sed pere de la reguligo de la ekonomia agado, pere de ekonomipolitikaj orientiloj (impostoj, apogoj, parte difinitaj prezoj, doganoj ktp.). La ekonomi-politikaj instancoj (laŭ la spirito de la leĝo) reguligas la medion, la cirkonstancojn de la entreprenado, kaj tiel influas la agadon de la entreprenoj. En 1984 oni modifis la leĝon tiel, ke granda parto de la ŝtataj entreprenoj (70-80%) fariĝas memregantaj. Tio signifas, ke (escepte en la entreprenoj de la publikaj servoj, infrastrukturaj funkcioj, milit-industrio ktp.) la gvidantoj ne estas nomumitaj de la ŝtat-administraj instancoj, sed elektitaj aŭ de la tuta dungitaro (en malpli grandaj entreprenoj) aŭ de la entreprena konsilio (kies membroj estas parte reprezentantoj de diversaj funkcioj, parte elektitoj). La juristoj interpretas la modifitan leĝon tiel, ke la ŝtata administrado reguligas la agadojn de la entreprenoj ne plu je la rajto de posedanto, sed je la rajto de publika aŭtoritato. Tio, ja, estas grava kaj kvalita ŝanĝo.

Pasintsomere aperis la edikto de la Prezidio pri la malfondo de entreprenoj. Ĝis nun nur la ŝtataj instancoj rajtis iniciati la malfondon pro bankroto de iu entrepreno, laŭ la nova edikto nun ankaŭ la kreditoroj (ĉu/kaj ŝtataj, ĉu/kaj kooperativaj, ĉu/kaj privataj) povas iniciati la malfondon, kaj la ŝtata administrado nur je difinitaj kondiĉoj rajtas rifuzi la iniciaton (pro armeaj interesoj aŭ danĝero de amasa senlaboreco). Antaŭe inter la kreditoroj la ŝtata buĝeto rericevis la monon la unua, poste sekvis la ŝtataj entreprenoj kaj okazis, ke la privataj etmetiistoj ricevis nenion. Nun la kreditoroj estas egalrajtaj.

Memkompreneble ni ne havas ankoraŭ sufiĉe da spertoj pri la funkciado de la memregantaj entreprenoj kun elektitaj gvidantoj, nek de la nova bankroto-procedo, sed ni povas diri ion pri tio, kiel funkciis la leĝe-teorie certigita memstareco de la entreprenoj ĝis nun.

La ekonomi-politiko de la 70aj jaroj, kion mi jam karakterizis (malreala prez-strukturo, monopoligo per unuigoj – inter 1969 kaj 1980 la nombro de la entreprenaj unuoj malaltiĝis je 60%!!, la ignorado de la mondekonomiaj tendencoj ktp.), efikis forte kontraŭ la entreprena memstareco. La merkataj faktoroj restis malfortaj, sorto de la entreprenoj kaj la gvidantoj dependis multe pli de la bontrovo de la ekonomi-politikaj instancoj ol de la merkato. La ŝtataj instancoj redistribuis tre grandan parton de la kapitalo. La investado grandparte restis ŝtata funkcio.

La grandmezura fiska (buĝeta) redistribuo draste reduktas la profit-diferencojn inter la entreprenoj. Hungara Vivo antaŭnelonge publikigis ŝokan tabelon pri tio (HuVi, 1986/5). Por memorigi pri la tabelo: antaŭ la redistribuo en 1982 14% de la entreprenoj estis malprofitaj, post la redistribuo nur 1%! Aliflanke, antaŭ la redistribuo 64% de la entreprenoj havis mezajn aŭ altajn profitojn, post la redistribuo nur 22%! Ni aldonu, ke la redistribuita parto de la kapitalo plu kreskas de jaro al jaro. Tibor Liska (la „terura infano" de la hungara ekonomiko) nomas tiun praktikon sistemo de „rabu-kaj-donacu".

Ju malpli profita estas iu entrepreno des pli da mondonaco ĝi ricevas. Oni premias la malprofiton kaj punas la profiton, la kapitalo fluas de la progresaj, profitdonaj terenoj al la malprofitaj. Kaj la distribuita parto de la kapitalo de jaro al jaro kreskas ĝis nun!

Nature, la profitoj-malprofitoj antaŭ la redistribuado ankaŭ ne estas realaj pro la prez-strukturo, pro la monopoloj kaj pro tio, ke malgraŭ la leĝo la ekonomi-politikaj instancoj tamen ofte ordonas al la entreprenoj produkti aŭ ne produkti ion. Tiujn ordonojn oni ofte eĉ ne povas eviti, ĉar ekzemple en la KEI-sistemo la kontraktoj estas ŝtat-nivelaj, kaj la ŝtato devas certigi, ke la produktaĵoj prikontraktitaj produktiĝu. Dum la 70aj jaroj la ekstera komerco estis monopolo de ŝtataj eksport-importaj entreprenoj. La entreprenoj (almenaŭ la pli grandaj) estas jam multe pli liberaj kaj memstaraj en la eksterlanda komercado, sed memkompreneble nur rilate tiujn landojn, kie la entreprenoj ankaŭ rajtas memstare aranĝi siajn eksportajn-importajn aferojn.

Lastatempe oni enkondukis kelkajn reform-elementojn por direkti la kapitalon al la sukcesaj entreprenoj.

Oni rajtigis la entreprenojn eldoni obligaciojn, kaj tiamaniere havigi kapitalon por investoj. La obligacioj estas libere vendeblaj kaj aĉeteblaj (parto da ili nur por juraj personoj, alia parto ankaŭ por naturaj personoj). La obligacioj plejparte repagiĝas kun antaŭfiksitaj interezoj, kaj la repagon garantias la Nacia Banko, sed oni eldonis jam obligaciojn kun pli alta interezo, sed sen garantio, kaj ekzistas jam obligacio, kies interezo parte dependas de la profito de la entrepreno.

La sistemo de la obligacioj, la nova sistemo de la bankrotprocedo kaj la intereso de la et-entreprenoj postulis tion, ke bazaj informoj pri la financoj de la entreprenoj estu publikaj. Tiun devigan publikecon oni enkondukis ekde 1987.

La 1an de januaro en 1987 ekfunkciis ankaŭ la reformita banko-sistemo.

La bankoj ĝis nun estis esence partoj de la ŝtata administrado, ili decidis pri la kreditoj kiel instancoj laŭ ŝtat-administraj intencoj, do ili kompletigis la sistemon de la ŝtata redistribuado. Ekde nun la banko-sistemo estas dunivela. Krom la instancotipaj bankoj elformiĝas reto de la merkat-tipaj bankoj, kiuj decidas laŭ merkataj vidpunktoj, estas profit-centraj, kaj konkurencas inter si.

* * *

Unu el la fundamentaj problemoj de la plan-ekonomioj estas tio, ke la evidenta komuna intereso, t.e. produkti, labori kiel eble plej efike, ne transmetiĝas al la nivelo de la konkretaj, personaj, grupaj interesoj. La transmeto povus efektiviĝi ekzemple pere de la lukroj (salajroj, premioj, profit-procentaĵoj ktp.), se la lukroj forte dependus de la (kvanto kaj kvalito de la) laborproduktado. Ŝajnas facile elformi tiun dependecon, sed la ŝajno trompas, ĉar la interesoj de la decidpova tavolo diktas alion. Nome, la ekzistado, la socia stato, la enspezoj de la

gvidantoj dependas de la grandeco, graveco kaj ne de la efikeco de tiu unuo (uzino, entrepreno, industri-branĉo, socia funkcio ktp.), pri kiu ili disponas. La intereso de la plej forta soci-tavolo, t.e. grandigi la disponitajn unuojn sendepende de la efikeco, elformas la aŭtomatismon de la malintensa ekspansio. La malintensa, malefika ekspansio ja rapide elĉerpas la fontojn (energion, materialon, laborforton ktp.) kaj tiamaniere forkonsumas sian propran bazon. La eblecoj de la malintensa ekspansio elĉerpiĝas, sed (kiel la socigvida strukturo mem) plufunkcias la ekspansiemo de la gvidantoj. La gvida tavolo (por eviti la bankrotiĝon de la nacia ekonomio) devas bremsi sian ekspansiemon, devas agi kontraŭ siaj instinktoj, do, la ekonomi-politiko fariĝas iom skizofrenia. La ekonomi-politika centro, kiu plej bone perceptas la danĝeron de la bankrotiĝo, kaj kies pozicion plej profunde tuŝas tiu danĝero, bremsas la ekspansiemon de entreprenoj kaj industribranĉoj, kaj tiel ĝi limigas la entreprenan memstarecon, la liberecon de la prez-politiko, lukro-politiko, investado, fin-fine la merkatajn procezojn mem. Tiamaniere la reformpaŝoj ne povas disvolvi sin, ne povas profunde transformi la praktikon de la ekonomia disponado, nek la interesojn de la disponantoj. Ĝuste tiuj faktoroj, kiuj bezonigas la reformon, bezonigas ankaŭ la kontraŭreformajn paŝojn.! Jen, denove magia cirklo. (Poste ni eksplikos tiun ĉi penso-ĉenon sur pli ĝenerala nivelo.)

La skizitan situacion bone ilustras la lukro-reguligo; ne elformiĝis la strukturaj kondiĉoj de la intensa (efikeco-centra) ekspansio; sekve, oni devas bari la ekspansion; sekve, oni devas forte limigi la aĉetpovon; sekve, oni devas forte limigi la altigon de la lukroj. La reguligo de la lukroj esence okazas tiel, ke oni progresive kaj tre alte impostigas la lukro-altigon. (Por la unua kvarono de tiu ĉi jaro la registaro eĉ ĝenerale malpermesis – formale: „malproponis" – la altigon de la baza parto de la lukro.) La strikta lukro-reguligo praktike signifas tion, ke la entreprenaj gvidantoj povas nur tre malmulte diferencigi la lukrojn laŭ la laborprodukto. Nemirinde, ke la bonkvalitan laborforton facile kaj amase fortiras la et-entreprena, kooperativa kaj privata sferoj, kie la lukroj formiĝas pli libere. La ŝtataj entreprenoj apenaŭ havas rimedojn por instigi la laboristojn produkti laŭ siaj kapabloj. La reteno de la produktokapablo en la ŝtataj entreprenoj estas ĝenerala fenomeno.

La ekonomi-politikaj gvidantoj klopodis trovi ian solvon por mildigi la negativajn konsekvencojn de la strikta lukro-reguligo – sen malstriktigi ĝin. La eksperimento por fari tiun neeblon estas la sistemo de la en-entreprenaj ekonomiaj laborkomunumoj.

Antaŭ la apero de la en-entreprenaj ekonomiaj laborkomunumoj la tipa situacio aspektis jene: se la entrepreno bezonis (ja, ĝenerale bezonis) plian laborkapaciton, oni ne instigis (super iu limo) la laboristojn por labori pli intense aŭ labori kromhorojn, ĉar la pluse pagitaj lukroj (pagoj por kromhoroj aŭ supernorma produktado) estintus tre alte (kvazaŭ pune) impostitaj kaj la ekonomi-politikaj instancoj traktintus malbonvole la entreprenon. La entreprenoj, do, prefere uzis (ja, multe pli koste) la laborkapaciton de alia entrepreno, ĉar la mono pagita al alia entrepreno ne estas konsiderata kaj impostata kiel lukro. Aliflanke, la laboristoj kromlaboris en la privata sfero (ĉu leĝe, ĉu „grize", ĉu nigre, kaj tiel ili eskapis desub la lukroreguligo. Koncize: la laboristoj „eksportis" parton de sia laborkapacito ekster la entreprenon, kaj la entrepreno „importis" la laborkapaciton deekstere. La laboristoj estas motivitaj al intensa laboro ekster la entrepreno, sed en la entrepreno dum la „ĉefaj" laborhoroj multe malpli. Do, saĝa laboristo en la entrepreno produktas nur la decan minimumon kaj ŝparas la laborforton. La ideo de la en-entreprenaj ekonomiaj laborkomunumoj estis forigi la supreskizitan anomalion.

En 1982 oni enkondukis la formon de en-entreprena ekonomia laborkomunumo. *Memelektitaj* grupoj de dungitoj, apartenantaj al la sama entrepreno, povas peti de la gvidantaro licencon por funkcii kiel en-entreprena ekonomia laborkomunumo. La gvidantaro libere decidas pri la dono aŭ rifuzo de la licenco, kaj la entreprena regularo fiksas (limigas) la rajtojn de la ekonomiaj laborkomunumoj. Laŭ la leĝo la en-entreprenaj ekonomiaj laborkomunumoj povus agadi kiel veraj entreprenoj ofertantaj memstare siajn servojn ĉu al la propra entrepreno, ĉu eksteren, sed en la realo tiu eblo rare efektiviĝas. Plejofte la entreprenaj regularoj eĉ formale malpermesas al la laborkomunumoj fari servojn ekster la entrepreno. La laborkomunumoj malmulte iniciatas. Estas tipe, ke la entreprena gvidantaro mem decidas pri tio, kiuj taskoj, funkcioj plenumiĝu pere de laborkomunumoj. Finfine la entreprenoj estas kontentaj, ĉar la laborkomunumojn ili ne bezonas pripagi el la troŝarĝita rubriko de la lukroj, sed el la multe pli elasta rubriko de la „ĝeneralaj elspezoj", kaj ankaŭ la laboristoj estas kontentaj, ĉar ilia laboro kadre de la laborkomunumoj estas multe pli bone pagata ol tio farita dum la „ĉefa" labortempo (kiun la laborkomunumanoj, ja, plu faras je la kutimaj kondiĉoj). Jen la diferenco: por 100 forinta malneta produktado en la normala labortempo oni malnete enspezas 17 forintojn, enkadre de la laborkomunumoj 66 forintojn!! La diferenco inter la enspezoj po laborhoroj estas memkompreneble eĉ multe pli granda, ĉar en la laborkomunumoj oni laboras multe pli intense (ja, la enspezo dependas nur de la laborprodukto).

La plej grava rezulto de la laborkomunuma sistemo estas verŝajne tio, ke klare demonstriĝis, kiel malintense uziĝas la laborforto dum la „normala labortempo" kaj kiel multe povus intensigi la laboron la instigaj ekonomiaj kondiĉoj.

La en-entreprena ekonomia laborkomunumo povas esti utila kiel provizora formo survoje al pli libera kaj racia labormerkato, sed kiel longdaŭra solvo ĝi ne taŭgas. La enorma diferenco inter la prezoj de la laborforto en kaj ekster la laborkomunumoj tutcerte havas morale-socie detruajn efikojn, tio nature estas nenormala fenomeno, kaj vidpunkte de la socia justeco, kaj vidpunkte de la merkataj principoj. Aparteni al laborkomunumo, ja, estas privilegio, kaj la fonto de tiu privilegio estas la entreprenaj decid-farantoj. Estas memkompreneble, ke la batalo por tiu privilegio nutras la koruptadon. La situacio preskaŭ trude tentas al trompo: kalkuli la laboron faritan dum la ĉefa labortempo al la produkto de la laborkomunumo; „antaŭprepari" la laborkomunuman laboron dum la ĉefa labortempo; silente saboti la labortaskojn dum la ĉefa labortempo por ricevi ilin kadre de la laborkomunumo ktp. La laborkomunumo logas al senbrida sinekspluatado (ĉefe la junulojn sen loĝejo).

Ĉirkaŭe 5% de la salajruloj laboras en laborkomunumoj. Do, relative malgranda parto de la salajruloj havas eblecon levi la vivnivelon per laborkomunumado, sed la ekzisto de tiu parto, ja, sufiĉas por iriti la reston.

La laborkomunumoj ankaŭ ekonomipolitike kaŭzas problemojn, ĉar rilate la aĉetpovon estas tute egale, el kiu rubriko la aĉetanto ricevis sian monon. Aldone, la laborkomunuma sistemo instigas la entreprenojn al malŝparo pri la laborforto, ĉar ju pli da laborkomunumaj enspezoj ĝi certigas, des pli facile ĝi povas konservi siajn laboristojn.

Finfine, la problemoj ĉi-supre listigitaj gvidis al administraj, striktigaj paŝoj rilate la laborkomunumojn. Oni impostas pli kaj pli la enspezojn de la laborkomunumoj, kaj ankaŭ la elspezojn de la entreprenoj direktitajn al la laborkomunumoj. Antaŭnelonge oni faris la dekreton, laŭ kiu en 1987 neniu entrepreno rajtas pagi pli da mono al la laborkomunumoj el la rubriko de la ĝeneralaj elspezoj, ol ĝi pagis en 1986.

Tiuj decidoj estas bone kompreneblaj, tamen ili nutras ia timon, ke de la laborkomunuma formo oni paŝos ne antaŭen, sed retro.

BELARTAJ KONKURSOJ '87

La Belartaj Konkursoj de UEA devus esti la ĉefaj nutrantoj de la originala Esperanta literaturo, tamen, jam depost multaj jaroj ne estas tiel. Tute certe grave kontribuis al tiu bedaŭrinda situacio ankaŭ la fakto, ke la premiitaj verkoj nur tre sporade aperis en la Esperanta gazetaro, kaj estas tute nature, ke neniu aŭtoro volonte verkas por la propra tirkesto. Nun, dank' al interkonsento inter UEA kaj la Redakcio de Hungara Vivo, ĉiuj premiitaj verkoj de la ĉijaraj Konkursoj aperas/aperos en la nuna kaj la sekva numeroj de nia revuo. Ni supozas, ke estos utile legi la premiitajn verkojn kune, do ne dissemite en pluraj revuoj kaj kun signifa tempa intervalo.

Jen, malgranda statistiko pri la konkursaĵoj. En la branĉo *Prozo* alvenis 40 konkursaĵoj de 27 aŭtoroj el 14 landoj; en la branĉo *Poezio* 64 konkursaĵoj de 28 aŭtoroj el 13 landoj (inter tiuj 20 konkursaĵoj de 8 aŭtoroj el Bulgario, kaj 12 konkursaĵoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj; en la branĉo *Kanto* 6 konkursaĵoj de 5 aŭtoroj (aŭtor-paroj) el 4 landoj. en la branĉo *Eseo* por la Premio „Luigi Minnaja" konkursis 8 verkoj de 8 aŭtoroj el 5 landoj.

Nia Redakcio esperas, ke la premiitaj verkoj trovos plaĉon ĉe iom vasta parto de la legantaro. Tamen, fakte ni ne plene certas pri tio, kaj ĝuste la malcerteco instigis nin publikigi samnumere la interesan kaj certe pensigan eseon „Lingvoĉizistoj kaj splitkaptantoj" de Wojciech Uwaszkiewicz. Se la aperigitaj premiitaj verkoj vekus en iu la kuraĝon partopreni la venontjarajn Belartajn Konkursojn, la Esperanta literaturo povos nur gajni per tio. Por eventualaj konkursontoj ni represas ĉi tie kun iomaj kompletigoj la informan materialon pri BK, kiu cetere troveblas sur la p. 115 de la „Jarlibro 1987" de UEA.

Branĉo		*Titolo*	*Aŭtoro*	*(Lando)*
Prozo	Premio 1a egale:	*Laŭra*	Liven Dek	(Hispanio)
		Aŭstralio	Spomenka Štimec	(Jugoslavio)
	Premio 2a:	*La Garantiulo*	Sten Johansson	(Svedio)
	Premio 3a:	*La Ŝuldo*	Stefan MacGill	(Hungario)
	Honora mencio:	*Viveroj*	Velimir Piškorec	(Jugoslavio)
Poezio	Premio 1a:	*Fabelo pri skarlata floro*	Evgenij Belonenko	(Sovet-Unio)
	Premio 2a:	*Tukpinĉiloj*	Karoline Gilmore	(Britio)
	Premio 3a:	*Kaj mi mortis*	Gunnar Gällmo	(Svedio)
Teatraĵo	Premio 1a:	*ne aljuĝita*		
	Premio 2a:	*Ĉio estas en viaj manoj*	Ruth Culbert	(Usono)
	Premio 3a:	*Leciono pri 'ci'*	Bernard Golden	(Hungario)
	Honora mencio:	*Progreso*	Vesna Skaljer-Race	(Jugoslavio)
Kanto	Premio:	*Jubilea kanto por Esperanto*	Dimitr Terziev (muziko) kaj Simeon Simeonov (teksto)	(Bulgario)
Eseo	Premio Luigi Minnaja:	*Nia movado kaj ĝiaj kronikistoj*	Oldřich Kníchal	(Hungario)

Belartaj Konkursoj

p/a Neil Salvesen (sekre.), 32 Park Range, Victoria Park, Manchester, Britujo M14 5HQ.

La Belartaj Konkursoj de UEA celas evoluigi la artojn, en kaj pere de la Internacia Lingvo. Ili okazas en la Universalaj Kongresoj, sub aŭspicio de UEA. Rajtas konkursi ĉiu esperantisto.

BRANĈOJ: 1. Originala poezio; 2. Originala prozo; 3. Premio *Luigi Minnaja*, por eseo pli ampleksa; 4. Originala drameto; 5. Kanto; 6. Fotograf io; 7. Infana Literaturo.

PREMIOJ por branĉoj 1, 2, 4 kaj 6: unua 280 gld; dua 196 gld.; tria 112 gld.; Nova Talento 196 gld.

La nomo de la *Nova Talento* aperas sur la pokalo „Henry Harabagiu".

En la tria branĉo, *Premio Luigi Minnaja*, estas aljuĝata unu premio, kies valoro estas la jara rento de 4000 gld.

En la kvina branĉo estas aljuĝata unu premio de 280 gld., *Premio An-okin pri Kanto*. La sekvantaj kondiĉoj validas por tiu ĉi branĉo:

1. Teksto kaj melodio devas ambaŭ esti novaj kaj ankoraŭ ne publikigitaj;
2. Teksto kaj muziknotoj estu senditaj en po 4 ekzempleroj al la sekretario de la Belartaj Konkursoj kaj devas lin atingi plej malfrue la 31an de marto en la konkursa jaro;
4. La kanto premiita estu publike prezentita de kantisto aŭ ĥoro se eble en la koncerna UK, kaj en kazo de neeblo, en la postjara UK;
5. La premiitaj kantoj estu ankaŭ laŭeble presitaj tekste kaj muziknote en iu formo.

La branĉo *Infana Literaturo* proponas premion de 588 gld. al tiu eldonejo, kiu en la antaŭa jaro eldonis la plej elstaran infanlibron (vidu *Esperanto*, okt. 1981. p. 167).

REGULO: konkursaĵoj por la branĉoj 1-5 devas esti sendataj en po 4 ekzempleroj al la sekretario. Por la branĉo 5 oni sendu muziknotojn kun teksto. Tiuj konkursaĵoj alvenu ĝis la 31a de marto de la koncerna jaro. Laŭeble, oni aldonu 5 irk. por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Konkursaĵoj por branĉo 6 estu sendataj en unu ekzemplero al „Foto-konkurso", p/a la LKK de la koncerna Universala Kongreso, por alveni ĝis la 1a de julio.

Por branĉo 6, *Infana Literaturo*, oni sendu tri ekzemplerojn de la libro al la CO ĝis la 31a de marto.

La kompleta regularo de la Belartaj Konkursoj estas senpage ricevebla de la CO de UEA aŭ de la sekretario (adreso supre).

JUĜKOMISIONO: PREZ.: Vilmos Benczik, Hungarujo.

Konkursaj detaloj

Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo por kiu ŝi aŭ li konkursas. Unu persono povas partopreni per maksimume 3 verkoj en ĉiu literaturo branĉo.

POEZIO: Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

PROZO: Maksimuma longo de konkursaĵo 200x65 tajpospacoj. Tri premioj.

TEATRAĴO: Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj.

ESEO: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia prefere en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400x65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

INFANLIBRO DE LA JARO: Oni rajtas proponi ĉiujn infanlibrojn kiuj aperis dum la jaro 1987. originalajn kaj tradukitajn. Unu premio.

FOTOGRAFIO: Minimuma formato 13x18 cm. Fotoj povas esti nigrablankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Izolda Macskássy: Revo

Wojciech Usakiewicz

Lingvoĉizistoj kaj zplitkaptantoj

Ĉu ekzistas Esperanta literaturo?

Dangera demando. Tuj impetas propagandistoj kaj vicigas nomojn, titolojn, fakojn, kiujn koncernas esperantlingvaj libroj, suman nombron de la paĝoj. Eĉ la plej obstina dubemulo devus cedi frontante stakon da libroj.

Malgraŭ la objektiva pruvo pri la taŭgeco (vidu la stakon) oni ne nepre konvinkiĝas. Kvaliton de radioricevilo ne montras formo de kesto aŭ dumjara produktokvanto en la fabriko. Eblas do trankvile preteriri la libromonton ŝutitan sub la piedojn kaj demandi plu.

Kio estas literaturi?

Ĉi tiu demando ŝajnigas facilan respondon. Evidente preni skribilon kaj... ek! La ekintoj baldaŭ komencas kompreni la trompecon de ĉi tiu koncepto. La ceteruloj, kutimiĝinte ĉiutage uzi la lingvon, ofte preteratentas, ke ne ĉiu skribitaĵo estas literaturo laŭ la estetika vidpunkto.

Ni imagu ĉarpentiston. En lia metiejo troviĝas multaj lignotabuloj. Ili servas al diversaj celoj, kaj la ĉarpentisto diversgrade prilaboris ilin. Unuj estas nur rabotitaj, raspaj, aliaj pli sensplitaj, fajlitaj. La plej glatajn longe poluris smirga papero. Same homo, kiu ĉiutage laboras per lingvo, havas en sia metiejo diversgrade pretajn frazojn. Kelkajn el ili li prenis el la ĉiutaga parolo. Ili raspas kiel apenaŭ rabotita lignaĵo, pluras en ili superfluaj vortoj, noteblas eĉ gramatikaj eraroj. Aliaj devenas rekte el frazlibro: „Kiu vi estas? Mi estas Zamenhof. Tre agrable, sinjoro." Nur nemultaj glaceas kiel tiu de la povra Joseph Grand en „Pesto" de Camus.

Ĉiuj komparoj parte malĝustas. Ankaŭ la supra. Literaturo estus terure pompa kaj enuiga, se konsistigus ĝin nur la plej altstilaj frazoj indaj klasikismon. Tamen senduba estas la ekzisto de tri diversaj gradoj de frazoprilaboro: gramatika, sintaksa kaj literatura.

Gramatika korekteco ne nepre signifas sintaksan klarecon. Laŭ Zamenhof mi citu la faman „Favora Regnestro. Ĥoloro havas alkuŝiĝi..." Same la sintaksa klareco ne ĉiam sufiĉas por surparnasigi la tekston. Literaturecon oni povas atribui al teksto aŭ eldiro, kies kreinto plene regis la dirotaĵon, ne inverse. Ĉiun vorton, ĉiun frazon li skribis konscia pri la celo, al kiu ĝi servas, pri la efiko, kiun ĝi donas. Temas do pri la arto lerte kombini diversajn lingverojn, ofte „neliteraturajn" laŭ la supre menciita senco.

La problemo de la literatura lingvaĵo traktindas duoble – teorie kaj praktike. Unuakaze oni devas konsideri la latentan esprimpovon de Esperanto kompare kun la etnaj lingvoj. Alikaze valoras noti la percepton de esperantlingvaj literaturaj tekstoj ĉe esperantistoj mem.

Teorio ŝajnas pli simpla.

Fundamenta ilo de ĉiu literaturisto estas tropoj. Ekzistas neniu lingva malfacilaĵo en la konstruado de esperantlingvaj epitetoj, komparoj aŭ metaforoj. Sur ĉi tiu kampo la internacia lingvo same skulpteblas kiel la etnaj lingvoj. „Mi devas iam al Eŭropo/ por propraokule palpi/ kastelojn inter floroj kiel rokĝardenoj/ de tiu kontinento/ kie la glavo sin edzigis al la rozo" (*De Kock*) aŭ „kiam horizonte/ likva vespero ruĝe ekdisfluas" (*Nervi*) estas estetike samvaloraj konstruaĵoj al la nacilingvaj.

Kun la tropoj ligiĝas problemo nefacile solvebla, kiu tamen ekzistas ekster la lingva nivelo de la teksto. Mi pensas pri kulture kondiĉitaj asocioj vekataj de koncerna tropo. Simbola pano en „Ivaĉjo" de Baghy alion signifas por kristano, nekristano konanta kristanismon kaj homo tute ne aŭdinta pri kristanismo. Ĉi tiun spuron mi tamen lasas, ĉar ĝi kondukas al najbara ĝangalo.

Alia grava literatura fenomeno estas la stilo. Parolante pri ies stilo, do serĉante lingve karakterizajn ecojn de ies eldiroj ni vole-nevole referencas al modelo, kun kiu ni komparas la eldirojn. En ĉiu socio ekzistas pli-malpli unueca vidpunkto je korekteco/nekorekteco de difinitaj gramatikaj kaj sintaksaj kombinaĵoj. Je la plej malalta nivelo de „korekteco" funkcias la „diafana" stilo – maksimume seka, senbalasta, antaŭ ĉio informa, senigita je vortfiguroj. Tiu ĉi servas kiel modelo por komparoj. Ke ekzistas io tia ankaŭ en Esperanto, supozigas interalie la provo de Rossetti priskribi la stilojn de la plej konataj esperantaj verkistoj, kaj pluraj ekzistantaj parodioj kaj pastiĉoj. Leviĝas tamen la demando, kiagrade la „diafana" stilo en Esperanto estas sentata tutkomune. Ĉu, parolanto pri stilo de unuopuloj, ni ĉiuj emas pensi pri la sama modelo?

Kompreneble, sur kelkaj terenoj Esperanto ne egalpaŝas kun la etnaj lingvoj. Ni prezentu al ni situaciojn necesigantajn uzon de parola lingvaĵo kaj rimedojn ligitajn kun tio. Dialektigo, individuecigo de paroło, sakraĵoj, onomatopeoj, interjekcioj estas tasko ofte solvata nur dank' al granda inventemo de la aŭtoroj, sen verigo de la praktiko mem. Precipe malfacile estas arkaikigi tekston. Al kukulo! Multajn jarcentojn ni ankoraŭ atendos efektivan maturiĝon sur ĉi tiuj kampoj.

Nu, ni havas ankaŭ privilegiojn. La flekseblecо de Esperanto supozeble superas ĉiujn etnajn lingvojn. Oni povas relative libere kunmeti vortojn kaj vorterojn, atingante tre interesajn rezultojn. Ekzemple, tute natura esperante „petolpalpebri pompetaĵojn" (*Ragnarsson*) kaŭzas grandajn malfacilaĵojn kaj ne subiĝas al laŭvorta pola traduko kun samtempa konservo de la esprimnatureco.

Oni do eble povas vidi teorian aserton pri samgranda, kvankam ne sama, lingva esprimpovo de Esperanto kompare kun la etnaj lingvoj. Ni imagu, ke la pesteleroj kun avantaĝoj kaj mankoj proksimume ekvilibrigas unu la alian.

Aŭtoro do literaturas kun teorie samvaloraj eblo kiel etnolingvanoj doni estetikan ĝuon al la legontoj. Ĉu tamen lingvaj latentoj de Esperanto kaj – ligite kun tio – la vasta eblo peri signifojn efektive estas aferoj, pri kiuj atentas legantoj? Mi prenis du jarkolektojn de „Esperanto". Antaŭ nelonge la redakcio prezentis foton de „postulata meza esperantist(in)o" (kiu cetere pli bezonas la kapablon trafe propagandi ol tiun legi), tial mi supozis, ke ankaŭ literaturaj recenzoj el „Esperanto" spegulas la mezan staton de la konscio de nia komunumo. La suba analizeto prezentas miajn impresojn post la lego de 51 recenzoj pri originala kaj tradukita beletro. Neniel ĝi pretendas al scienceco.

Mi trovas en la recenzoj kelkajn frazojn tre interesaj, ĉar ripetiĝantaj. Ili helpas respondi la demandon, kiel oni perceptas la lingvaĵon de la esperantlingva literaturo.

„La traduko estas en bona Esperanto". Ĉi tiu frazo pruvas la ekziston de konvinko, ke ĝuste la „diafana" stilo estas tiu, kiun oni devas atingi per esperantlingvaj literaturaĵoj. Implice ĝi montras ankaŭ alion. Se recenzisto substrekas la bonecon de la lingvaĵo, kredeble sufiĉe ofte noteblas la malo. Sekve ekzistas kiel fenomeno, iom vastaskale, libroj opiniataj malbonaj sintakse aŭ gramatike. Tio, laŭ mia opinio, fontas ne nur el la kelkfoja manko ĉe la verkanto aŭ la eldonanto, sed ankaŭ la neunueca sentado pri la „diafana" stilo en Esperanto.

„La lingvaĵo (...) ne estas por komencantoj". Jen alia karakterizaĵo. La relative malgranda allog-forto de nia movado kaŭzas, ke ni tre koketas ĉi tiun grupon de niaj kolegoj, el kiu signifa parto eĉ ne havos okazon kabeiĝi, forlasante la verdajn

vicojn tro fruc. La volo fariĝi pli multnombra okupas nian komunumon tiagrade, ke recenzanto, kiu supozeble ankaŭ instruas Esperanton, sentas la neceson aparte konsideri ĉi tiun tavolon de la eble-legontoj kaj komplezi al ili per la klara konsilo legi aŭ ne. Ankaŭ ĉi tiu sinteno havas implicaĵojn. Ĝi montras... nekredemon pri la efektiva kultura allogeco de Esperanto. Enestas en ĝi la kaŝita apriora premiso, ke lernanto preferos profundigi la lingvo-konon per lingve primitiva rakontesko ol per „Hamleto", kiu ja povas esti tre interesa en nekonata lingvo laŭ lerna vidpunkto. Per tia frazo recenzisto traktas la libron kiel instruilon, ne kiel estetikan objekton. Samtempe li kredas, ke pli simpla estas pli instrua.

„La lingvaĵo ja fluas, sed stumblas, kiam necesas traduki ne vortojn, sed lingvouzon." Jen konfirmo de la supozo pri la malfacilo krei viv-ŝajnigan lingvon por ĉiutagaj situacioj. Plua komentado superfluas.

Ŝajnas do, ke la legantoj emegas trakti la esperantan literaturon je la unua (gramatika) kaj dua (sintaksa) niveloj. Je 51 recenzoj, kiujn mi legis, en 21 aperas rimarkoj koncerne gramatikan korektecon, neologismojn aŭ preseraroj (ĝustajn aŭ ne, negrave). La pintatingaĵo troviĝas tamen ne en la recenzoj, sed en reklamo: „Zorgaj kritikaj recenzoj permesas aserti jam, ke la verko (...) enhavas neniun malregulaĵon aŭ eraron en la vortfarado, la konjugacio, la komparacio kaj la posesivo, la partoj esencaj de la lingvo, kio verŝajne estas tute senprecedenca en la Esperanta literaturo." Kun plena estimo por la tradukinto (kies verkon mi cetere ne vidis) mi konstatas, ke ĉi tiu reklamo de literaturaĵo imagigas la esperantistojn pli gramatikemaj ol efektive. Estus interese provi similan reklamon etnolingve...

Dum momento mi revenu al la preseraroj. Krom montri, ke recenzistoj ne kredas je mia kapablo korekte kompreni kuntekstan „etsas", multaj mencioj pri ili supozigas oftecon. Kion tio signifus? Certe mankon de kompetentaj preskorektistoj (eventuale neeblon pagi al ili). Sed... eble ankaŭ mankon de virtualaj legantoj kaj sekve malaltajn postulojn rilate la eldon-nivelon.

Krom legantoj en Literaturo svarmas verkistoj kaj tradukistoj. Valoras rigardi nian problemon ankaŭ de ilia flanko. Ni rememoru „Kiel akvo de l'rivero". Schwartz, akorde kun sia lingvoĵongla ŝato, enkondukis vortludulon en la romanon. Ĉiujn ties spritaĵojn li zorge antaŭkomentas, timante, ke sen klarigo la leganto ne komprenos, el kio konsistas la ŝerco. Kvazaŭ oni rakontus humuraĵon komencante per la ĉefero. La samon oni povas observi ĉe Valano en „Ĉu vi kuiras ĉine?" „Tipe sanktavalan prononcon" kaj kripligojn de „korekta" Esperanto, kiujn ĝi kaŭzas, li preskaŭ ĉiufoje emfazas per komento, kelkfoje aldonante ampleksan priparolon de la principoj misformi. Kompreneble, Valano verkludas. Tamen, estante sperta lingvoinstruanto kaj aŭtoro de ĉi-celaj literaturaĵoj, li supozeble konsideras ankaŭ la efektivan komprenkapablon de la virtuala leganto. Tial li preferas ne riski. Ke temas vere pri risko, tion pruvas pretervole Jerzy Grum, la tradukinto de Jaroslaw Iwaszkiewicz. En la rakonto „Kvarteto de Mendelssohn" ĉefheroas maljuna juda violonĉelisto. Originale li uzas la polan lingvon plena je jidaĵoj. Grum konsekvence misformis la esperantajn eldirojn, provante imagigi al la legontoj jidecan Esperanton. Tamen, interparolante kun legintoj de la libro, mi rimarkis plendojn kontraŭ la multegaj preseraroj, precipe en la rakonto „Kvarteto de Mendelssohn" (kie pluraj „jidaĵoj" konsistis ekzemple en manka aŭ troa akuzativa „n").

Mi ne forgesu pri mem. Mi preteratentis la proprajn reagojn je kelkaj literaturaĵoj. Okazas, ke tute spontane mi volas korekti frazon akorde kun mia lingva plaĉo, kvankam ĝi estas senerara. (Tion sentas ankaŭ la redaktoro. – La red.) Tion mi neniam spertas legante pollingvajn librojn. Ankaŭ pri ili mi ne ĉiam kontentas. Mi ofte konstatas, ke mi ne ĝuas stilon aŭ rakontmanieron. Sed mi ja ne emas korekti. Mi simple flankenmetas.

Post teoria optimismo mi komencis dangere proksimiĝi al praktike pesimismaj konkludoj. Bonŝance la kazo de Piĉ helpas returni sur ĉi tiu vojo. „La litomiŝla tombejo", unu el la estetike plej maturaj literaturaĵoj en Esperanto, donas multajn kialojn diskuti ankaŭ pri la lingva tavolo de la verko. Provokas al tio la aŭtoro mem, provizinte la libron per trionromane ampleksa eseo, klariganta sian sintenon al la literatura lingvaĵo en Esperanto. Tamen... la respondo al ĉi tiu provoko evidentiĝis tre kompetenta. Neniu el la tri recenzintoj, kies tekstojn mi vidis (K. Long, J. Régulo Pérez, O. Buller) strebas izoli la lingvan tavolon por fari el ĝi celplaton por siaj kanonoj. Male, ĉiuj pritraktas la verkon multaspekte, prezentante interesajn, freŝajn ideojn. Nur la „etikedo" el la librokatalogo de UEA montras, ke la gluinto estis iom konfuzita, ĉar li difinis la verkon „forme eksperimenta, lingve ekstravaganca".

Ni sinceru antaŭ ni mem. La literaturo ankoraŭ ne funkcias en la konscio de la esperantistaro kiel estetika valoro. Ni ĝis nun ne tre bone scias, kiuj frazoj estas „korektaj". Tiu ĉi scio necesas ne nur objektive, sed ankaŭ subjektive, por ke ni sentu nin pli certaj pri la esprimpovo de la lingvo. Al la fenomenoj ligitaj kun la lingvo mem aldoniĝas problemoj kulturaj, kiujn mi ĉi tie nur aludetis. Ili ankaŭ malhelpas la alprenon de estetika sinteno rilate nian literaturon.

Kaj kio okazas ĉe niaj lingvoĉarpentistoj? Ili persiste rabotas, fajlas, poluras. Ni ankoraŭ ne tre bone scias, kiel aspektas la konstru-materialo, ni okupiĝas pri la kaptado de splitoj. Sed... sub la iloj de la plej lertaj ĉizistoj jam aperas veraj artaĵoj. Kaj kreas ilin homoj vivantaj nun, sed apartenantaj al la estonteco.

(Represita el la n-ro 1987/2 de Opus Nigrum)



János Káldy: Kaŝtanfolioj

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

Originala prozo, unua premio

Spomenka Štimec

AŬSTRALIO

Aŭstralio luliĝis sur la mapo en blua makulo el maro. Ĝi estis flava en la mezo, kun malhelaj makuloj ĉirkaŭe, kvazaŭ misformita primordita mielkuko. Pri ĝi oni sekretumis. Al mia avino ĝi rilatis. Plurajn jarojn mi bezonis por kunmeti la detalojn.

Mia avo posedis vilaĝan vendejon. Li ricevis ĝin de sia patro okaze de junuliĝo. La patro, por diri la veron, estis nur lia duonpatro, la dua edzo de lia patrino. Sed lia amo sufiĉis por du patroj: la filojn de la edzino li ŝategis. La ŝato ne estis ordinara: ĉe la elkresko ĉiu el la infanoj ricevis po vendejeton. Por ekgustumi la vivon.

La avo ekŝatis la ideon kaj li serioze eklaboris. Li havis fidindan helpon: mia avino estis entreprenema dudekjara vidvino kiam li petis ŝian manon. Ŝi ŝatis lin kaj la vendejon.

La avo nokte vindis iun tukon surkape por ke lia hararo retenu la ŝatatan aspekton. La avino lernis dormi apud la kaptukumita viro. Tage li dandis elegante malantaŭ la vendeja tablo. La klientoj rigardis al lia kravato dum ili mendis hundoĉenojn.

La pli juna frato ne estis dandema. Liaj bubaĵoj ŝanĝiĝis al friponaĵoj. La donacita vendejo ne volis funkcii per si mem. Male, lasita al si mem, ĝi malfunkciis kaj baldaŭ ĝi estis fordibočita. La patro malkontente skuis la kapon. Ve, tiu uleto ne montriĝas tro lerta! Sed oni devas doni ŝancon al gejunuloj. Li malfermis la monujon. La enhavo ne sufiĉis, do, li vendis periferian parton de la bieno por havigi al la junulo novan vendejon. Li trovis ĝin en iu ALIA vilaĝo. La juna posedanto estis lerta en dibočado kaj post iom da tempo li sukcesis fordibočI ankaŭ tiun ĉi donacon. El la vendejaj posedaĵoj konserviĝis nur buterujo el ĉeña porcelano.

Nu, nenio estis perfekta. La alia frato rivelis modelon de la sukceso. Li baldaŭ havigis ŝarĝaŭton, la unuan en la regiono. Liaj ĉemizoj dimanĉe neĝe puris sub la kolo. La frizaĵo restis la sama. Pro la kaptuka sekreto.

Al la juna frato la patro, iom trista post la forvendo de vitejoj kaj herbejoj, aĉetis trinkejon ĉe la vilaĝa stacidomo. La ideo ne montriĝis la plej ruza investo: multaj eniris por fortrinki glaseton. Glaseto post glaseto ne transformiĝis al profito. Post la ruiniĝo eĉ ne unu porcelana buterujo konserviĝis ĉi-foje. La fea patro, por savi la aferon, pretis vendi sian lastan ĝardenpecon.

Intertempe la sorto jam ekhontis pro la troa flatado de la pli aĝa filo kaj ĝi decidis al li prezenti etan turnon. La bonŝanca vilaĝa vendisto intertempe, dum la frato tri fojojn ruiniĝis, pesis tri siajn filojn. Ĉiujare unu nova nuduleto fotiĝis sur la luksa kovrilo el ŝafa pelto.

La turniĝo okazis ĉe la stratturniĝo: la ŝarĝaŭto surveturis iun vilaĝanon. Ĉu la avo tro trinkis tiutage? Ĉu la rapideco? Neniu faris esplorojn. Estis la jaro 1928. La stratpolicistoj bezonis ankoraŭ kelkajn jardekojn por organiziĝi.

Ĉu la vilaĝano mortis? Neniu plu memoras. Necesis pagi altajn sumojn al la familio de la suferinto. kaj la sumo enmordis la bonfarton de la vendejo.

En la trinkejo iu vespere menciis Aŭstralion. Ĝi sonis fabele ĉe la glaso da ruĝa acida vino. La provoko ne lasis lin senfara. La necesaj paperoj baldaŭ pretiĝis. Iuvespere li blove estingis la petrolan lampon en la kuirejo. Io ekpikis lin ĉe la koro. Li sentis, ke la edzino nur ŝajnigas dormon. Ŝia kapo peze kuŝis sur la dika kuseno el anseraj plumoj.

Matene li firme ŝovis la piedojn en la ciritajn ŝuojn kaj nodinte la kravaton, ekiris al Aŭstralio.

La plej aĝa filo, la kvarjara, ludis ĉe la amboso, kiam li venis kisi lin. Kiam la patro foriris, la etulo daŭrigis bati per sia eta martelo la amboson kaj ne plu turnis la kapon.

Elmigri al Aŭstralio egalis al malapero.

Estis kvar da ili el la sama vilaĝo.

Ŝajnis, ke la vojaĝo daŭris pli longe ol la preparoj.

Aŭstralio.

Oficisto grimpis sur la ŝipon kaj komencis legi la nomojn de la enlasotaj enmigrintoj el sia listo.

Iom post iom la ŝipo malpleniĝis. Ĉiuj jam eliris, restis nur la kvaropo. Iliaj nomoj ne estis vokataj.

La oficisto ankoraŭ foje relegis la nomojn restintajn. Kvankam la nomoj estis nekonataj, ili decidis riski. Okazu kio okazu! Ne plu eblas reiri.

Heziteme la unua etendis sian dokumenton. La oficisto forstrekis lin de sia listo. La dua, kuraĝigita, faris same. Montriĝis ke la oficisto ĉiujn akceptis. Li rekonis ĉiujn nomojn sur sia papero.

La unua leciono ŝajne estis sen amaro: Ivan neniam plu estos Ivan. Por faciligi la ekziston, ĉiu el ili rapide lernis la novan fuŝprononcon de sia nomo. Por ŝajnigi malpli stranga.

Ekserĉo de iu samlandano, laboristo en fama bierejo. La kontaktpersono per kiu pordoj devus malfermiĝi.

Unue necesis trovi la ĝustan aŭtobuson kaj ekiri, per muta gorĝo. Sur la papero estis kunpremita la nomo de la bierfarejo.

La vojaĝo apenaŭ komenciĝis. Subite, jen ĝi: sur granda tabulo pendis la luksa nomo kiun ili serĉis. Ĉiuj literoj de la ĉifita papero ĉeestis en ĝi. Ili gaje eliris el la aŭtobuso. La ĝojo baldaŭ elvaporiĝis. La tabulo staris meze de nenio, soleca reklamilo de la koncerna bierejo.

Necesis ekserĉi novan aŭtobuson, novan vojon.

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

Originala prozo, unua premio

Liven Dek

LAŬRA

Mi nomiĝas Tristan, kaj naskiĝis en la Marsa kolonio Pandora, sed tio ja malmulte gravas. Mi povus aldoni, ke mi estas normala viro simila al la plejmulto, sed mi mensogus, almenaŭ parte, ĉar vere mi apartenas al speciala vir-speco. Nu, kiel klarigi... la sekso, vi ja scias, la ardo, la potenco, la eksterordinaraj dimensioj kaj la alloga aspekto de mia... ho, diable, kiel diri... tiu parto de la korpo, kiu... kiu, ehe, nu, certe vi komprenas, ĉu? Resume, mi povus eŭfemisme diri, ke mi estas viro tre bone dotita de la naturo.

Jam en la lernejo la knabinoj svarmis ĉirkaŭ mi kiel tineoj ĉirkaŭ lampo, aŭ muŝoj ĉirkaŭ poto da mielo. Poste, en la universitataj jaroj, mian liton frekventis de la plej precioza lindulino ĝis la lasta kelnerino de la universitata restoracio. Jes, kion fari, mi apartenas al tiu speco de viro, kiu frenezigas la virinojn. Tamen, mi devas senprokraste aldoni, por ke neniu miskomprenu, ke miaj eksterordinaraj ecoj, vaste kaj efike pruvitaj ĉe la virinoj, neniam kaj neniel igis min konduti kiel fiera kreteno.

Mia lasta „predo", Laŭra, estis skulptinda brunulino naskiĝinta sur Tero, kvankam ŝi aspektis kiel reenkarniĝo de Venuso, kun profunde nigraj okuloj kies fajra rigardo kapablus fandi, en la daŭro de palpebrumo, la tutan nordan poluson kaj eĉ parton de la suda. Ho, ŝiaj mamoj! Ha, ŝiaj kruroj! Uf, ŝia... Dioj de la tuta galaksio, kia ŝvitado! Nu, armita per tiaspeca arsenalo, la fragila „predo", kompreneble, kaptis la senskrupulan ĉasiston. Do, nun venas la vico al mi humile konfesi, ke mi enamiĝis al ŝi, tiel, ke mi plene, senrezerve, dediĉis al ŝi mian tutan „talenton", kaj post jaro da arda pasio senlima, dum kiu ni forkonsumis pli da energio ol cento da atom-eksplodoj, finfine mi konvinkis ŝin pri la konveneco geedziĝi. Aldonendas tamen, ke antaŭe ni devis alveni al interkonsento, kies precipa klaŭzo estis strikta malpermeso generi infanojn, almenaŭ dum la unuaj kvin jaroj de nia geedza vivo, ĉar, kvankam mi tre amas bebojn, Laŭra tute ne ŝatas ilin. Fakte, vi ne povas imagi ĝis kia grado, la ideo naski ŝin naŭzas. Cetere, mi konjektas, ke ŝi abomenas „deformi sian korpon", eĉ se nur dum naŭ monatoj.

Alvenis la tago fiksita por la pompa ceremonio, kaj jen mi, la ora fraŭlo, estis ŝafe kondukita antaŭ la geedziĝan ekzekutiston. „Estas nekredeble" ekkriis duonplore amaso el miaj admirantinoj. „Kia perdo" amare rimarkigis alia grupo, sed mi ne ribelis, kaj kiam venis la

---

Misharmonio kiu kreskis dum la vojaĝo, ĉesis. Dialekto cementigis la ligojn. Ĝi estis la sola hejmo kiun ili posedis.

Duonjarcenton poste dum miaj vojaĝoj, survojaj noktiĝoj maltrankviligas min. Mi volas esti hejme dum tiu tagparto, fermi la pordon. Atendi, ke la mallumo enpaku ĉirkaŭajn aĵojn. Lumigi.

La penso pri la vaganta avo serĉas la varmon de la kuseno. Tie, for de la plumoj el la dotaj litaĵoj, aventuroj ne mankis. Por ricevi laboron, li devis formeti la kravaton.

Arbofaligisto. Ĉasisto de sovaĝaj ĉevaloj. Sparko da esperoj, noktoj sen eliroj. Maldungo. Li ne bone distingis inter la sovaĝaj kaj la malsovaĝigitaj ĉevaloj. Puno. Forpelo. Piediro.

Eluziĝis la hejmecaj botoj sur la vojoj de Aŭstralio. Riĉiĝo neniam. Fortuno eskapis, forgalopante kiel la sovaĝa ĉevalo, nedomebla.

Nokte, ĉe eta lumo, zumis hejmregiona kanto. De ĝiaj versoj kreskis ombroj. Nigro kaptis la gorĝon.

En liaj sonĝoj odoris la Izabel-vinbero de la hejmporda vito.

Kiam la avino en sia vendejo rimarkis la poŝtiston, ŝi tuj sciis. Mane ŝi pesis la leteron. Kiam el la koverto elfalis iuj paperoj, ŝi senkomprene gapis al ili. La teksto ĉion klarigis.

„Kaj mi atendas, ke vi venu!"

La frazo oblikve grimpis tra la letero.

Post la legado la gajo ne lumigis ŝian vizaĝon.

Dum krepusko ŝi vekiĝis ĉiutage. Susuris ŝiaj subjupoj tra mallumo de la aŭroro, dum ŝi ŝprucigis malvarman akvon sur sian haŭton. Servistinoj al ŝi neniam estis sufiĉe obeemaj.

Lerta kaj eltenema ŝi jam restarigis la vendejon. Bankroto aliformiĝis profito.

Dum la sekundoj antaŭ ol droni en la dormon ŝi revokis la ciferojn de la bonhavo. Ŝi nombris la ĉemizojn pendantajn en la deponejo, la botojn vendotajn, serpojn, falĉilojn. Ŝiaj pesiloj pesis sukeron, pesis najlojn.

Ŝi resendis la biletojn al Aŭstralio.

Ĉu ŝi skribis ion aldone per sia larĝa manskribo?

La biletojn ŝi al neniu menciis.

Devojiĝi de la vendejo ŝi ne volis. Pro nenio, des malpli pro iuj biletoj el Aŭstralio.

Sur la alia flanko de la terglobo la avo ofendiĝis. Li disŝiris la paperojn, frapis per la pordo kaj eliris. La malobeemon li ne toleris. Li kraĉis malestime. Kio lin pli akre surprizis? La resenditaj biletoj aŭ la restarigita vendejo? Ekscii pri la unua ne permesis al li ĝoji pri la dua.

Silento ekpontis inter Aŭstralio kaj la hejmo.

Mi etpaŝe eniris la avinan ĉambron.

Sur la muro bruna foto iom makulita per muŝoj.

– Kiajn okulojn havis la avo?

– La viajn – oni respondas simple.

Mi palpebrumas por fermi la okulojn de la avo.

Ĉe la enirpordo la vivo grimpe pulsas en la malnova vito.

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

momento diri „jes", mi prononcis la ritan vorton kun firma kaj klara voĉo, solene, sen timo. Laŭra, male, tute ne kapablis eldiri la diablan vorteton kaj, anstataŭe, ŝi apenaŭ povis flustre balbuti al mi ion similan al: „Pardonu, kara, mi amas alian", kaj la perfida vulpino trotis for al la brakoj de sia nova amanto.

Dum kelkaj turmentaj tagoj mi amare priploris la neripareblan perdon de ŝia amo, ĝis iun tagon, pere de privata detektivo dungita de mi por la okazo, mi sciiĝis pri la identeco de la fripono, kiu ŝin delogis. Unuavide, laŭ la holo-fotoj alportitaj de la ŝpurhundo, la kanajlo aspektis bela, nu, tre bela se paroli sincere. Temis pri viro alta, fortika, preskaŭ atleta, kun longa hararo bruna kaj okuloj karbe nigraj. Nu, por ne tro longigi la aferon, sufiĉu diri, ke, unu post alia, la kompetenta detektivo diligente respondis la longan repertuaron de miaj demandoj, alportante al mi, kun ĉiu nova sciigo, plian ŝoketon. Sed, la finofara, la definitiva bato trafis min plene iom poste, okaze de vere rivela respondo al insida demando pri la monrimedoj de la dando. De la komenco mi suspektis, ke la lindulo apartenas al fabele riĉa familio, kaj nur pro tio Laŭra sekvas lin kiel fidela hundino, dancante ĉe la tintado de liaj moneroj, do kun amo flamanta al sako sonanta. Tamen, la respondo estis ne nur negativa, sed ankaŭ pike surpriza, ĉar... ŝi eĉ pagis por li!

Fulmo trakuris mian kapon, kaj mi definitive komprenis. Malbenon! li estis unu el tiuj aĉaj beluloj aĉeteblaj per konsiderinda sumo da kreditoj, moderna sklavo preta plenumi ajnan servon, la plej elstara atingo de nia rafinita civilizacio, la plej granda sukceso, la perlo de la ĉiopova Neŭtraks K-o: ĝia androido 583.UL, vira serio. „La plej kompleta gamo de plezuroj, je la servo de la kliento".

Glosoj:

Androido: artefarita homo, sintezita el organika substanco.
Holo-foto: tridimensia foto, ricevita per holografia procedo.
Kredito: mon-unuo vaste uzata en sf-verkoj.

Originala prozo, honora mencio

Velimir Piškorec

VIVEROJ

al Simone

Decembras.

Nervoj strečitaj pro ĉiutaga zumzumado trianguleca: studenta hejmo – tramstacio – universitato.

Enĉambriĝente. Kunĉambrulo denove neglektis ordigi sian litotukon.

Lavejo. Lavujoj ornamitaj per reto da buklaj haroj kaj verdeflavaj kračaĵoj. Radiatoro ne ripareblas. Cambro-flegistino larĝokula. Kantanta. Bovino blekanta.

Semajnofino. Finfine. Denove hejme... Nebulo. Familia vespermanĝo. Denove nebulo.

– Kiam mi estis je via aĝo, mi ja perlaboris por mi mem... Ĉu vi konscias kiom ni rezignas pro vi?

Momente glaciiĝis ondoeĥo tamtama.

Lunda frumateno. Finfine. Trajno. La trajno tremadas tra enue trankviliga ebenaĵo. La urbego. Denovas. Ĉio denovas. Ĉio terure malnova kaj denova.

Iluzioj eluziĝas. Kiel ĉemizoj eluzitaj, kiujn oni tamen ne ĉesas surhavi malgraŭ defrotitaj kolum- kaj manikrandoj. Eĉ kiam oni fine decidiĝas aĉeti novan ĉemizon, la malnovan oni ordeme demetas en vestaĵoŝrankon, kvazaŭ ĝi estus trezorejo.

Atendante tramon postprelege. Geamikoj.
Ĉu koncepto miskomprenata?
Ĉu vi ŝatas Handke?

Pasante la urbetan parkon. Frosto. Kaŝtanarboj. Kulisoj senmovaj. Ni amikas. Ni amikumas. Ni umas. Ni kvazaŭumas. Ni evidente tre longe konatas. Tiu tempolongo nature sufiĉis por kuraĝigi nin reciproke vunddadi. Pafadi el egaj pafiloj. Disĉiri ĉelojn. Distranĉeti kromosomojn. Frakasi molekulojn. Senŝeligi atomojn. Por spertigi nin kvazaŭe.

Repasante la urbetan parkon. Frosto. Kaŝtanarboj. Kulisoj senmovaj. Kiel iam la romantiko varmigas la koron. Neĝo falanta, neĝeroj floretas...

– Ĝis kiam vi permesatas resti?...
– Ĝis la deka... (Turnhorloĝo batbatantas – kiel iliaj koroj.)

– Restu ankoraŭ iomete...
– Mi ne rajtas!...
– Restu, mi petas... (Kaj la vortoj perdiĝis en vintra vento.)
La neĝo kovris ŝian hararbendon.
Ni fakte serĉis ĝin sekvontan printempon. Aero odoris je siringoj. La hararbendo ne plu aperis.

Vicatendante en la studenta manĝejo.
Ili ĉiam ploras – ĉu lasataj, ĉu lasantaj.
Mezepoka muzeo. Larmujoj. Diverskoloraj, etaj konfuziĝis surpritiaj.

Mordetante ungojn ĉe tajpmaŝino.
Vortoj similas homojn.
Ambaŭ kvazaŭkomprenataj. Asimptotoj de sia ekzisto.

Gapante la kalendaron. Mi forvojaĝos.

Rigardante sin en la busa spegulo. Tamen bonas esti dum kelkaj tagoj kun preskaŭ konataj personoj. Tiel pro tempomanko oni ne povas pretigi vundilojn. Kutime, ĝuste antaŭ la milianonco, ĉio disiĝas.

Trinkante kafon dum vintroferia posttagmezo.

Preskaŭa ampoemo

Unue mi malvarmumis.
Tuj poste ŝi same ekumis.
Tiam ni kune kunumis.
Sed – ŝi jam amindumis.

Ponto super Rejno.
Vortoj ofte superfluas. Fluas supren...

Razante min.
Se oni povus vojaĝi tratempe, sufiĉus vojaĝi futuren por trovi sian verkon, kiu iame devis esti verkota.
Irante laŭ la urbeta ĉefstrato dum neĝas. Kelkaj frazoj sonorbatetas en la oreloj.
Ĉu elfuturaj?

Januaras.

PANORAMO

Vigla parlamenta kunsido

Inter la 16a kaj 19a de septembro kunsidis la Hungara Parlamento, kaj ĝi pritraktis la novan programon de la registaro, kaj ankaŭ la novan leĝon pri impostoj. La diskuto estis nekompareble pli vigla ol dum la pli fruaj kunsidoj, ja en la nuna tempo Hungario alfrontas seriozan ekonomian kaj socian krizon. La deputitoj vaste emfazis la respondecon de la registaro en la malboniĝo de la ekonomiaj pozicioj de Hungario, kaj substrekis la neceson senmalhelpe disvolvi la ekonomian reformon.

Sur nia foto: la financminsitro Péter Medgyessy prezentas la leĝproponon pri impostoj al la deputitoj.

Vizito el najbara lando

Fine de aŭgusto faris unutagan viziton en Budapeŝto Lubomir *Strougal*, la ĉefministro de Ĉeĥoslovakio, laŭ la invito de Károly *Grósz*, hungara ĉefministro. La diverskampa kunlaborado inter Hungario kaj Ĉeĥoslovakio estas tre intensa, kiel decas al najbaraj landoj, kaj la nuna vizito signife kontribuis al la profundigo de la interrilatoj. Sendube la vizito donis okazon ankaŭ por establo de personaj kontaktoj de la du registarĉefoj, ja estas konate, ke Károly *Grósz* okupis la hungaran ĉefministran seĝon ĉijare en julio.

Sur nia foto: Károly *Grósz* (maldekstre) salutas sian gaston en la flughaveno de Budapeŝto.

PANORAMO

Turismo furoris

Turismo furoris ĉisomere en Hungario, kaj tio faris tre gravan kontribuon ankaŭ al la konservo de la internacia financa ekvilibro de Hungario. La ĉefa celo de la eksterlandaj turistoj estas daŭre la lago Balatono. Specifa establaĵo de la apud-Balatona turismo estas la Klubo Tihany, kie oni certigas kondiĉojn de okcident-Eŭropa nivelo por la eksterlandaj ripozantoj. Klubo Tihany estas konstruita de akcia societo aŭstra-dana-hungara, kaj ĝi montriĝis tre rentabilitata investo.

Sur nia foto: la ripozdomoj de Klubo Tihany.

Aventuremaj hungaroj

La fama heroo de la konata Verne-romano, Willy *Fog* ĉirkaŭveturis la mondon dum 80 tagoj: du aventuremaj hungaroj, Nándor *Fa* kaj József *Gál* plenumis tion dum du jaroj, tamen per propramane fabrikita ŝipo, kiun ili baptis „Sankta Jupato". Ni konscias, ke tiu plenumo ne estas io nekutima por civitanoj de landoj kun vastaj maristaj tradicioj, sed hungaroj la unuan fojon sukcesis pri tio. Tial estas kompreneble, ke la aventuron de la du bravaj viroj atente sekvis la vasta publiko en Hungario.

Sur nia foto: la ŝipo „Sankta Jupato", ekspoziciita en la Budapeŝta Internacia Foiro.

Paĝo de komencantoj

János Sárközi

Kredu al la alia!

Jam de-longe mi *korespondas*[1] kun jun-ulo. Mi ek-konis lin, poste ni inter-amik-iĝis en iu Esperanto-kun-veno. Li ofte petis de mil konsilon en – al li – mal-facilaj aferoj. Li tre ĝojis, kiam li povis bon-igi ion per mia helpo, kaj ankaŭ mi estis feliĉa, kiam mi povis helpi al li.

Foje mi ricevis de li leteron, en kiu li rakontis aferon, kiu estis tre mal-bona al li. Jam antaŭ jaroj li ek-konis knab-inon, kiu estis tre afabla, kaj tre ofte ili korespond-adis. La knab-ino vivis en alia lando. Ili jam volis re-vidi unu la alian. En letero ili skribis la tempon kaj la lokon, ke en la lando de la knab-ino kiam kaj kie ili renkont-iĝos.

Ĉar tiu lando estis mal-proksima, la knabo devis veturi pli ol unu tagon. Kiam li proksim-iĝis al la loko de la renkonto, jam de malproksime li ek-vidis la knab-inon. Ŝi parol-adis kun juna milit-isto. Ili parol-adis tre afable, tre feliĉe, eĉ pren-adis la manon unu de la alia.

La knabo haltis, longe nur rigardis ilin, kaj far-iĝis tre mal-feliĉa. Estas certe, ke tiu estas la knab-ino kun kiu li volis renkont-iĝi; sed ankaŭ tio estas certa, ke inter la knab-ino kaj la milit-isto estas proksima afero.

La knabo nur staris, rigardis ilin mal-feliĉe. Kion fari? Post tiu afero li iru tien? Li komprenis nenion. Li turnis sin, kaj kun mal-facila koro for-iris kaj re-veturis hejmen.

Tion skribis al mi mia juna amiko, kaj demandis, ke post tio kion li faru. Mi respondis, ke li faru nenion, nur skribu al mi la *adreson*[2] de la knabino.

Por klar-igi la aferon mi skribis al la knab-ino. Tuj ŝi respondis. Ŝi skribis, ke ŝi tute ne komprenas kial la knabo ne al-venis, ja ili estis proksimaj, bonaj amikoj. Ŝi ne scias kio okazis al li. La milit-isto, kun kiu ŝi parol-adis, estas ŝia frato, kun kiu tute ne-atend-ite ŝi renkont-iĝis en tiu urbo!

La leteron de la knab-ino mi sendis al la knabo.

Post kvin semajnoj ili kune *vizitis*[3] min, kaj mi vidis, ke ili estas tre feliĉaj. Ankaŭ mi ĝojis, ke tion ili povas danki ankaŭ al mi; ja oni diras, ke ĉio estas bona, se la fino estas bona!

1. *Korespondi: sendi leterojn unu al la alia*
2. *Adreso: nomo de la loko, kien devas iri la letero*
3. *Viziti: iri ien, por re-vidi iun*

János Sárközi

Deziro, kiu ŝanĝ-iĝis

Estis jam mal-frua vespero. Ŝi veturis hejmen per la lasta *metroo*[1]. En la vagono estis nur kelkaj personoj, sed sufiĉaj por tio, ke ŝi ne devu timi. Tamen en ĉiu stacio kelkaj for-iris, restis nur mal-pli da homoj, kaj ŝi devis veturi ĝis la lasta halt-ejo. Proksime al tiu ŝi loĝis. Mal-ofte ŝi veturis hejmen tiel mal-frue, sed nun en la lern-ejo okazis longa prezent-ado de iu historio; apenaŭ ŝi povis atingi la lastan metroon. Fine ili restis nur tri: ŝi, mez-aĝa, forta vir-ino, kaj viro, kiu ŝajnis esti 25-30 jara. Li estis mezalta, havis simplan, puran veston, kvankam ne novan; li povis esti labor-isto aŭ ofic-isto. Lia vizaĝo estis nek agrabla, nek mal-agrabla. Unu el la multaj homoj, precipe ne interesa. Li ŝajnis ne danĝera, tamen trankvil-igis ŝin la ĉe-esto de la alia virino. Ŝi forte deziris, ke ankaŭ ŝi veturu ĝis la fina stacio. Sed ŝia deziro ne real-iĝis. Ŝi for-iris en la sekva halt-ejo. Ili restis du, ŝi kaj la fremda viro. Kaj ankoraŭ tri stacioj estis ĝis la lasta halt-ejo. Ili ne sidis proksime unu al la alia, estis inter ili longeco de ĉirkaŭ dek *metroj*[2].

Forte ŝi pens-adis, kion ŝi faru, se la viro venos al ŝi, kaj al-parolos ŝin, aŭ volos fari ion. Ŝi komencis ege timi. Antaŭ kelkaj tagoj ŝi legis, ke iu viro per forto dev-igis vir-inojn „ami" lin. Kiu povas scii, eble ĝuste li estas tiu? Estas terure eĉ pensi pri tio.

Kaj la viro ek-staris, kaj ek-iris al ŝi. Ŝi tim-egis, deziris kaŝi sin ien, sed kien? Ŝi nur premis sin sur la benko. Ŝi faris tiel, kvazaŭ ŝi ne rimarkus la proksim-iĝon de la viro.

La viro haltis antaŭ ŝi, kaj amike salutis ŝin:

– Bonan vesperon; kara fraŭl-ino, ĉu vi scias, ĉu la aŭtobuso n-ro 98 ir-adas ankoraŭ tiel mal-frue?

Lia voĉo estis tre agrabla, liaj okuloj kuraĝ-ige brilis. La tim-ego de la knab-ino dum momento for-flugis. Kun afabla rideto ŝi respondis:

– Jes, la lasta ek-iros post dek minutoj.

– Mi tre dankas al vi fraŭl-ino – li respondis afable; iom klinis sin, poste re-iris al la loko, kie antaŭe li sidis. Pro la rapida for-iro de la viro la knab-ino sentis sin mal-kontenta. Kial li for-iris? Kial li ne restis ĉi tie? Kial li ne komencis parol-adi?

Ĉu mi estas tiel mal-bela, ke ni ne povis veki en li interes-iĝon? Tio ne estas vera. Mi bone scias, ke mi ne estas bel-ulino, tamen la viroj rimarkas min. Kial li for-lasis min tiel rapide? Ja mi respondis lian demandon kun amik-eca rid-eto.

Ŝi jam pensis ĉion mal-bonan pri tiu sen-kulpa viro. Ŝi ne rigardis al li, kaj preskaŭ jam mal-amis lin.

En la fin-halt-ejo la viro antaŭ la for-iro afable kap-salutis ŝin. Sed ŝi faris tiel, kvazaŭ ŝi ne rimarkus tion, kolere, rapide ŝi for-kuris tra la alia pordo.

1. *Metroo: sub-tera vagon-aro.*
2. *metro: unuo por longo-mezuro.*

REVUO DE REVUOJ

Popolo ni estas, jes, siajn kulturon, kaj tradicion volonte fleganta, konscia popolo de la Lingvo Internacia Esperanto ni estas. Meze de la jubilea jaro tiu konstato jam plene evidentiĝas. Timemuloj ne devas eviti tiun fakton. Tra la E-gazetaro oni vidas reaperigon de multaj dokumentoj, artikoloj kaj fotoj el nia pionira pasinto, inkline al la bravaj tradicioj. Kvankam ne freŝe malkovritaj, sed pli-malpli konataj, tiuj ree legataj eroj de la frua epoko jen vibrigas la koron, jen vekas novajn pensojn por la novaj cirkonstancoj.

En la ampleksa festa numero de ESPERANTO, nia centra kaj plej prestiĝa organo, eminentaj kontribuantoj sintezas – dece al la momento – la vojon trairitan dum centjaro. Ili ankaŭ analizas profunde fosante niajn sulkojn. Oni ja devas trafe trovi la vojon celitan! Jen, vere festa, valora kolektaĵo de movadaj rimarkoj kaj atentigoj.

El ili mi devas nepre mencii tiun de la multmerita *Régulo Pérez*, nur supraĵe rigardeblan negrava. Venis jam temp' por akiri ordon en nia skriblingvo, kaj ortografian unuecon en la presaĵoj. Tiel ĉesos la malkonsekvencoj, la formaj disecoj en la tekstoj presitaj, pri interpunkcio, majuskligo, mallongigoj k.a. Nia revuo tiurilate sekvas la principojn hereditajn de LITERATURA MONDO de *Kalocsay*, do volonte ni subtenas la proponon: stabiligi tiuterene la ordon pere de serioza diskuto kaj posta reguligo flanke de nia Akademio.

En nia literatura lingvo estas pilastro la grandioza verko de Zamenhof, la traduko de la Malnova Testamento. Oni eldonis ĝin en Londono, longe post lia morto, kaj ties tute ne simplan historion nun laŭetape konigas Angelo *Duranti* (ESPERO KATOLIKA, 7.). Laŭ leteroj de Zamenhof videblas, ke en la jaro 1892 (en la „kvina jaro"!) li jam meditis pri tiu ega laboro, kiun pli poste li komencis plenumi. Pasis tamen longaj jaroj ĝis 1906, de kiam li sinsekve publikigis partojn el ŝiaj Bibliaj tradukaĵoj en kelkaj revuoj. Por traduki la tutan, li neimageble multe kaj sindone laboris, fakte ĝis la fino de sia vivo. Lia manuskripto kuŝas nun en kvar volumoj sur la bretoj de la arkivo de Brita E-Asocio.

La tria mondo bezonas E-on, kaj precipe en la scienco – vokas juna brazila scienculo en intervjuo (TEJO-TUTMONDE, 3.). Kvankam en Latinameriko ne ekzistas vera interlingva problemo, por la amasa klerigo, por la sciencoj necesas facila ne-nacia lingvo! Tia, kiu ne influas politike-socie por ia fremda kulturo. Ne senkaŭze li akcentas, ke la registaroj ne konsideras E-on dangera al la ŝtata sekureco, kaj tio estus favora. Aliflanke, montriĝas tre malavantaĝa ia „vortara kaosiĝo" de Eo, amaso da „tutnenecesaj vortoj", provataj de verkistoj, kiuj emas forgesi pri la ĉefa rolo de Eo: pri la internacia komunikado. Neglektiĝas dume la racia vortoderivado – plendas la brazila aktivulo. Ĉu senbaze?

Kvazaŭ eĥo venas la lingvistike bone fundita artikolo de *Herbert Mayer* (LITERATURA FOIRO, 104.) kontraŭ iuj dangeraj naturalismaj tendencoj. Sub falsa ŝildo de Kalocsay kelkaj ekuzas fremdajn, latinecajn vortojn anstataŭante korekte derivitajn, kaj siajn tekstojn superflue „dificiligas" (normale: malfaciligas). Ĉu „dificito" de Eo estus ŝtopenda? Tiamaniere certe ne. Sed avenkaj ebur-turaj noviguloj aperis ofte en la literaturhistorio de la nacioj. La niaj, bonŝance, ne sukcesis elizoliĝi, eĉ ne al la faka literaturo, krom esceptaj okazoj. Kion *W. Prent* trovas atakinda, prave (THE WORKER ESPERANTIST, 353.), estas la foje troa emo al Uson-anglaj esprimoj. Bela ekzemplo estas „scienca parko" (areo por ennovigaj metiejoj) per sia slogana bombasteco. Tamen, pri nekomprenitaj fakaj aferoj, internaciaj (ekster E-iaj) kalkulmetodoj, nefakuloj evitu kompromitiĝon. Citaĵoj el PIV ne decidos pri tiuj... Okaze de dubo preferindas konsulti fakulojn. Sekve, la fakaj revuoj, inter ili la elstara, larĝtemara FOKUSO, faros laŭcele, se singarde ampleksigante la terminaron, samtempe ebligos al sia publiko diskuton – rubrikon – pri ĝi, sen prestiĝgardo. Kaj oni pensu ankaŭ pri la ne-Eŭropanoj...

Se jam menciiĝis, en Fokuso (2.) mi trovis aparte interesaj la artikolserion pri la robotoj, kaj la multe esperigan intervjuon pri „psiko-onkologio". Tamen laiko ne priskribu ilin nun; sed la utilon por mi, legi antaŭ vintro la avertojn pri la birdonutrado mi ne prisilentas, ja apuddome eble mi iom sengarde faris ĝis nun.

Mi prenas la ĉapelon (ne desur la literoj) antaŭ la serioze kleriga enhavo kaj senriproĉa stilo de KONTAKTO (103.), kies temoj nun ĉirkaŭis la indianojn. Apud tiuj *Amri Wandel*, verkinta pri la fenomeno supernovo, vere majstre disvolvis la komplikajn fizikajn procezojn en maniero tre komprenebla al ajna leganto. Senhezite mi prijuĝas lian artikolon *modela*, kiun utile studu ajna-branĉaj verkantoj (hm, veraj kantoj por la plezure legantoj!). Kompreneble, komplikajn aferojn ne nur la naturo kaj la tekniko prezentas. La miksita lingva situacio de Bjalistoko estas reala nuno en Orienteŭropo – eldiris *Spomenka Štimec* en Koreio, kaj la nefacile desegneblan bildon pri la popoloj, lingvoj kaj E-movadoj de tiuj landoj ŝi sukcesis per larĝaj tuĉpenikaj konturoj brave-klare desegni antaŭ Malproksim-Orientaj aŭskultantoj (LA ESPERO, 3.).

Ervin *Fenyvesi*

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

Originala poezio, unua premio

Evgenij Belonenko

FABELO PRI SKARLATA FLORO

En iu lando vivis iam
Belega princo Iohan'.
Kaj jen ekamis li Sofian,
Princinon de najbara land'.
Ŝi estis bela, saĝa, bona.
Ŝi estis rara junulin'.
Al li per sia voĉ' belsona
Ŝi diris: „Jes, mi amas vin."
Li flamis: „Ĝu la edzino!"
Respondo estis: „Bone, sed
Komence al la mondolimo
Veturu vi kaj laŭ la pet'
Skarlatan Floron vi alportu.
Ĝi kreskas en Magia Val'."
„Mi faros!" – ektrumpetis vortoj
Dum kuris li al la ĉeval'.

Al bird' estinte la rivalo,
Li venis al la lim' de l' mond',
Sed vojon en Magian Valon
Obstine baris granda mont'.
Ĝi estis, ve, netrairebla.
Netransireblis ĝia dors'.
Rigardo agla estus febla
Ekvidi finon de l' monttors',
Sed ĉe la mond' videblis homo,
Kiu formovi provis ĝin.
Princ' Iohan' pri lia nomo
Kaj okupiĝ' demandis lin.
„Mi estas fil' de kamparano.
Min oni nomas Nikola'."
„Bonege, – diris Iohano –
Sed kion vi faraĉas ja?"
„Mi volas flankenmovi l' monton
Kaj fari rektan vojon en
Magian Valon, ke volontoj
Vizitu ĝin sen ajna ĝen'."
„Revulo!" – ridis princo nia –
„Ĉu estas do alia voj'?"

„Jes, siro, estas la alia,
Sed tamen ĝi laŭ dia vol'
Tri jarojn daŭras." „Ah, diablo!" –
Ekmalĝojiĝis Iohan'.
„Permesu diri. – Kun afablo
Parolis l' juna kamparan': –
Duope ni la monton grandan
Formovus pli rapide." „Ne,
Min flor' atendas kaj l' amanta
Belegulin'. Mi hastas tre."
Kaj rajdis Iohan' en foron,
Ĉirkaŭ la granda monto al
Skarlata dezirata floro,
Kreskanta en Magia Val'.

Dum tri jarpasoj princo nia,
Kun pens' pri sia fianĉin'
Impetis tre al Val' Magia.
Finfine li atingis ĝin.
Jen aŭdas Iohan' akordojn
De iu admirinda harp'
La vento tuŝas brančojn-kordojn,
Kaj sonas dolĉe sorĉa arb'.
Ĉi tie lerte l' vento pentras
Ornamon ĉarman per arom':
Purpuras roz', konval' arĝentas,
Viol' vualas, verdas pom'.
La vento trovas riman paron
En ondobruo de la mar'.
Kaj en susur' de foliaro
Sur altaj kronoj de poplar'.
„Mi nomus valon ĉi magian...
Jes, Regno de Belarta Vent'" –
Kaj l' princo iĝis tuj ebria
Pro sia propra elokvent'.
Do, ĉie, ĉie li komencis
La floron serĉi. En la fin'
Feličon sian li eksensis,
Preninte per la mano ĝin.
„Skarlata tripetala floro!" –
Jubilis princo Iohan'.
Sed la montegon en ĉi horo
Formovis l' juna kamparan'.
Ĝi estis malfacila movo.
Elspiris li post la labor',
Kaj de la spiro forta blovo
Petalojn širis de la flor'.
Disflugis tiuj ĉi petaloj
Al orient', al okcident',
Al norda parto de la valo
En „Regno de Belarta Vent'".
Kaj veran kaŭzon ne sciante,
La princo falis al la ter'.
Jen silentante, jen kriante
Li veršis larmojn en desper'.
„Ho ve al mi! Ho ve! Malico
De mia sorto! Povra mi!"
Tamen stariĝis nia princo
Jam decidinte tion ĉi:
„Mi trovu de la flor' petalojn
Kaj montru al Sofia. Jen,
Videbla estu mia pen'
Kaj peno de la vent'-vandalo."
Li denovigis la serĉadon.
Veturo jam lacigis lin.
Sed ĉe la fino de la pado
Herbej' montriĝis kaj knabin'.
Sur herbo sidas ŝi kaj kombas
L' orecajn harojn. Ho, belec'!
Laŭ ŝiaj ŝultroj ili ondas
Kaj logas, logas al kares'.
Aliras nia princ' kaj vidas:
Sur ŝia lipo kun langvor'
Skarlatas kaj vokante ridas
Petalo de l' konata flor'.
„Belino, – Iohan' parolas –
Kiu vi estas?" „Mi – fein',
Kaj vi?" „Mi – tiu, kiu volas
Petalon jenan. Donu ĝin."
„Junulo, mi nenion donas.
Se volas vi, do, prenu mem,
Sed nur per kis' " – la voĉo sonas.
Li kisis ŝin kun dolĉa trem'.

Reposedante la petalon,
Plurajdis li kun ĝoja sent'
Laŭ vastoj de Magia Valo,
En „Regno de Belarta Vent' ".
Renkontis li subite tendon.
Ĝi lune blankis inter nokt',
Kaj, certe, l' princ' eksentis tenton
Alproksimiĝi al la lok'.
Eniras li... Kaj kion vidas?
Knabin' kušetas en langvor',
Kaj sur la lip' vokante ridas
Dua petalo de la flor'.
Ŝiaj noktecaj haroj ondas,
Kaskadas laŭ la ŝultra soj'.
Arom' de rozoj ĉirkaŭfontas.
Plezuras la tapiŝa mol'.
„Belino, – Iohan' parolas –
Kiu vi estas?" „Mi – fein'.
Kaj vi?" „Mi – tiu, kiu volas
Petalon jenan. Donu ĝin."
„Junulo, mi nenion donas.
Se volas vi, do, prenu mem,
Sed nur per kis' " – la voĉo sonas.
Kaj li ŝin kisis sur kusen'.

Reposedante la petalon,
Plurajdis li de tiu tend'
Laŭ vastoj de Magia Valo
En „Regno de Belarta Vent' ".

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

Trapasas tagoj. Johano
Konstante estas en la voj'.
Jen li ekvidis el lontano
Surkampajn stakojn de la fojn'.
Li alveturis. Junulino
Sur unu stako dormis, kaj
La haroj je kolor' de lino
Estis la plejaj en la fajn'.
Sur ŝia lipo elegante
Petal' bezona dum maten'
Ripozis, kaj la princ' kisante
Ĝin rabis for sen ajna ĝen'.
Kaj jam feliĉe la ĉevalon
Returnis Johano por
Revena voj'. Magia Valo
Postrestis. Ĝojis princa kor'.

Tri jaroj pasis, tri monatoj.
Li venis al la fianĉin'.
Sofia diris: „Ho, amato,
Dumlonge mi ne vidis vin.
Ĉu vi alportis mian floron?
Nu, kie estas la floret'?'
„Mi plukis ĝin, sed en ĉi horo
Venteg' ekblovis. Jen – la pret'.
Disblovis la venteg' la partojn.
Mi longe ilin serĉis – do,
Kolektis mi, sed mankas arto
Kunigi jenon." „Ve, hero'!
Komencis la princin' belsone –
La floron ja bezonis mi,
Sed ne petalojn. Klare? Krome,
Trivita estas ĉio ĉi!
Ne iĝos mi edzino via."
„Sed penis mi..." – ekis la princ'.
„Adiaŭ" – finis ŝi.

Kapriculino! – kun malic'
Tiele pensis Johano
Dum la reveno al la hejm'.
Sed la konatan kamparanon
La princ' renkontis sur herbej'.
„Hej, kamparan'!" „Sir'! Bonan tagon!'
„Nu, ĉu formovis l' monton vi?'
„Formovis." „Ha! Vi nur imagu!
Kial vi sidas tie ĉi?'
„Por aŭdi de Naturo nia
Multsonan fluon de rakont':
Per la flugiloj papiliaj
Ĝi elokventas al la mond'."
„Revulo!" – Johano diris,
Suspiris kaj galopis for.

Jen la fabel' al fin' aliris,
Fabelo pri Skarlata Flor'.
„Ĉu jam la fin'?" – veršajne frazos
La scivolemaj tuj al mi –
Sed diru, kio ja okazos
Al Nikolao, al Sofi?'
Nu, certe, dirindaĵo plia,
Sed dume tio ĉi – sekret'.
Vi, tamen, el fabel' alia
Ĝin baldaŭ scios laŭ la pet'.

Originala poezio, dua premio

Karoline Gilmore

Tukpinĉiloj

La korbon plenan ŝi ekprenas
per svingo surkapigas, tenas, kaj
leĝerpiede subenkuras laŭ
ŝtuparo grizbetona. Estras majo.

Ŝi vigle marŝas spinrektega
laŭ arka trairej' ombrega, jam
subitas suna lum' kontraste kaj
la jupo ŝvela brilruĝiĝas flame.
Maljunulinon ŝi ne vidas
nek ties eksubridon aŭdas, sed
en kort' komuna interbloka, per
eksving' la vergplektaĵon metas teren.

La ruĝaj manoj nun laboras;
tolaĵpureco bonodoras; jen
rondbraka, flekstalia, la virin'
vestetojn kaj vestegojn prenas pene
pendigas per la tukpinĉiloj
blanklignaj, manfaritaj iloj de l'
ciganoj aĉetitaj, almozul-
okulaj, tie ĉe la pordoj, ŝtele.

Samtempas butikumaj planoj.
Ne helpas pensi: ĉu ciganoj ja
povrulas same kiel ni ali-
aj? Ĉu povrecon kaŝi pli lojalas?
Balancas jam malplenan korbon
la junedzin'; alkuras domon; ne
konscias, ke blankharulino el
la klarobskuro gvatas ironie.

La pezan korbon ŝi ekprenas;
per svingo surkoksigas, tenas; jen
ŝi subengrimpas zorgpiede laŭ
grizeca ŝtupkrutaĵo. Septembras plene.

Laŭ arka trairej' ombrega
ŝi marŝas svinge spinrektega, gracie
replatiĝis ŝia ventro, ŝi
sin fleksas beltalie, senbalaste.
Per kalaj manoj, ostaj brakoj,
robote ŝi pendigas aĵojn, eĉ
ne pripensante; butikumon planas:
nur terpomojn, „Nur terpomojn!" eĥas.

Fabrikfaritaj lignaj iloj
risorton etan enhavantoj, kie
nun la tukpinĉiloj de l' cigan'?
Formigris ili, la ciganoj, ien.
Neniu diras, kelkaj nias,
ne 'scias', tamen oni miras pri l'
nescio, ĉar ĉiame, ĉiujare
ili venis. Kien migras ili?

Malnovaj vestoj, nigraj, grizaj,
malsekaj kakiaĵoj pezaj, per
leĝera vento alprenitaj, lante
ondas kaj sekiĝas freŝaere.
La puraj aĵoj sin vualas.
Novembra suno brume palas; ne
retroen vidas ŝi, nek scias, ke
sulkhaŭtulin' nebula sekvas nepre.
Ŝi sidas en la ĉambro ombra
sulkhaŭtulin' en vesto sombra, ŝi
kutimas vidi en la korton, ĉar
plezuroj ŝiaj jam multnombras tie.

Okuloj senkolorigitaj
meditas aĵojn pendigitajn, per
pinĉiloj plastaj multkoloraj; nun
la junulino de mien' ŝajnfera
kun cigared' en buŝ' laboras;
ĉu ŝin ne vidas, ĉu ignoras? nur
malpezaj multkoloritaĵoj, el
superbazaro, vante floras plure.

La junulino nun forpaŝas.
Ombrega trairej' ŝin kaŝas; klar-
memore platigita brusto, kaj
senkamigita vang' helasas larme;
forgesitaĵoj sin malkaŝas svarme.

Originala poezio, tria premio

Gunnar Gällmo

* * *

kaj mi mortis
kaj mi kuŝis kaŭre
tuj apud la vitra muro
konstruita de vi
ĉirkaŭ via koro

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

Originala teatraĵo, dua premio

Ruth Culbert

ĈIO ESTAS EN VIAJ MANOJ

(Scienca-fikcia Esperanta teatraĵo pri Paco kaj Espero en unu akto)

Rosalio, la Ambasadorino de Espero kaj Paco tra la tuta Universo, vizitas la grandan planedon Komputejaro en Spaco. Tie ĉi, ŝi konsentas kaj aprobas la programon de la Tera Komputilo ĉe la impona planedo Komputejaro. La programo estas por du esperantistoj el la Tero. Dum la Esperanta Jubilea Jaro sur Tero, la Animo de D-ro Zamenhof tiras Karlon kaj Katerinon al Komputejaro kie estas ĉie komputiloj. Sur la planedo Komputejaro, la spacaj Esperantaj vojaĝantoj serĉos Esperon por Paco sur la Tero.

La unua parto de la programo klarigas drame ke nun estas nukleaj, mortigaj bomboj ĉie sur la surfaco de Tero. La rakonto de „Belulino kaj la Besto" montras ke la maniero atingi Pacon sur la tera Mondo estas ke la popolo devos pardoni ĉiujn kaj forgesi ĉion.

Ĉar en la programo la Tera Komputilo ŝanĝis Karlon al la Besto, Katerinon al Belulino, Simbolon Unu al Arturo kaj Simbolon Tri al Vilĉjo, la Teraj Vizitantoj opinias feliĉe kaj forte ke la potenca Tera Komputilo ankaŭ povos ŝanĝi la korojn de Teranoj kaj fine estos Paco sur la Tero.

Rosalio klarigas al Karlo kaj Katerino ke la vera kialo por la ekzisto de la saĝa Tera Komputilo sur Komputejaro estus protekti aliajn planedojn apud la Tero se estos granda nuklea eksplodo kaj la Tero mortigos sin.

Rosalio indikas forte ke la loĝantoj de la Tero devas ŝanĝi siajn korojn kaj vivi kiel fratoj kaj fratinoj aŭ ili mortos kune kiel stultuloj.

Fine, Karlo kaj Katerino komprenas ke per Esperanto kaj la kredo de D-ro Zamenhof Paco kaj Amo povos aperi ĉie sur la Tera Mondo.

LA GEAKTOROJ EN LA ORDO DE SIAJ APEROJ

ROSALIO	Ambasadorino de Espero kaj Paco
KARLO	Esperanta spaca vojaĝanto
KATERINO	Esperanta spaca vojaĝantino
SIMBOLO UNU	Plej potenca Monda Ĉefo
SIMBOLO DU	Alia potenca Monda Ĉefo
SIMBOLO TRI	Alia potenca Monda Ĉefo
VILĈJO	Frato de Belulino kaj la filo de Arturo
BELULINO	Ĉarma, juna Esperantistino
ARTURO	Esperantisto, la patro de Belulino kaj Vilĉjo
BESTO	Juna Princo kun kapo de besto

PRI LA GEAKTOROJ KAJ ILIAJ DIVERSAJ ROLOJ

ROSALIO: *Kvankam ŝi estas maljuna, Rosalio havas junan manieron. Pro ŝia klereco kaj gracia movado ŝi sajnas esti la perfekta Ambasadorino de Espero kaj Paco.*

KARLO: *Li estas juna, inteligenta, serioza Esperanta spaca vojaĝanto. Kiel Karlo, li portas simplan blankan robon kun verda stelo. Kiel la Besto li portas princan kostumon kaj sur sia vizaĝo bestan maskon. La princa vesto estas sub la blanka robo. Karlo du fojojn en la teatraĵo devas meti kaj demeti la blankan robon. La Besto ne uzas la verdan stelon. Sed sub la blanka benko estas falsa spegulo kiun li uzas drame.*

KATERINO: *Ŝi estas juna Esperanta spaca vojaĝantino. Ŝia kostumo similas la blankan robon de Karlo. Kiel Katerino ŝi portas verdan stelon kaj kiel Belulino portas la saman verdan stelon. Sub ŝia robo estas ĉarmaj kamparaj vestoj. Ŝi devas meti kaj demeti rapide la blankan robon.*

SIMBOLO UNU: *Li portas elegantan kostumon kun alta ĉapelo. En lia dekstra mano estas granda falsa pafilo. Kiel Arturo, li portas kamparajn vestojn kaj sur lia vizaĝo estas dikaj okulvitroj. Arturo havas ĉirkaŭ sia kolo Esperantan stelon. Kiam li eniras, en la dekstra mano estas ruĝa rozo. Pendante de la maldekstra ŝultro estas sako. En la sako estas sandviĉo.*

SIMBOLO DU: *Li estas juna soldato. Lia ĉapelo indikas tion klare. En la dekstra mano estas malimpona pafilo. Kiel Vilĉjo, li ne portas ĉapelon. Kaj anstataŭ pafilo en la dekstra mano estas impresa fajfilo kiun li uzas ofte.*

SIMBOLO TRI: *Ankaŭ li estas juna soldato, kaj lia ĉapelo indikas klare ke li ne estas en la sama armeo kun Simbolo Du. Li portas en la dekstra mano malgrandan falsan pafilon.*

NOTO: Estas ses geaktoroj entute, sed kvar el la grupo havas po ĉiu du rolojn. Karlo estas ankaŭ la Besto; Katerino estas ankaŭ Belulino; Simbolo Unu estas ankaŭ Arturo; Simbolo Du estas ankaŭ Vilĉjo.

Estas la planedo Komputejaro en Spaco. La malantaŭa parto de la scenejo estas tute nigra muro kun multe da arĝentaj steloj. Dramaj lumoj supre donas la impreson ke ĉie estas komputiloj. Peco de mebloj estas en la centro. Ĝi estas blanka benko sufiĉe granda por tri personoj. La maldekstra enirejo estas por: Rosalio, Karlo, Katerino, Belulino kaj la Besto. La dekstra enirejo estas por: Simbolo Unu, Simbolo Du, Simbolo Tri, Vilĉjo kaj Arturo.

Mistera muziko kaj dramaj lumoj ĉie antaŭas dum du aŭ tri minutoj la aperon de Rosalio. La muziko ĉesas kiam Rosalio eniras. Ŝi parolas kun multe da entuziasmo rekte al la aŭdantaro.

ROSALIO: Karaj esperantistoj, ĉar estas la Esperanta Jubilea Jaro ĉe la Tero, la Animo de via kara D-ro Zamenhof tiros al la planedo Komputejaro du Esperantajn spacajn vojaĝantojn. Mi, Rosalio, la Ambasadorino de Espero kaj Paco tra la tuta Universo, konsentis pri la plano ke baldaŭ Karlo kaj Katerino el la planedo, kie D-ro Zamenhof naskiĝis, vizitos la grandan planedon en Spaco, Komputejaron. (*Rosalio iras al la blanka benko kaj rigardas supren.*) La impona Tera Komputilo estas fininta programon por Karlo kaj Katerino. La titolo de la programo estas ĈIO ESTAS EN VIAJ MANOJ. La spirito de D-ro Zamenhof estas tre evidenta ĉie en la programo de la Tera Komputilo. La unua parto klarigas kial sur Tero ĉie estas nukleaj, mortigaj bomboj. La celo de la dua parto, la rakonto de „Belulino kaj la Besto", montras la manieron kiel homoj sur la planedo Tero povos atingi Amon kaj Pacon. La vivo de D-ro Zamenhof influis multe ĈIO ESTAS EN VIAJ MANOJ.

ROSALIO: *(Ŝi parolas al la spektantoj feliĉe kaj entuziasme.)* Nun mi invitas vin ĝui kaj partopreni kun mi sur la planedo Komputejaro la grandan aventuron de Katerino kaj Karlo.

Kiam Rosalio komencas foriri maldekstre, Karlo, kiu estas estas enveninta per la maldekstra enirejo, estas dekstre de Rosalio kiam ŝi mencias drame lian nomon.

KARLO: (*Li iras dekstren apud la spektantoj kaj parolas konvinke.*) La Tera Lasero subite metis min sur Komputejaron. Ĝi estas la plej granda, la plej potenca planedo en la Universo. Vidu! Estas komputiloj ĉie! *(Li saltas sur la blankan benkon: rigardas supren.)* Katerino, rigardu la mirigan komputilon! *(Li subite rimarkas ke Katerino ne estas apud li. Li saltas sur la plankon kaj iras en la direkto de la*

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

spektantoj kaj donas la impreson ke li parolas en spaco.) Katerino, venu al la planedo Komputejaro. Mi bezonas vian helpon. Venu nun!

KATERINO: *(Ŝi aperas tra la maldekstra enirejo. Ŝi promenas tre silente. Ludante fingre Katerino pušas la dorson de Karlo. Ŝi iomete timigas lin kaj li turniĝas rapide. Ridante kaj feliče.)* Mi volas speciale dum la Esperanta Jubilea Jaro esti kun mia Esperanta amiko. Kaj, jen mi estas!

KARLO: *(Li prenas šiajn manojn.)* Brave, kara Katerino.

KATERINO: Karlo, la Potenco de la Tera Lasero vere estas granda miraklo, ču ne?

KARLO: Jen estas la pruvo. Mi kaj vi estas če la planedo Komputejaro por serči esperon por Paco sur nia Tero. Venu! *(Ambaŭ saltas sur la benkon kaj rigardas supren.)*

KATERINO: Jes. Jes. Kaj mi povas ankaŭ vidi klare la grandan anoncon TERA KOMPUTILO. Karlo, kial, kial estas tera komputilo če la planedo Komputejaro?

KARLO: Mi ne estas certa, sed ču vi povas ankaŭ vidi la fantomajn lumojn kaj manojn?

KATERINO: *(Flustrante)* Jes! Jes!

KARLO: La komputilo pri nia Tero: mi opinias ke ĝia programo estos por vi kaj mi. Mi preskaŭ povas aŭdi la teran komputilon. *(Karlo flustras drame mistere.)* Silentu! Aŭskultu! Mi subite sentas forte la spiriton de D-ro Zamenhof čirkaŭ mi kaj vi. Ĝi diras: Vidu! Pensu! Lernu pri Espero por Paco sur la Tero! *(Karlo prenas la manon de Katerino.)* Ni devos trovi bonan lokon kie ni povos vidi ĉion. *(Karlo kaj Katerino eksidas sur la benko apud la malantaŭa muro. Poste ili malaperas kviete šanĝi vestojn.)*

SIMBOLO UNU: *(Per la štupo malantaŭ la benko li ekstaras sur la benko. Per sia dekstra mano li svingas fiere grandan pafilon.)* Mi, Simbolo Unu, estas la plej grava čefo en la mondo kaj mi diras al vi: „Jen estas la solvo por eterna Paco sur nia Tero – la mortigaj bomboj!"

SIMBOLO DU: *(Li aperas rapide če la maldekstra flanko de Simbolo Unu. Li riverencas profunde.)* Simbolo Unu, mia potenca amiko, mi salutas vin. *(Li iras rekte al Simbolo Unu.)* Vi certe pravas ke nur nukleaj bomboj povos garantii Pacon sur la Tero. *(Li iras en la direkto de la spektantoj maldekstren.)* Sed, rigardu min! Mi ne estas grava čefo en la mondo čar mi havas nur malutilan batalilon. *(Denove li iras al Simbolo Unu kaj petas forte.)* Vendu al mi nukleajn bombojn!

SIMBOLO UNU: Mi devas pensi.

SIMBOLO DU: *(Li iras denove maldekstren apud la spektantoj.)* Se estos necese, mi povus mortigi la bestojn apud mia regiono. Apud mi estas ankaŭ tre granda, freneza besto. *(Li parolas rekte averte al Simbolo Unu.)* Manĝi vin plačus al li!

SIMBOLO UNU: Simbolo Du, mi komprenas klare pri la plano de la freneza besto apud via lando. Jes. Mi donos al vi senpage la mortigajn bombojn.

SIMBOLO DU: Mi dankas vin multe pro via donaco. *(Li prenas la manon de Simbolo Unu kaj levas ĝin alte.)* Granda Potenco por Paco. Ĝis.

SIMBOLO DU: *(Li komencas foriri dekstren antaŭ la benko. Subite li renkontas Simbolon Tri. Li averte svingas sian pafilon apud la vizaĝo de Simbolo Tri kaj flustras!)* Besto! Besto! Besto! *(Li foriras rapide.)*

SIMBOLO UNU: *(Vokante al Simbolo Du.)* Memoru! Memoru! Nukleaj bomboj estus por Paco!

SIMBOLO TRI: *(Simbolo Tri nun estas dekstre de la blanka benko kaj estas apud la spektantoj. Simbolo Tri riverencas kaj parolas en la direkto kie estas Simbolo Unu.)* Granda potenca Besto, Simbolo Unu, mi salutas vin!

SIMBOLO UNU: *(Kolerante)* Ne diru al mi ke mi estas besta potenco. Ču vi ne komprenas ke mia granda potenco estas sole por Paco?

SIMBOLO TRI: *(Simbolo Tri iras al Simbolo Unu kaj parolas ĝentile.)* Pardonu al mi. Estas tre malfacile por mi kompreni kaj distingi la diferencon inter paca Potenco kaj besta Potenco. *(Simbolo Tri iras denove en la direkto de la spektantoj kaj per sia dekstra mano parolas pri sia regiono.)* Estas granda Besto en mia regiono kiu čiam propagandas pri Paco. *(Simbolo Tri reiras apud Simbolo Unu kaj parolas intime.)* Mi opinias ke manĝi lin plačus al vi.

SIMBOLO UNU: Tion či vi komprenas ĝuste!

SIMBOLO TRI: *(Simbolo Tri nun estas apud Simbolo Unu kaj petas sincere.)* Grava paca Potenco, vendu al mi ankaŭ la mortigajn bombojn! La potenco fari tion estas en viaj manoj.

SIMBOLO UNU: Ne! Ne! Ne estas eble!

SIMBOLO TRI: *(Simbolo Tri iras denove dekstren apud la spektantoj.)* Viaj amikoj, kiuj loĝas apud mi, havos baldaŭ nukleajn bombojn, ču ne?

SIMBOLO UNU: Vi pravas.

SIMBOLO TRI: Tio timigas min. Sed, se ankaŭ mi povas havi la mortigajn bombojn, viaj amikoj ne havus la kuraĝon ataki min. *(Drame kaj kun multe da entuziasmo.)* Kaj ne estus milito, sed Paco! Paco! *(Simbolo Tri iras al Simbolo Unu kaj petas denove forte.)* Vendu al mi la mortigajn bombojn!

SIMBOLO UNU: Nu, nu, mi ne estas certa.

SIMBOLO TRI: *(Komencas foriri dekstren antaŭ la benko.)* La granda Besto, kiun vi multe malamas, vendos al mi, al mi!

SIMBOLO UNU: *(Vokante)* Atendu! Mi vendos al vi. Sed la kosto estos –

SIMBOLO TRI: Kosto ne estas grava. Dankon, dankon multe. Ĝis. *(Simbolo Tri estas preskaŭ če la dekstra enirejo kiam Simbolo Unu krias al li.)*

SIMBOLO UNU: Memoru! Komprenu! Mi ne estas Besto!

SIMBOLO TRI: *(Simbolo Tri reiras maldekstren kaj levas la manon de Simbolo Unu.)* Via Potenco estas čiam por Paco. Dankon denove. Ĝis la revido! *(Simbolo Tri komencas foriri dekstren antaŭ la benko, kaj kiam li estas apud la spektantoj, li flustras.)* Baldaŭ mi estos Besto! Besto! Besto!

SIMBOLO UNU: *(Vokante al Simbolo Tri.)* Silentu! Mi ne volas aŭdi denove la vorton „Besto"! *(Simbolo Tri respondas „Besto, besto", kaj foriras rapide.)*

(Lia pafilo, kiu ankoraŭ estas en la dekstra mano, nun preskaŭ tušas la surfacon de la benko. Li sin sentas senfida kaj mizera.) Mi komencas havi seriozajn dubojn. Ču vera Paco en mia Mondo estos ebla? Nun estas bestoj čie kaj mi devis vendi Mortigajn Bombojn, kaj baldaŭ estos Nukleaj Bomboj čie. Mi bezonas la komfortajn vortojn de mia kara Belulino. *(Li komencas foriri, vokante.)* Mia kara Belulino, mi bezonas nun viajn brakojn čirkaŭ mi. Belulino. Belulino. *(Post la malapero de Simbolo Unu estas paŭzo. Tiam en la distanco oni aŭdas belan fajfilan sonon.)*

VILĈJO: *(Li aperas maldekstre. Li česigas la fajfadon, iras al la spektantoj kaj rigardas supren.)* Belulino! Belulino! Belulino! *(Li fajfas denove.)* Kie vi estas? Respondu al mi! *(Denove li fajfas.)* Belulino! Venu nun!

BELULINO: *(Belulino eniras kaj, ludante, metas siajn brakojn čirkaŭ la talion de sia frato.)* Jen mi estas, kara frato. Mi paŭzis kelkajn minutojn čar subite mi havis grandan deziron meti miajn brakojn čirkaŭ belegan verdan arbon.

VILĈJO: *(Ripročante sian fratinon.)* Arboj! Arboj! Čiam vi pensas pri arboj. Ču vi ne komprenas, Belulino? *(Li saltas sur la benkon.)* En tiu či arbaro loĝas la Besto kiu havas korpon de juna viro, kaj vizaĝon de freneza Besto! *(Li nun estas apud Belulino kaj diras averte.)* Manĝi vin plačus al li! Forgesu arbojn. Timegu la Beston!

BELULINO: *(Ŝi iras al la benko.)* Mi ne havas timon pri la fama Besto. Sed mi sentas grandan timon pri Arturo, mia kara patro. Mia patro promesis ke li renkontos nin če la benko. *(Ŝi eksidas sur la benko.)* Vilĉjo, kie estas Arturo?

VILĈJO: Ne čagreniĝu pri Arturo. Kvankam pačjo ne povas vidi bone, li fine trovos la benkon. Mi konas mian pačjon.

BELULINO: Vilĉjo, mi volas multe kredi vin.

VILĈJO: *(Li eksidas apud Belulino sur la benko.)* Kredu min, Belulino. Tempo neniam estas grava al Arturo. Li neniam portas horloĝon kaj neniam petas, „Kioma horo estas?"

BELULINO: Mia kara frato, vi pravas. Mi sugestas ke ni serču lin en alia parto de la arbarego. *(Ŝi ekstaras kaj ankaŭ Vilĉjo ekstaras.)*

VILĈJO: Bona ideo. Se ni ne povos trovi lin, mi sugestas ke ni revenu al la benko denove.

BELULINO: Nia patro ne povas vidi, sed li povas aŭdi perfekte. Vilĉjo, fajfu. Kaj mi krios.

Vilĉjo fajfas; Belulino krias, „Arturo, Arturo". *Ili foriras maldekstren. Arturo eniras subite dekstre kaj promenas*

BELARTAJ KONKURSOJ '87 BELARTAJ KONKURSOJ

malrapide al la spektantoj. Lia aspekto estas tiu de homo kiu estas tre laca. En unu mano estas ruĝa rozo. Pendante de lia ŝultro estas sako. En ĝi estas sandviĉo.

ARTURO: Mi certe estas laca. Mi perdiĝis en la arbarego. *(Li subite vidas la blankan benkon. Li metas la sakon sur la benkon. La ruĝa rozo ankoraŭ estas en lia mano. La Besto eniras kaj staras malantaŭ Arturo.)* Fine, mi estas atinginta la benkon. Sed, kie estas Belulino kaj Vilĉjo? *(Subite, la Besto metas siajn brakojn ĉirkaŭ la korpon de Arturo.)* Belulino, mi ne estas arbo! Mi komprenas ke vi amas min multe. Ĉesigu la ludon! Vi komencas vundi min! Ĉesigu nun, Belulino, nun!

BESTO: Mi ne estas via Belulino.

ARTURO: Ĉu ne?

BESTO: *(Li turnas Arturon.)* Rigardu min! Mi manĝos vin baldaŭ. Mi estas la Besto. Timegu!

ARTURO: Honeste, mi diras ke mi ne povas timi. Per miaj okuloj kaj okulvitroj mi vidas antaŭ mi junan viron kun tre interesa, malordinara vizaĝo.

BESTO: „Interesa, malordinara vizaĝo" li diras. Aŭskultu min! Mi devis lasi mian kastelon ĉar miaj regatoj rifuzis toleri mian malordinaran aspekton.

ARTURO: *(Li eksidas sur la benko.)* Ĉu? Tre, tre interese.

BESTO: Ŝajne ke, rigardate per liaj okuloj, mi ne estas danĝera.

ARTURO: Honeste mi diras al vi, vi pravas.

BESTO: Honeste mi diras al vi, ke mi mortigos vin!

ARTURO: Kompreneble vi povas mortigi min tre rapide. Mi sentis la fortecon de vera besto. Sed, antaŭ ol tio okazos, eksidu apud mi. Mi volas multe paroli kun vi antaŭ mia morto. En mia sako estas bona sandviĉo. *(Arturo prenas la sandviĉon kiu estis en la sako kaj proponas ĝin al la Besto.)* Gustumu ĝin. Ĝi estus multe pli bona nutraĵo por vi ol estus mia maljuna korpo.

BESTO: Sandviĉo ne plačas al mi. Kaj ĝi certe ne interesas min.

ARTURO: *(Metante la sandviĉon en la sakon.)* Kio vere interesas vin?

BESTO: Estas la ruĝa rozo en via mano. Kie vi trovis ĝin?

ARTURO: Antaŭ granda blua tomba ŝtono. Vi povas havi ĝin. *(Arturo donas la rozon al la Besto.)*

BESTO: *(Flustrante)* La tomba ŝtono de mia patrino! Mi devas scii ĉion. Respondu al mi!

ARTURO: Mi konsentas, nur petu.

BESTO: Kial vi plukis la rozon?

ARTURO: Mi volas doni ĝin kiel donacon al Belulino.

BESTO: *(Ekscitite)* Kiu estas Belulino?

ARTURO: Belulino estas mia kara Esperanta filino kaj ŝi, kiel mi, volas interparoli kun ĉiuj.

BESTO: Pli! Pli!

ARTURO: Belulino vere amas ĉion.

BESTO: Ĉion? Klarigu!

ARTURO: Ŝi amas la arbojn, la birdojn, la bestojn.

BESTO: Rigardu min! Rigardu min zorge. Ĉu Belulino povus ami min, la tre malbelan Beston?

ARTURO: Mi ne povas promesi la amon de Belulino. Sed mi promesas ke, se Belulino hazarde renkontus vin, ŝi parolus kun vi tuj kaj sen timo.

En la distanco oni aŭdas „Arturo, Arturo".

BESTO: Tio estas la voĉo de Belulino, ĉu ne?

ARTURO: Jes. Belulino kun Vilĉjo, mia filo, venas.

BESTO: *(Entuziasme)* Venas ankaŭ mia espero! Jen estas mia decido. Mi ne mortigos vin, ĉar la ruĝa rozo estas por Belulino. Donu la rozon al ŝi. Konvinku Belulinon ke ŝi devos resti sola ĉe la benko.

ARTURO: Ne. Ne. Tio ne estas ebla.

BESTO: *(Avertante kaj forte)* Mi diras al vi honeste ke se Belulino ne restos sola apud la benko kun la ruĝa rozo, mi tuj iĝos kruela, freneza Besto! Mi senkompate mortigos ĉiujn – vin, Belulinon, Vilĉjon. Mi kašos min kaj atendos. Ĉio estas en viaj manoj! *(La Besto malaperas. Belulino kaj Vilĉjo eniras. Ili iras rapide al la benko kie Arturo sidas silente, malfeliĉe rigardante nur la plankon.)*

BELULINO: *(Ŝi eksidas apud li kaj milde levas lian kapon.)* Ĉu vi ne estas feliĉa vidi min?

ARTURO: Jes kaj ne.

VILĈJO: Mi certe estas feliĉa kaj dankema vidi vin. *(Arturo ne respondas. Vilĉjo prenas la manojn de sia patro.)* Paĉjo, ĉu vi ne estas feliĉa vidi viajn gefilojn?

ARTURO: Jes kaj ne.

BELULINO: Pensu, mia kara patro, vi kaj mi portas la verdan stelon. Kaj nun la sola interparola respondo de vi estas „Jes kaj ne".

VILĈJO: Ĉu vi estas malsana?

ARTURO: Jes kaj ne.

BELULINO: Mia patro, ĉesigu tiun ludon! Klarigu al mi nun la signifon de „Jes kaj ne".

VILĈJO: Mi petas ke vi faru tion nun, nun!

ARTURO: *(Li prenas la manojn de siaj gefiloj. La tri nun sidas kune sur la benko.)* Kara Belulino, kara Vilĉjo, la Besto sekvas min al la benko. Li vere intencis manĝi min! Sed, subite li vidis la ruĝan rozon en mia mano.

BELULINO: Jes – kaj –

ARTURO: Mi klarigis ke la ruĝa rozo estas donaco por vi.

BELULINO: Dankon, kara Patro.

ARTURO: Ne! Ne danku min!

BELULINO: Kial ne? Mi ne komprenas.

ARTURO: La Besto diris ke se vi, Belulino, restus sola tie ĉi, li ne manĝus min.

BELULINO: Ĉu tio estas ĉio? Ho, patro, certe mi restos sola. Donu al mi la rozon. Besto, kiu havas intereson pri rozo, interesas min multe. Kara Patro kaj kara Vilĉjo, iru hejmen nun.

ARTURO: *(Li ekstaras kaj parolas senfide. Li donas la rozon al Belulino.)* Belulino, la Besto estas tre malordinara homo, kaj mi timas ke eble li ne estos afabla al vi.

BELULINO: Ne timu! Mi portas la verdan stelon. Ĝi donas al mi esperon ke ĉio estos bona. Kaj rigardu, nun mi havas la ruĝan rozon kiu allogis la Beston. Donu al mi sandviĉon, mi petas, antaŭ via foriro.

ARTURO: *(Li donas la sandviĉon al Belulino.)* La sandviĉo ne plačis al la Besto.

Daŭrigota



Bálint Kolosváry: Konko kaj ŝtoneto

Bernard Golden

Identigo de la misteraj Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter

Duonjarcenta enigmo

Dum preskaŭ kvindek jaroj granda mistero nebuligis paĝojn de la historio de Esperanto kaj vekis la scivolon de multenombraj esperantistoj, precipe tiuj okupiĝantaj pri literatur-historio. La enigmo temas pri la identigo de Peter Peneter, la aŭtoro de la fama erotikaĵo *Sekretaj Sonetoj,* publikigita la unuan fojon en 1931. Du jardekojn poste la enigmo fariĝis duopa, ĉar aperis sur la literatura scenejo la filo de Peter Peneter, verkisto, kiu nomis sin Georgo Peterido Peneter. Oni suspektis, ke ambaŭ nomoj estas pseŭdonimoj de konataj esperantistoj, do estiĝis multe da diskutado kaj spekulativo inter literaturistoj kaj laikoj kun la celo diveni la nomkaŝemulojn. Plurfoje estis flustrite, ke Kalocsay aŭtoris *Sekretaj Sonetoj,* sed manke de objektiva atestaĵo, neniu sukcesis konfirmi tiun konjekton. Fakte, Kalocsay mem, en intervjuo kun Reinhard Haupenthal en 1972, kontestis tiun identigon, dirante nur, ke li konis Peneter, kiu loĝis en Budapeŝto kaj mortis en 1953. La intervjuito informis ankaŭ, ke Peneter lasis kun li la manuskripton de „malgranda epopeeto", titolita *La Eksmonaĥino,* kiu verŝajne neniam estos publikigita, ĉar ĝi estas „ne nur erotika, sed krome blasfema"[1]

Franca profesoro pri lingvoj, Michel Duc Goninaz, provis certigi la identigon per kompara tekstanalizo de *Sekretaj Sonetoj* kun *Romiaj Elegioj* kaj *La Taglibro,* du verkoj de Goethe, tradukitaj de Kalocsay kaj eldonitaj en 1932. Tamen, skeptikuloj postulis pli konvinkan pruvon kiel konfeson de Kalocsay aŭ fidindan dokumenton.

La nomo Georgo Peterido Peneter aperis sur broŝureto titolita *La travestita muzo,* publikigita en Parizo en 1950. Ĝi estis la unua volumo de la Plena Verketaro de Georgo Peterido Peneter, kiu prezentis sin kiel la filon de Peter Peneter. En la intervjuo menciita ĉi-supre, Kalocsay sciigis, ke Georgo Peterido Peneter eble estas Georgo Maŭra. Ankaŭ tiu ĉi nomo estas plumnomo.

Literatura detektivado malkovras spurojn

En 1979 estis eldonita *Biblioteka Manlibro,* konsultverko havanta grandan utilon por historiistoj de la Esperanto-movado kaj ĝia literaturo. La unua parto de tiu libro listigas pseŭdonimojn kaj plum- kaj kaŝnomojn de plurcent esperantistoj, kaj ĝi informas pri la posedantoj de tiuj kriptaj nomoj. Sur paĝoj 18 kaj 31 Peneter estas identigita kiel Kálmán Kalocsay, sed ne estas registritaj en tiu konsultlibro la pseŭdonimoj Georgo Peterido Peneter kaj Georgo Maŭra[2].

Du verkoj publikigitaj en 1980 definitive senmaskigas la virojn, kaŝantajn sin malantaŭ la plumnomoj. Sur unu el la klapoj de la polvo-ŝirmilo de *Plena Analiza Gramatiko,* verkita de Kalocsay kaj Waringhien, estas dirite, ke tiuj du „kunlaboris por produkti [...] – pseŭdonime – la erotikan poemaron *Libro de Amo* (1969, fakte 1965)."[3]. La sekva referenco troviĝas sur paĝo 2 kune kun aliaj verkoj de la samaj ambaŭ aŭtoroj: Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter (ps.). *Libro de Amo.* Biblos (Stafeto), 1969. Pirata fotoreprodukto, 1978. Se oni nun faras kvazaŭ matematikan ekvacion per ambaŭ donitaĵoj, eblas solvi la misteran enigmon.

1. Kalocsay kaj Wainghien...verkis...*Libro de Amo*
2. Peter Peneter kaj Georgo... Peterido Peneter... verkis... *Libro de Amo*
3. *Sekve*, Kalocsay kaj Waringhien = Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter.

Konfirmo estas trovebla en la kolekto da eseoj de Gaston Waringhien titolita *1887 kaj la sekvo...*[4]. Sur paĝo 4 aperas listo de verkoj de la sama aŭtoro, kaj la du originalaj poeziaĵoj estas

1. Maŭra G. E. (ps.) „*Duonvoĉe*"
2. Peneter P.G. (ps.) „*Libro de Amo*"

Tiel ni scias, ke ankaŭ Georgo E. Maŭra estas pseŭdonimo de Waringhien. La festlibro omaĝe al Waringhien, *Li kaj Ni,* publikigita en 1985, enhavas eseon de Michel Duc Goninaz, titolitan „La pseŭdonima Waringhien: G.E. Maŭra kaj G. Peterido Peneter"[5]. En ĝi la aŭtoro pritraktas la devenon de la nomo Maŭra. Ĝi estas Esperanta transskribo de la franca familia nomo Rameau, en kiu la du silaboj estas inversigitaj: (meau + ra fariĝas mau + ra) kaj la neuzita „e" funkcias kiel inicialo kune kun „g" (el Gaston). S-ino Marthe Rameau estis amikino kaj helpantino de Waringhien. Rimarku, ke en la eseo de Duc Goninaz, mankas klarigo pri la signifo kaj deveno de la familia nomo Peneter.

Etimologio de la nomo Peneter

En *La Kancerkliniko*[6] aperis kontribuaĵo de Michel Duc Goninaz pri mia unua hipotezo rilate la signifon de la nomo Peter Peneter, publikigita pli frue en la sama periodaĵo[7]. Kritikante mian aserton, ke „la nomo Peneter tute ne ekzistas ekster Esperantujo", li demandis: „Ĉu ĝi ne estis iam la nomo de la egipta diino de amo?" Ne estante mem egiptologo, li proponis, ke erudiciulo kontrolu tion. Duc Goninaz meritas laŭdon, ĉar li montris al la ĝusta vojo – al Egiptujo – kaj preskaŭ metis sian fingron sur la solvon de la enigmo. Tamen, plej verŝajne distris lin la allogaj ĉarmoj de la egipta amdiino, Hathor, do li lasis la solvon pretergliti antaŭ lia menso.

Laŭ la instigo de tiu doktulo, mi entreprenis mian

propran esploron, konsultante ne nur fakverkojn pri la egiptologio sed ankaŭ beletraĵojn, kies scenejo estas la Lando de la Faraonoj. Tutnature, la unua literatura verko, kiun mi ekzamenis, estis ĝuste *La Faraono* el la plumo de la pola verkisto Boleslaw Prus, publikigita en la pola lingvo la unuan fojon en 1895. Jam en 1907 ĝi estis esperantigita fare de Kabe[8]. En la unua ĉapitro de la dua volumo, la juna kronprinco Ramzes vizitas templon por inicado al religiaj sekretoj. Lia mentoro, kiu estas pastro kaj ankaŭ kuracisto, donas klarigojn pri du metodoj de kuracado uzataj en la tiama Egiptujo, similantaj al la sistemoj de medicino konataj kiel la homeopatio kaj la alopatio.

> *„Imagu, ke iu estas malsana je la hepato. Ni, pastroj, scias ke la hepato estas sub la influo de la planedo Peneter-Deva, kaj ke la kuracado devas dependi de ĉi tiu stelo. [...]*
> *Sed ĉi tie la scienculoj sin dividas en du skolojn, Unuj diras, ke al malsana je la hepato oni devas doni ĉion, kio estas sub la influo de Peneter-Deva: la kupron, lapis-lazuri, florajn dekoktojn, antaŭ ĉio verbenajn kaj valerianajn, fine diversajn partojn de la korpo de turto kaj kapro. Aliaj kuracistoj opinias, ke kiam la hepato estas malsana, oni devas ĝin kuraci per ĝuste kontraŭaj rimedoj. Kaj ĉar la kontraŭulo de Peneter-Deva estas Sebeg, do la kuraciloj estas: la viva arĝento, smeraldo kaj agato, nuksoj kaj fine pistitaj partoj de la korpo de rano kaj strigo" (pĝ. 14-15).*

Piednoto klarigas, ke Peneter-Deva estas Venus kaj Sebeg Merkuro. *Temas tie ĉi pri planedoj, ne dioj.* Rimarku, ke Kabe skribis „Venus" anstataŭ „Venuso". Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) la nomo de la planedo estas „Venuso", kaj la diino nomiĝas „Venera"; pli frue, tamen, „Venuso" havis ambaŭ signifojn, same kiel „Merkuro" estas la nomo de la dio kaj la planedo. Mi konjektas, ke Duc Goninaz memoris, ke Venuso havas iun rilaton kun la nomo „Peneter", sed li forgesis, ke en la kunteksto tiu Venuso estas la planedo. Ĉar la romia Venuso (aŭ Venera) estas la diino de la beleco kaj amo, li ekvivalentigis ŝin kun la responda diino en la antikva egipta panteono, Hathor, kiu havas la samajn atributojn.

La antikvaj egiptoj konis la planedon Venuso laŭ pluraj nomoj. La nomformo „Peneter-Deva", kiun Boleslaw Prus uzis en sia romano, signifas „la matena dio", t.e. „la matenstelo". La egipta Venuso ne nur diferencas disde la romia planedo pro manko de rilato kun la diino de amo; pli rimarkinda estas ĝia *maskla* karaktero. Respondaj dioj troviĝas en la helen-romia mitologio. Venuso, observata sur la orienta ĉielo antaŭ tagiĝo, nomiĝas Fosforo aŭ Lucifero, nomoj de dioj, signifantaj „portanto de lumo" en la helena kaj latina lingvoj respektive. La sama planedo sur la okcidenta ĉielo okaze de la sunsubiro estas la vesperstelo, identigita en la klasika mitologio kun Hespero, la frato de Atlaso kaj la patro de la tri Hesperidinoj. La latina nomo, parenca etomologie al la helena, estas *Vesper* „vesperstelo"[9, 10].

Estas evidente, ke Kalocsay eraris, kiam li elektis „Peneter" kiel la plumnomon de la aŭtoro de sia erotika poezio. Se Kalocsay estus sciinta pli pri la egiptologio, li neniam estus tirinta la konkludon, ke la egipta planedo Venuso estas identigebla kun femala amdiino same kiel la romia Venuso.

Nun ni klarigu la nomojn „Peter" kaj „Peterido". „Peter" estas la formo de la nomo Petro, uzata en kelkaj eŭropaj lingvoj, ekzemple la hungara, germana kaj angla. „Peterido" estas analizebla kiel „Peter" + „ido", t.e. „ido aŭ filo de Peter". Tiu ĉi nomo, do, estas patronomo formita same kiel etnolingvaj patronomoj, ekzemple la angla Peterson, „filo de Petro". Ne estas klare, kial Kalocsay uzis la etnolingvan formon „Peter" anstataŭ la Esperanta „Petro". Male, la voknomo „Georgo" en la pseŭdonimo de Waringhien, havas la Esperantan formon.

La mistifikado ankoraŭ daŭras: kiu estas Peter Peterido Peneter?

En artikolo titolita „Postlasitaj verkoj de Kalocsay", Ada Csiszár informas, ke ekzistas manuskripto de duparta verko: *La Dekdu Noktoj de Satano*[11]. La unua parto estas la poemo *La eksmonaĥino;* la dua parto en prozo estas *La dektria nokto.* Ambaŭ partoj temas pri „erotikeco" kaj „mistereco". Editoris la manuskripton „la filo de Peter Peneter: Peter PETERIDO PENETER, kiu cetere estas ankaŭ jam mortinta." Ŝajnas, ke ni havas aferon tie ĉi kun ankoraŭ ne konata filo de Peter Peneter kaj frato de Georgo Peterido Peneter.

Tri jarojn poste la sama aŭtorino priskribas detale la enhavon de *La Dekdu Noktoj de Satano*[12]. La komenco de la artikolo tekstas jene.

> „En certa letero (29.10.1964) adresita al K.Kalocsay oni legas: *Kia domaĝo, che* [tiel!] *Peter Peneter ne postlasis unu filinon por kompletigi la trion!* (Peneter la dua estis Georgo Peterido Peneter, verkisto de *La travestita Muzo).* Jes, Peneter-filino ne naskiĝis, sed por venigi al sunlumo satanan historion anoncis sin filo: Peter Peterido Peneter, editoro de la patra postlasaĵo *La Dekdu Noktoj de Satano.*"

Ne estas klare, kial en tiu ĉi citaĵo Georgo Peterido Peneter estas nomata „Peneter la dua" kaj ne „la filo de Peter Peneter", kiel li mem prezentis sin en 1950. Kaj, se Peter Peterido Peneter jam mortis, kial estas necese ankoraŭ kaŝi lian identecon?

1. HAUPENTHAL, Reinhard. *Du Intervjuoj: Interparoloj kun Kálmán Kalocsay kaj William Auld.* Saarbrücken: Artur E. Iltis; 1979. 28 pĝ.
2. MARZ, Herbert. *Biblioteka Manlibro.* Aarhus, Wien: Eŭropa Esperanto-Eldonejo; 1979. 49 pĝ.
3. KALOCSAY K. + WARINGHIEN, G. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.* Kvara, tralaborita eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio; 1980. 599 pĝ.
4. WARINGHIEN, Gaston. *1887 kaj la sekvo...* Eseoj IV. Antwerpeno, La Laguna: TK Stafeto; 1980. 293 pĝ.

Sentimentalaj sukeraĵoj

Nevena Nedelĉeva: Dum nokta deĵoro. Noveloj kaj teatraĵetoj.
Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, 1987.
20 cm, 87 p. Prezo: 12,-gld.
(Por Hungario: 45,- forintoj.)

Ekde la naskiĝo de Esperanto, lernintoj de la lingvo montris nerezisteblan emon surpaperigi siajn plej profundajn sentojn kaj emociojn per la verda interkomunikilo. Ili, do, plenigis rismojn da folioj, plejparte per poemoj. La dua plej ŝatata ĝenro estas la novelo. Ĝenerale okazis, kaj ankaŭ nun okazas, ke entuziasmo kaj produktivo pli potence superregas kapablon kaj talenton.

De tempo al tempo tiaj verkaĉoj estas publikigitaj kun la preteksto, ke eĉ se ili estas stile kaj lingve malbonaj kaj la enhavo sensenca, aperigo en periodaĵoj povas kuraĝigi aŭtorojn, por ke ili penu produkti pli bonkvalitajn verkojn en la estonteco. Eble jes, sed plej probable ne. Kiam ekzistas altaj normoj por pritaksi beletraĵojn, la verkoj de duarangaj kaj triarangaj aŭtoroj ne havas ŝancon aperi sur la presita paĝo. Iliaj manuskriptoj, do, ŝimadas en tirkestoj dum jardekoj kaj finfine sekvas siajn kreintojn en la tombon.

Leginte *Dum nokta deĵoro*, mi demandis min, kial tiuj dek du noveloj kaj du teatraĵetoj meritis publikigon. Laŭ kiuj objektivaj literaturaj kriterioj estis decidite, ke valoras prezenti tiujn pecojn al la legema publiko en Esperantujo? La enhavo estas naŭze sentimentala kun banalaj temoj kaj ŝablonaj intrigoj pri larmigaj, emociplenaj familiaj situacioj. Naŭ el la dek kvar verkoj temas pri „Esperanto – edzperanto". Mi apenaŭ povas imagi la surscenejigon de la du teatraĵetoj, ĉar plej probable ankaŭ la aktoroj ekdormos dum la prezentado.

La lingvouzo kaj stilo de *Dum nokta deĵoro* estas plej simplaj – efektive, lernolibre simplaj kaj palaj – sen iu ajn pretendo al beletraj efektoj. Ĉu la libro, do, eble pli bone konvenas kiel lingvokursa legaĵo? Tio, kompreneble, dependas de la lernantoj. Mi dubas, ke la nuntempa junularo trovos la enhavon atentokapta. Ja antaŭ multaj jardekoj adoleskantaj gimnazianinoj kutimis verki tiajn rakontojn plenajn de suferoj, sopiroj kaj siropo, sed mi dubas, ke ili eĉ legas tiajn hodiaŭ. Pli rekomendinda estas la uzo de la libro por instrui Esperanton al maljunuloj, kiuj certe sentos sin pli ĉehejme en la etoso kreita de rolantoj, kiuj estas olduloj kaj avinoj.

Kelkloke la teksto bezonas poluradon por elsarki malkonsekvencajn gramatikaĵojn rilate la uzon de la akuzativo kaj la adverba participo. En la frazo „Vi, samideanino Lenjo, ege interesigis min..." (p. 74), la verbformo devas esti „interesis". Anstataŭ „soveta soldato" (p. 9 kaj 10), oni skribu „sovetia soldato". Vortoj ne registritaj en *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) kiel „hallo" (p. 70), „milico" (p. 73) kaj „odekolono" (p. 76) devas esti glositaj. Fuŝe kompostitaj estas paĝoj 80 – 83, ĉar la teksto de „Bildo Kvara" estas dufoje ripetita.

Bernard Golden

recenzoj

Gasto, sed ne tiu

Puŝkin, A. La ŝtona gasto: Miniatura tragedio en 4 scenoj (Trad. el la rusa M. Duc Goninaz. – H. Elik, 1984. – 19 pĝ.

La aŭtuno 1830, kiun Puŝkin pasigis en Boldino estas eble la plej fruktodona periodo en la kreado de la granda rusa poeto. Dum la lasta oktobra kaj komenca novembra semajnoj el sub la puŝkina plumo aperis la mirinda ciklo nomata „Etaj tragedioj". La „Avara kavaliro" bildigas la temon de homa personeco puŝata je krimoj pro la oro. „Mozart kaj Salieri" estas drama kolizio de genio kaj rafinita racio, de „dulce" kaj „utile" fone de korronĝanta envio. „La ŝtona gasto" montras la problemon de la liberaj homaj sentoj fronte al la rigidaj sociaj konvencioj kaj moralo. „Festeno dum pesto" pensigas pri la homa kuraĝo spitanta la fatan morton. Nur skiza kaj vulgara prezento, necesas pli detala, sed aliloke...

La akraj kolizioj de la kvar komponaĵoj, profunda filozofio, mirinda denseco kaj elvokivo, adreso al la eternaj (sed ĉiam evoluantaj valoroj), universaleco de la temoj, multiplikite je la superba poetiko de Puŝkin igas ilin majstroverkoj de la rusa literaturo, kaj komponento de la monda literaturo. Apenaŭ troviĝus ruso, kiu ne konus almenaŭ kelkajn liniojn el tiuj „verkaloj", ekzemple:

Ĉiuj parolas: mankas ver' sur Ter',
sed mankas ankaŭ supre ver'. Por mi
ĉi tio klaras kiel simpla gamo.
Kun amo al la arto mi naskiĝis;
kaj jam infane plonĝis en la sonojn
de la orgen' en nia kirk' antikva.

(Mozart kaj Salieri)

aŭ tiu ĉi, el la recenzata libreto:

Vi junas nun... kaj estos juna plu
kvin aŭ ses jarojn. Ĉirkaŭ vi
ankoraŭ tiom oni amasiĝos,
karesos vin kaj lulos, per donacoj
kaj serenadoj distros vian koron,
mortigos unu la alian nokte
en vojkruciĝoj. Tamen kiam jam
la tempo pasos, kiam la okuloj
kaviĝos, kaj palpebroj nigre ŝrumpos,
en la harar' aperos grizaj briloj,
kaj oni nomos vin jam oldulino.
Do, tiam, kion diros vi?

(La ŝtona gasto)

Sed, kara leganto, ne serĉu la lastan citaĵon en la „traduko" de s-ro Duc Goninaz. Vi trovos en ĝi nek la sinistran aŭguranton Don Karlos, nek la alparolaton – pasian Laura (la lasta, nomata ankaŭ Don Ĵuan en jupo, kolorita figuro nepras por la dramo. Estas ŝi, ne Anna, al kiu revenas la protagonisto). Vi ne trovos ankaŭ la ceterajn rolantojn de la puŝkina „Ŝtona gasto" krom tri, kies nomoj ne tute identas al la aŭtentaj. Ve! Eble vi eĉ tute ne rekonos ĝin, ĉar la flua, riĉa puŝkina poezio estas „tradukita" proze. Hm... Videble, s-ro Duc Goninaz intencis verki sian propran scenaron kun priskribo de „etaj cicoj", „malmola pugo", „fikebla", kiuj propras al la originalo samkiel la aludoj al „kongresaj oratoroj", „el mia brusto ĝi ne saltu for". Nu, li verku tion. Sed la pastiĉaj ekzercoj marĝene al klasikaĵo nur ridindigis lin, ĉar ne eblas trovi eĉ unu bazan kriterion, laŭ kiu la du verkoj estu kompareblaj.

5. DUC GONINAZ, Michel. La pseŭdonima Waringhien. G.E. Maŭra kaj G. Peterido Peneter. 52-65 en *Li kaj Ni: Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien.* Antwerpeno, La Laguna: TK Stafeto; 1985. 512 pĝ.
6. DUC GONINAZ, Michel. Kiam erudiciuloj duelas. *La Kancerkliniko.* 1983; 27:25.
7. GOLDEN, Bernard. Senmaskigo de du pseŭdonimuloj: Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. *La Kancerkliniko.* 1982; 24:15.
8. PRUS, Boleslaw (pseŭdonimo de Aleksander Glowacki). *La Faraono.* Tri volumoj, kvara eldono, tradukita en Esperanton de KABE (pseŭdonimo de Kazimierz Bein). Varsovio: Polonia; 1957. 295, 257, 206 pĝ.
9. KÁKOSY, László. *Egyiptomi és antik csillaghit.* Budapest; 1978. (Vd. pĝ. 28-29.)
10. NEUGEBAUER, O. + PARKER, Richard A. *Egyptian Astronomical Texts: III. Decans, Planets, Constellations and Zodiacs.* Providence, Rhode Island (Usono), kaj Londono; 1969.
11. CSISZÁR, Ada. Postlasitaj verkoj de Kalocsay. *Literatura Foiro.* 1983. junio; 14 (79): 10-14. (Vd. pĝ. 13.)
12. CSISZÁR, Ada. Erotika ĉefverko de nia literaturo. *Literatura Foiro.* 1986/decembro – 1987 januaro; 100: 25-26. (Vd. pĝ. 25.)

Vere, mi ŝatus, ke ankaŭ la esperanta leganto povu ĝui tralegon de la iom makabra, sed elstare humanisma ĉefverko de Puŝkin, kies Don Ĵuan ne konformas al la kanono de l' tradicia eŭropa Don Juan. Inverse al ili, ĉe Puŝkin estas Dona Anna, kiu pereas la unua de l' mano de la komandoro Don Alvaro (tute ne duc goninaza Don gonzale d' Ulloa), kaj la dua – Don Ĵuan impetinta savi ŝin. Apenaŭ imageblas ĉe Don Ĵuan-oj la karitato kaj dolora kunsento al Ineza, kiun Puŝkin pentras jene:

Don Ĵuan *(enpensiĝinte)*
Ineza kompatinda!
Ŝi mortis jam. Mi tiel amis ŝin!

Leporello

Ineza! – nigr-okula... – mi memoras.
Vi tri monatojn ŝin sieĝis, kaj
nur ŝance al vi helpis la diablo.

Don Ĵuan

Julie... nokte. Vere, strangan ĝuon
mi trovis en rigardo ŝia trista,
en lipoj mortaspektaj. Strange, jes.
Vi ŝin ne taksis belulino,
ŝajnas. Jes. certe en ŝia aspekto
belec' kutima mankis. Nur l' okuloj.
L' okuloj. Kaj rigard' – similan
neniam plu mi vidis. Kaj la voĉo
tre feblis, estis softa, kvazaŭ de
malsanulin'. La edz' fiul' feroca.
Ne sciis mi... Ineza kompatinda!

Aleksander Korjenkov

Konstruita reto

Lorjak: MARIAGNES (romano), 140x200 m, 220 paĝoj, eldonis Hungara Esperanto-Asocio en 1986, Prezo 21 guldenoj. (Por Hungario: 90,- forintoj.)

Tiu ĉi sub la pseŭdonimo „Lorjak" verkanta aŭtoro jam ofte surprizis la esperantistan legantaron per romanoj. „Neologisme", „Transe", „Retoj", „Regulus", „Iluzioj" kaj „Eŭlalia" estas titoloj de liaj ĝisnunaj verkoj. Nun aldoniĝas „Mariagnes".

Pardonu, kiam mi kritikemas la laste nomitan libron. Sed estas kelkaj faktoj, kiuj malhelpis al mi ĝuplenan legadon. La plej grava estas la multaj, ne nombreblaj preseraroj! Preskaŭ ne ekzistas eĉ unu paĝo de la libro, sur kiu ne kaŝus sin kelkaj da ili. Tio, kompreneble, ne koncernas la aŭtoron, sed la kompostejon kaj la esperantlingvan korektinton! (Tiu estis la aŭtoro mem. – La Red.) Per tiaj diablaj eraroj ekestas ofte konfuzaj situacioj por la leganto, dum kiuj li/ŝi dubas pri siaj Esperanto-konoj. Tiel, ekzemple: „...ĉu vi bonvolos iris al la banĉambro..." (paĝo 54) aŭ sur la sama paĝo: „...preferis afekti ignori...". Aŭ sur paĝo 63: „...tiu foso istis ebenigita...". Tia malbona komposteja laboro certe ne nur afliktas la aŭtoron.

La lorjaka stilo ne estas simplaĵo. Legantoj, posedantaj ankoraŭ ne sufiĉajn spertojn, certe post legado de kelkaj paĝoj rezignos pri la daŭrigo de siaj klopodoj kaj penoj. Sed... ĉu aŭtoro nur skribu tiel, ke ankaŭ la plej nova komencanto komprenu la enhavon? Mi neas tiun ĉi demandon. Se niaj esperantistaj verkistoj estus tiel agintaj dum la lastaj (respektive unuaj!) cent jaroj de Esperanto, tiam nia lingvo ankoraŭ havus aspekton de la komencaj jaroj – ĝi ne evoluus! Lorjak estas unu el tiuj aŭtoroj, kiuj antaŭenpuŝas la lingvon, li elĉerpas ĉiujn eblecojn kaj nuancojn de Esperanto. Prave! Kvankam kelkloke lia stilo estas iomete memvola kaj ne konvena por la uzado de plimulto de esperantistoj, ekzemple: „...ĉu vi povoscias maŝinskribi..." (anstataŭ „scipovas").

Estas malgravaĵoj. Tion mi ankaŭ devas konstati rilate al la enhavo de ĉi tiu romano. Lorjak lerte nodas reton, reton de interrilatoj de la ĉefaj rolantoj kaj de konfliktoj – sed tiu reto estas ege konstruita kaj ofte tro hazarda. Iu Roger Mellion, emerita bankoficisto el Parizo, konatiĝas kun Maria Dupont, kiu frape similas al Agnes de Vitry, iama fama filmaktorino el la junaĝo de la bankoficisto. El la antaŭnomoj „Maria" kaj „Agnes" rezultas „Mariagnes", do, la titolo de la romano. Misteraj okazaĵoj atendas la leganton, laŭ mia juĝo Lorjak troege nodis ĉion – tio preskaŭ ne eblas en „normala" vivo. Nu, temas pri figuroj en romano kaj ne pri la nepra kaj pura vero. Ne povas esti tasko mia elparoli tro multon pri la relative bagatela enhavo sen malkaŝi ĝin. Tial mi silentu pri detaloj. Legu mem – se vin ne ĝenas la menciitaĵoj.

Joachim Schulze

MISKONTRIBUO

Interlingvistiko. Esperantologio: Studoj Kunm., red. V. Oljanov. – Sofio: BEA, 1985. – 252 p. (Prezo por Hungario: 50,- forintoj)

Apero de studkolekto pri interlingvistika aŭ esperantologia temaro ĉiam interesas la esperantistojn, des pli, se verkita en Esperanto. Ĝuste tiaspeca estas la kvaronmil-paĝa antologio veninta el la suna Bulgario. La „elstara" internacia teamo kun „kvin membroj de la Akademio de Esperanto" laŭ la aludo de la kunmetinto „destinas ĝian altan valoron"... Kiel do tiu renoma kolektivo kontribuis al la evoluo de interlingvistiko?..

Tiun lingvistikan kolekton komencas ĝeneralaj interlingvistikaj studoj *(Atanasov, Masserov, Ĝuĝev-2, Verloren van Themaat, Danovskij)*. Ili difinas kaj redifinas la nocion interlingvistiko, komparas diversajn kvalitojn de la planitaj kaj etnaj lingvoj, mode molestas la teoriojn de E. Svadost. Tamen la maniero trakti la temojn surprizas. Ties karakteriza trajto estas eksterlingvistika konvinko pri la supereco de Esperanto, apenaŭ vestita per pseŭdosciencaj rezonoj. Nu, la esperanta ŝovinismo normale takseblas sana. Sed ja ne tiom! Kaj ne en lingvistika verko. Jen paro de tipaj emfazoj: „Ĉiu esperantisto devas brili en sia socia rondo per sia alta filoloĝia kaj ĝenerala kulturo, kaj eĉ momenton ne forgesi sian funkcion de ambasadoro de la Esperanto-movado ĉe la neesperantista mondo" (P. 54) kaj „...tiu ĉi popolo (la esperantistoj – AK)... posedas neordinaran energion kaj klaran konscion pri sia kulturhistoria misio, pri sia glora estonteco... Nevenkebla, neekstermebla raso!" (P. 40). Min interesus legi artikolon pri, hm..., nu, pri „la supereco de la zulua lingvo super la slovaka" aŭ simile, en la kutima stilo de la esperantistaj propagandistoj, kiuj ofte forgesas, ke ĉiu scienca disciplino havas siajn aparaton, terminologion, nomenklaturon, tradiciojn. Ne ekzistas bonaj kaj malbonaj lingvoj – tiun primaran tezon ja certe konas la akademianoj kaj iliaj doktaj kolegoj laŭ la Sofia volumo.

La esperantologia sekcio (3/4 de la tuto) traktas diversajn temojn, sed plimultas etimologiaj materialoj kaj proksimaj al ili materialoj komparantaj Esperanton al tiu aŭ alia etna aŭ planita lingvo (*Poŝka, Vaitilavičius, Duc Goninaz, Blanke, Oljanov, Golden-3, Murgin*). La metodo estas sufiĉe tradicia: oni prezentas kelkajn interferajn elementojn kaj ĝeneraligas ilin je certa sektoro aŭ nivelo de Esperanto, sen klara kvanta motivado. Impresas la tendenco de B. Golden devenigi kelkajn elementojn de la Zamenhofa projekto el Volapük, kiun tendencon la fekunda aŭtoro jam delonge propagas. Kurioze, liajn esplorojn pri *-ul-* kaj *-il-* sukcese kontestas partianoj de la litova kaj bulgara lingvoj.

La toponimikaj artikoloj *(Albault, Vaitilavičius-Skupas, Golden, Oljanov)* konstatas la nunan malkoherecon kaj postulas pli logike motivitan unuecan sistemon. Preskaŭ ĉiuj aŭtoroj ripetas la kutimajn mankojn: ili forgesas ke en neniu homa lingvo troviĝas tiu logika sistemo unuece nomanta la landojn kaj iliajn loĝantojn; ili preteratentas la praktikan uzon de la lokanoj-esperantistoj; ne sekvas la naturan lingvoevoluon en tiu sfero, kiu evoluo ne tro strebas al uniformo. Aliflanke, tute pravas la deziro korekti multajn fuŝojn, ĉu en PIV ĉu en la *Poŝatlaso de la mondo* (Praha: 1971) – ja ankaŭ ilin oni kompilis sen atente konsideri la realan praktikon.

Mi, kiel Uralano, atestas ke multaj formoj far la redaktoroj kaj aliaj sciuloj el PAM elvokas nur ridon de la Uralaj esperantistoj. Kelkaj aliaj artikoloj kompletigas la volumon: pri la personaj nomoj *(Coburger)*, difina artikolo *(Vaitilavičius)*, „in"-problemo *(Stolberg, Oljanov)*, elparolo kaj kritiko de la *Plena analiza gramatiko de Esperanto (Oljanov)*. Cetere, multe pli objektive kaj altnivele tiun – la plej konatan – esperantan gramatikon rezenzis J. *Lindstedt* en *Planlingvistiko* (NI,3,6), en kiu revuo aperis ankaŭ kritiko de la kritiko de V. *Oljanov* verkita de L. *Mihajlov* (N8,9).

„Ha, lasu jam, ne tiom negative" – povus repliki indulgema esperantisto. – „Ja estas debuto..." Ne, pardonon, kara leganto – sed la gloraj akademianoj?.. Aŭ ne ili kompetentas pri la problemo?.. Aŭ la selekto ne estis zorga?..

Laŭ mi la evidenta nesukceso de l' libro fontas el la misa platformo. Ja nek interlingvistiko, nek esperantologio celas montri perfektecon de tiu aŭ alia lingvo, ili science – ne preskribe, sed priskribe – studas ilin. Estas ĝuste scienceco, kiu mankas al la kunlaborintoj. Matematikaj modeloj, genera gramatiko, statistika bazo – ĉu tute preteratenti tiun modon? Eble jes. Eĉ uzante ĉefe la tradiciajn metodojn oni povas atingi bonan rezulton – aliaj kolektoj, forme similaj al la Bulgaria, vidigas tion: *Problemoj de interlingvistiko* (Moskva: 1976), *Interlinguistica tartuensis* (Tartu: 1982, 1983, 1984), *Acta interlinguistica* – SIS (Warszawa: 1984, 1985), ankaŭ la studoj de S. *Kuznetsov*, A. *Duličenko*, R. *Rokicki*, D. *Blanke*, I. *Szerdahelyi*, B. *Wacha*, J. *Wells*.

Ilia sperto konvinkas, ke ankaŭ esperantistaj filologoj povas grave kontribui al la scienca studo de planlingvoj, de la interlingva komunikado. Sed por tio oni lasas la personajn kaj partiecajn preferojn kaj antaŭjuĝojn; reale rigardas la situacion, konceptas la planlingvon homa lingvo kun polisemio, lektiĝo, nekohereco kaj, komprenebla, uzas la aparaton de lingvistiko. V. *Oljanov* skribas en la prefaco, ke „ni rajtas esti optimistoj". Jes, ni rajtas atendi el Sofio alian, pli interesan kaj sen-antaŭjuĝan, antologion, kiu vere „donos puŝon al disvolvo de teoriaj esploroj, kuraĝigos la sciencemajn esperantistojn al enprofundiĝo en la labirinton de la interlingvistiko kaj esperantologio".

Aleksander Korjenkov

PRAGA KVINTETO

Kvarfolio: Versoj de pragaj poetoj-esperantistoj (Elektis kaj aranĝis Eli Urbanová.) – Prago: ČEA, 1985. – 32p.

En tiu ĉi libro rolas plejmulte pragaj literaturistoj jam konataj en Esperantujo: al ni prezentiĝas originale poetino Eli *Urbanová*, poetoj Jozef *Rumler*, Čestmír *Vidman*, kaj Jiři *Karen* prezentiĝas per tradukoj far Jiři *Kořinek*. Rimarkinde, ke ĉiuj kvar poetoj ne nur estas esperantistoj, sed ili engaĝitas ankaŭ en la nacilingvan literaturan vivon. Evidente ankaŭ al tio ni ŝuldas la majstrecon, bonan posedon de la poetika metio, altnivelan stilon. Nin alparolas maturaj aŭtoroj kaj multspertaj homoj. Jiři *Karen* komencas la broŝuron per la ciklo de liberaj poemoj „Tago afabla je vortoj", kiun trateksas la civitana, patriotisma fadeno. Ni vidas la poemojn, dediĉitajn al patrino, la milito, la unua amo, la patrio. Eli *Urbanová* surpaperigas la sentojn de la soleca vivaŭtuna virino, kiu vivas nur per la rememoroj kaj doloro pri la pasintaj feliĉaj tagoj, kiujn ŝi repagas per la poemoj de l' koro. Čestmír *Vidman* arte spegulas siajn impresojn pri la oftaj restadoj en Japanio. Li tiel penetris la japanan spiriton, ke al li sufiĉas nur kelkaj peniktušoj por vivigi la paletron de la ekzotika oriento.

Kaj la plej ampleksa poemo de la volumeto – „Lasta ĉevalo" de Josef *Rumler*. Ĝi jam ricevis laŭdajn recenzojn de Reto *Rosetti* kaj William *Auld*. Kaj vere, tiu ĉi humanisma, homarana verko meritas ilin.

Ĉevalo – „la mimo de... animo", animo – „spegula vitrino de l' sino de la terpatrino"; ĉevalo de la pegaza grego, kiu paŝtiĝas en la „verda valeto" de la poeta animo. Ĉevalo – la poeta inspiro, ĉevalo – la espero je la homa racio. Ĝi ankoraŭ paŝtiĝas en ni.

Tamen vi homo hometo zorgema estu
ke ĝi ne restu
morgaŭ lasta ĉevalo

Tre interesas la harmonia aranĝo de la poemo. Abundaj aliteracioj, asonancoj, internaj rimoj kreas specifan riman ritmon – „rimritmon", kiel difinas la poeto mem.

Kelkiom indas diri pri la lingvaĵo. Entute ĝi estas modela, sed, kiel ĉiam en la ĉehaj eldonoj kun partopreno de *Rumler* (aŭ *Pič*), ne mankas kvoto da neologismoj, ne ĉiam motivitaj stile. Ekzemple, kian avantaĝon donas: *interioro* (interno), *milenia* (miljara), *fakelo* (torĉforma lumilo), *nonstope* (senstope), *senpompeza* (senpompa)? Al la aŭtoro ne sufiĉas la vorto *pita* (eta), kaj li enkondukas *petita* (tre eta). Pardonu pro la kalemburo: kiu petis tian konfuzan „pliriĉigon"? Ĉu ne taŭgus *piteta*? Mi eĉ pensis pri presmiso, sed tiam ne necesus la gloso. Ankoraŭ pli tio frapas ĉe la ofte uzataj „servaj" vortoj: *enim* (nome, ja), *hik* (jen, ĉi tie), *kom* (estiel), *ma* (sed, tamen), *men* (malpli), *omno* (ĉiom, tutkvanto, totalo). Pli normale perceptiĝas vortoj, konstruitaj sur la esperanta morfema bazo, ekzemple; la frazon „li parolas kiel patro" eblas nuancigi tiel:

li parolas esk'al patro (patreske);
li parolas estiel patro (estante patro).

Similaj formoj, konstruitaj laŭ la virtualaj leĝecoj de la esperanta strukturo, aspektas pli nature en nia strukture aŭtonoma lingvo, ol la naturalismaj neologismoj. Senmotiva uzo de ĉi lastaj kaj de nevaste uzataj sufiksoj kreas la impreson de slangesko, familiareco: *totale sincera; elportreti pli men sin mem;* laste, *ma ne frustre; hik pli pasie, hik pli melankolie* (pri kio oni hikas?); *ŝia vivo, ne rare dornoza kaj doloroza...* kaj pluaj „perloj".

Josef *Rumler* estas prezentita en la broŝuro kiel la esperanta stilisto, aŭtoro de la koncerna studo. Des pli atenteme li devus konsideri la suprajn liniojn.

Finas la broŝuron letero de Eli *Urbanová* al komencantaj poetinoj, kie ŝi malkovras la sekretojn de sia metiejo: sento, penso kaj... ŝvito. Jes, se vi volas akiri krean memkontentiĝon kaj renomon, ne lacu labori.

En la broŝuro vi trovos ankaŭ la kurtajn biografiajn skizojn pri la poetoj kaj la tradukisto kaj iliajn adresojn. Do, leganto havas eblecon senpere esprimi dankon, riproĉon, aŭ podisputi.

Nikolaj Lozgačev

EMG ELEKTRONIKAJ INSTRUMENTOJ AL LA INDUSTRIO



1

Estas bone konate, ke post la elektrotekniko, estis la elektroniko kiu revolucie invadis la tutmondan industrion per siaj altprecizaj, surprize rapide kaj efikplene utiligeblaj instalaĵoj. Efektive ili revoluciigis la industrion, kaj kvazaŭ aldone ankaŭ la sciencajn esplorojn, la laboratoriojn ĉu de la universitatoj, ĉu de la pli zorge laborantaj entreprenoj. Elektronikajn aparatojn kaj mezurinstrumentojn bezonas nuntempe nenombreble multaj industriaj taskoj: por mezuri kaj ekzameni, reguli kaj direkti, ĉiupaŝe, eĉ ĉiugrade necesas la uzado de ĉi tiuj iloj.

Precipe grava montriĝis tiu industria branĉo, kiu produktas por la aliaj branĉoj kaj al la scienca sfero la elektronikaĵojn, la instrumentojn kaj aparatojn. Se la taskojn pri mezurado, pri direktado kaj tiel plu, la uzontoj jam difinis, restas plua tasko, aperanta ĉe fabriko de tiaj instrumentoj, science solvi, poste inĝeniermaniere — do teknike — projekti kaj produkti la bezonatajn novajn elektronikaĵojn. Novigoj kaj inventoj en tiu ĉi branĉo estas kvazaŭ ĉiutagaĵoj, vere vivigaj elementoj de la fabrikado. Por interesiĝanto de la moderna tekniko, de ties novaj direktoj certe prezentas rimarkindajn momentojn se li trarigardas iomete la produktogamon de prestiĝa entrepreno, kiel la *Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj.*

Oni tuj rimarkas, ke tiaspeca fabriko ne povas kontentiĝi sole per la fabrikado de elektronikaj mezuriloj, t.e. instrumentoj kaj sistemoj por mezurado. La alta intelekta kaj teknika bazo de la fabriko destinas ĝin ankaŭ mem subteni la elektronikan industrion, preparante por ties laborejoj multajn instrumentojn porteknologiajn. Videble, temas pri teknika servado por sia propra branĉo — kio estas pensiga afero pri la atendebla kvalito de la tuta produkto en tiu ĉi fabriko.

Krom tiu grupo de l' elektronikaj instrumentoj ekzistas kompreneble vasta kampo de la plej diversaj elektronikaĵoj. El ili la fabriko elektis por si la organizan teknikon kaj produktas aparatojn por inĝenieraj kaj administraj direktadoj, ebligantaj la mekanizadon de tiuj ĉi laboroj. Speciala, sed ekonomie tre grava kampo estas ankaŭ kultivata en la fabriko, nome la elektronikaj aparatoj, regulantaj ilmaŝinojn.

Post tiu skiza grupigo ni revenu al la unue menciitaj produktaĵoj, do al la tradicie uzataj elektronikaj mezurinstrumentoj. Kiel konate, ili servas kiel bazo al ĉiaj modernaj teknikaj kaj esploraj mezuradoj, sekve ili apartenas al la baza produktogamo: sinus-generiloj, impulso- kaj funkcio-generiloj, osciloskopoj, mezuriloj de moduladoj, de distordoj, analiziloj multkanalaj.

El inter la menciitaj instrumentoj indas iom skribi pri la programebla funkcio-generilo de tipo 12567 *(foto 1.)* Per ĝi produkteblas en la frekvenco-intervalo inter 0,01 Hz kaj 10 MHz la funkcio-generaj bazsignaloj (sinusa, triangula, kvarangula, impulsa, segila). Estas konekteblaj ekigaj funkciadmanieroj (TRIG, GATE, BURST, PLLxN, PLL+N), krome modulaj funkciadmanieroj (AM, FM, LIN/LOG, SWEEP, VCO), kiuj prezentas tre grandan liberecon por krei ĉiujn necesajn signalformojn. En la funkciadmaniero INT X-TAL REF kristalprecize eblas ĝustigi frekvencojn. Kian ajn signalformon eblas krei, respektive ĝustigi, ĝin stori sur magnetbendo kaj ree vidigi; ankaŭ eblas la tutan signalon — aŭ ĝian laŭdezire elektitan eron — reaperigi. La enkonstruitaj interfacoj IEC 625 kaj RS 232C donas eblon por kompleta teleregado en ĉiu ajn funkciadmaniero de la aparato.

La mikroprocesila, inteligenta registrilo de tipo 79815 estas aplikebla kiel grafika periferio de komputiloj, programeblaj kalkuliloj kaj ĉiaspecaj elektronikaj mezursistemoj por registri (kun teksto) konstruitajn kaj kalkulitajn figurojn, datumojn aŭ funkciojn. La aparato vidigas sur paperformato A/3, kies desegnatan surfacon eblas ĝustigi, la karaktrojn kaj grafikaĵojn programadi. Por du-kolora desegnado la aparato mem ŝanĝas plumojn. Altnivelaj instrukcioj helpas la manipuladon por ĝustigi la parametrojn por la desegnado. La aparato havas eniran bufro-storon de 2 Kbajta kapacito; la distingivo estas 0, 1 mm, la morta zono +/- 0,2 mm. La interfacoj (IEC 625, RS 232C kaj Parallel) kontribuas al konektado de sistemoj.



La multkanala analizilo de tipo 38000 estas destinata precipe por la nuklea fiziko, inter aliaj por registri kaj prilabori gama-spektrojn. *(Foto 2.)* Sekve ĝi konvenas ankaŭ por ĉiuj mezuradoj, kiam necesas ege rapide registri kaj prilabori aron da datumoj; ekzemple tio okazas en la neŭtron-spektroskopio, rentgen-spektroskopio, same la biofiziko, krome certaj mezurteknikoj de la maŝinfabrikado bezonas tian rapidege laborantan analizilon. La aparato havas datumstoron kun 8192 kanaloj; ĝi prezentas kvarkanalan impuls-amplitudan analizadon, respektive ok-kanalan plurspecan funkciad-manieron. Ĝia datumprilabora procesilo havas storojn ROM kaj RAM (de 64 Kbajtoj), kiuj estas programeblaj helpe de BASIC-lingvo, kompletigita per por-analizilaj instrukcioj.

La fabriko provizas — kiel supre menciite — la elektronikan industrion per teknologi-celaj mezurinstrumentoj. Gravas inter ili la duonkonduktilojn ekzamenantaj instrumentoj, la vidigiloj de duonkonduktilaj karakteristikoj, la signal-analiziloj kaj specifaj mezursistemoj.

La lineara IC-ekzamenilo de tipo 19680 *(foto 3.)* kapablas multflanke aŭtomate kaj tre rapide mezuri, krome klasifiki kaj selekti. Helpe de la abundaj linearaj IC-iloj la aparato estas taŭga por la plej multaj praktike bezonataj ekzamenadoj. La testprogramojn eblas facile enigi per klavaro interaktive; tamen mem la aparato enhavas ankaŭ multajn testprogramojn, preparitajn de la fabriko. La mezuritaj datumoj bone legeblas sur granda vidigilo; ĉiuj ĉi estas dokumenteblaj ankaŭ per eksteraj aparatoj, helpe de internaj interfac-cirkvitoj. Por seria ekzamenado eblas alkontakti dozigilon. La ekzamenitajn integritajn cirkvitojn la aparato klasifikas laŭ kvin klasoj, surbaze de la programitaj ecoj.

Integritaj cirkvitoj LSI kaj VLSI estas diĝite ekzamenataj per la altkvalita aparato de tipo 19700 *(foto 4.)*. Ĝi kapablas ekzameni maksimume 64 piedajn diĝit-cirkvitojn LSI „malplejbon-kaze", kontrolante la DC-parametrojn kaj funkciadojn per testrapido de 5 MHz kaj en 500 ps tempoeroj. La programkreado estas simpla afero, faciligita de mezurcela programlingvo ATLSI ene de disk-operacia sistemo (DOS); tiu altkvalita sistemo igas pli taŭga ankaŭ la uzadon de memkontrol-testoj, respektive de aŭtentikigaj testoj. Ekzamenante LSI-memoriojn, mikroprogramita procezilo produktas — internacie uzatajn — signalformojn. Per ili eblas mezuri RAM 256 Kx8 bitojn, ROM, PROG, EPROM, EAROM 64 Kx8 bitojn.

Speciala procezilo elaste kontrolas laŭkatalogajn LSI-cirkvitojn, mikroprocezilojn, periferiajn ĉipojn kaj ŝablonojn de la uzanto. Cetere, la instrumento per norma interfaco kaj programoj adapteblas al la sistemoj SAD, CAT kaj CADMAT. Eningitaj cirkvitoj estas ekzameneblaj pere de aŭtomata dozigilo, same segmente mezuri pere de segment-mezurilo; tiuj ekzamenoj estas konvene plenumeblaj ĉu en la fabrikoj de integritaj cirkvitoj, ankaŭ serie, ĉu ĉe la utiligantoj de tiuj cirkvitoj por kontroli la ricevitajn kaj uzotajn.

Estas fabrikataj diversaj vidigiloj de karakteristikoj, el inter kiuj estu menciata la diĝit-stora karakteristiko-vidigilo kaj -analizilo de tipo 1577. vekas intereson ĉe tiu instrumento la maniero, per kiu ĝi transformas diĝite la analogajn signalojn (tensio, kurento) por daŭra storado. La tiel storitaj datumoj estas diversmaniere grupigeblaj por specialaj vidigoj (ekzemple samtempe vidigante du aŭ plurajn karakteristikojn de diversaj iloj en aparta aŭ sama koordinato-sistemo, eventuale sinsekve vidigi samtempe 16 grafikaĵojn.

La aparato enhavas elektronikan generatoron por indiki tolerojn kaj senĝenigilon en la kurento. La baza mezurilo ebligas mezuri ĝis 1600 V kaj 16 A, per la alttensia suplemento eĉ ĝis 1000 A. Kompreneble la enir-elir-transiraj karakteristikoj de la duonkonduktiloj estas ankaŭ registreblaj.

La plej konvena ekzamenilo de mikro- kaj mini-procezciloj, kombinitaj kaj sekvencaj retoj, rel-sistemoj estas la mikroprocezila logika stato-analizilo de tipo 10690. Ĝi permesas al la ekzamenanto sekvi la funkciadon de la observata sistemo, do tiel rimarki kaj elimini eventualajn misaĵojn de la aĵoj kaj programoj. La aparato laŭdezire registras en memorion la parton de l' enira impulsaro, kaj vidigas ĝin ĉu mnemonike, ĉu tempdiagrame. Koncerne la plej vaste uzatajn mikroprocezilojn ekzistas fakultative utiligeblaj enir-unuoj (8080, 8085, Z80, 8086).

La presitaj cirkvit-kartoj bezonas multe da permana laboro ĉu por mezuri kaj kontroli, ĉu por ripari ilin. Estas tre utile se oni ŝparas la tempon kaj koston tiurilate per instrumentoj. Tiun ĉi celon servas bonege la mezuraŭtomato de tipo 19400 *(foto 5.)*, kiun regas komputilo kun encirkvita testilo. Eblas certagrade kontroli ankaŭ la funkciadojn de la muntitaj-presitaj cirkvit-kartoj. Per encirkvita ekzamenado eblas trovi blokitan kaj rompitan cirkvitojn, la mankantan, eraran aŭ fuŝitan erojn, ankaŭ kontroli la funkciadkapablojn de la integritaj cirkvitoj. Gravas, ke dum ekzamenado de iuj eroj, ili preskaŭ apartiĝas de aliaj eroj en la propra cirkvito: tio estas rezulto de gardo-cirkvitoj kaj impulso-mezurado.

Depende de la muntado eblas mezuri 1024 analogajn, aŭ 960 diĝitajn, aŭ 480 hibridajn plus 32 analogajn punktojn. la plej granda dimensio de la kartoj estas 330x432 mm. Najlo en pneŭmatika ĉuko plenumas la mezuradon sur la kartoj, kompreneble tute aŭtomate, eĉ por si mem produktante la testprogramojn. Memkontrolaj programoj servas por kontroli sian propran laboron. Grave malpliiĝas do pere de tiu instrumento la daŭro ĉe ĉia ajn manipulado koncerne la muntitajn-presitajn cirkvit-kartojn.

Laborojn de inĝenieroj subtenas pluraj produktaĵoj de la fabriko EMG. Por teknikaj sciencaj kalkuladoj, regi mezur-instrumentojn, datumojn prilabori bone servas la programebla grafika komputilo de tipo 777 D. Helpe de grafika kompletigilo ĝi kapablas la menciitajn taskojn grafike vidigi, ankaŭ du-dimensiajn funkciojn prezenti. Tiu ĉi multkapabla instrumento konsistas el mikroprogramita bitsegmenta ĉefprocezilo (AM 2901) kaj tri periferiaj proceziloj (INTEL 8085). La periferioj en la aparato: alfanumera-grafika vidigilo kun 31 cm diametro, kaj du mezur-interfacoj. La aparta tajpil-klavaro konktiĝas per kablo, same la alfanumera-grafika larĝpresilo. Ampleksigita BASIC servas kiel programlingvo, t.e. ĝia abundigo per instrukcioj en rilatoj de rikordmanipulado, mezurad-regado, grafikaĵoj, matric-manipulado, ĉenoj kaj per plivastigitaj stokoj de funkcioj. Helpe de tiu ĉi multescia instrumento iĝas pli facila kaj rapida la inĝeniera, teknika projektado!

Por regi ilmaŝinojn surbaze de programoj, eminente taŭgas — laŭ multaj spertoj de maŝnfabrikaj fakuloj — la mikroprocezilaj regadoj de tipo HUNOR. Depende de la tipo temas pri 2-5 aksaj, 0,01-0,001 mm-an precizecon plenumantaj regadoj ĉe kontinu-kurentaj, respektive asinkron-servomotoraj ilmaŝinoj. Ĉiujn karakterizas la permana programeblo, kiun oni facile faras per klavaro. Al la diversaj ilmaŝinoj (tornilo, frezilo, akrigilo, randofleksilo, nana prilaborilo ktp.) estis adaptitaj diversaj regadoj, krome la enigitaj fiks-cikloj laŭmaŝinaj, kaj la geometriaj kalkuloj por korekti movdirektojn de la iloj, multe faciligas la utiligon de la regado. Ĉiuj servoj de la regado akomodiĝas al la teknologiaj bezonoj de la regata ilmaŝino. Enkonstruita alfanumera indikilo, aplikebla vidigilo kaj programoj depreneblaj de sur trubendo, magnetbendo aŭ iu programpreparilo, ĉiuj bone kontribuas al la multrilata adapteblo de tiu regado. *(foto 6.)*

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Produktas:
FABRIKO DE
ELEKTRONIKAJ INSTRUMENTOJ „EMG"
H-1163 Budapeŝto XVI.
Cziráky u. 26.
Telefono: (1) 837-950
Telekso: 22-4535

1 Programebla funkcio-generilo (tipo 12567)
2 Multkanala analizilo (tipo 38000)
3 Lineara IC-ekzamenilo (tipo 19680)
4 Diĝita IC-ekzamenilo por LSI, VLSI (tipo 19700)
5 Enircirkvita testilo (tipo 19400)
6 HUNOR-regado de tornmaŝino (tipo PNC 621)





4

EMG


5


6

EMG

GAJA PAĜO

Mem-ekzalto

Psikiatro: Feliĉe, finfine mi sukcesis kuraci vin el via megalomanio!
Kuracito: Dankegon, doktoro! Vi meritas egan honorarion: kiom da milionoj kontentigos vin?

Tuj-elsalto

– Karulo, pro kio tiom firme vi persistas, ke nia geedziĝa ceremonio komenciĝu je la 13a horo?

– Komprenu karulinjo! Mi havas ja kinobileton je la horo 14a!

Malmegalomanio

La ĉarmega Mina vizitas kuraciston: Mi suferas, kara doktoro, pro ega streĉo korpa...
Post ekzameno, la kuracisto deklaras: Via plendo maltrafis la adreson. Vizitu magazenon, kaj aĉetu pli grandan puloveron!

Pela pelto

– Manjo mia! Kial vi kudris en mian pelton etikedon „KOTONO"?

– Strange, ĉu ne? Por trompi la tineojn – ruza truko, ĉu ne?

Severa fianĉino

...kaj nun, antaŭ la sinjoro matrikulisto, solene promesu: ke vi neniam enbuŝigos ekde nun cigaredon!

Pli-pli poste

– Kara kolego, ŝajnas, ke vi ekĉesigis la tabakfumadon, ĉu ne?

– Vere, tiel estas. Sed pro kio „ŝajnas"?

– Ĉar la kekson vi dispremis en la cindrujo.

Konsento

La komizo alpaŝas al sia ĉefo, kaj ekpetas:

– Sinjoro ĉefo, mi havas la deziron foriri al la enterigo de mia bopatrino.

– Perfekte mi komprenas vin amiko. Ankaŭ mi.

Alitage

– Infanoj – demandas instruistino de la klaso – diru al mi: kiu estas tiu besto, kiun timas eĉ la leono?

– La edzino de la leono – respondas senhezite nia knabo.

Inter infanoj...

estas ofta temo, kiu kion ricevis je la naskiĝtago.

– Mi ricevas ĉiam draŝadon de mia patro je mia naskiĝtago!

– Sed kial? – miras la aliuletoj.

– Ĉar pro mi li devis edziĝi...

Inter najbaroj

La najbarino havas la emon eduki la etan Karlon:

– Sciu karuleto, la infanojn alportas la cikonio.

– Eblas, eblas – diras Karleto – tion jam diris la antaŭa blonda najbarino al mi. Tamen ŝi ekprocesis kontraŭ mia paĉjo.

Ĉiam inter? Finu!

Do tio okazis inter... Ne, ne! Fianĉino AL fianĉo diris dum ferio:

– Rigardante la maron, karulo, tuj venas en mian kapon nia fianĉa stato...

– Sed kial, karulinjo?

– Ĉar ankaŭ ties fino ne estas videbla.

La sama fianĉino

finfine enremis en la havenon de la geedziĝo, kaj iutage demandas de la edzeto:

– Kion vi deziras ricevi karulo, je via naskiĝtago?

– De vi? Minuton da trankvilo.

Inter patrinoj

– Rigardu mian fileton, la karuleto havas mirindan talenton!

– Amikine mi gratulat! Kaj en kiu rilato?

– Ho, tion mi ankoraŭ ne scias.

La sama panjo

La klaso de la supra „talentulo" komune ekskursas per trajno. Reveturante la fervojo tre malfruas, la etulo alvenas nur nokte. Sur la tablo li legas skribaĵon de la bona panjo:

„Veku min tuj, fileto, ĉar mi ne povas ekdormi ĝis vi ne estas hejme."

Ervin *Fenyvesi*

Saluto al Thomas Mann

En la ĉeflinioj de nia enigmo ni citas la lastajn du versojn el samtitola poemo de Attila *József*, en traduko de Lajos Tárkony. (H.1., V.15.- ensendendaj linioj.)
Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.
Limdato: du monatoj post la apero.

HORIZONTALE: 15. Bulgaria havenurbo, 16. Sin movas, 17. Plej granda insulo de Indonezio, 18. Fantazii (R), 19. Halogeno (R), 20. Grandaj petoj, 21. Tiun, kiu ĉirkaŭas nin, 22. Hebrea festo, 23. Reen: prepozicio, 24. Sufikso por esprimi konkretan lokon, 25. Dividaĵo de socio (R), 26. Soldato de princo Rákóczi, 27. Aŭdebla aervibrado (R), 28. Kontroli taŭgecon (R), 29. Ekspluatejo, 30. Fermi pordon (R), 31. Restaĵ' el konstruaĵo', 32. Invito, 33. Epopeo estas ...poemo, 34. „La homoj", 35. Frukteca, 37. Poemo de Zamenhof, 38. Prepozicio, 39. Granda rusa filozofo kaj revoluciulo, 40. Spireblan gason, 41. Doko! 42. Fajril', 44. Ruin-urb' el antikva Italujo, 45. Demandvorto, 46. Mal-zenito (R), 47. Franca generalo, pioniro de Esperanto, 49. Brilblanka globet', 50. Evento, (R), 51. Cetaco, 52. Libera tempo, 53. Korboforma fiŝkaptilo (R), 54. Loĝanto de aŭtonoma respubliko en Sovetio, 55. Ĉiutaga manĝaĵo, 56. Interjekcio, 57. Sufikso montranta kapablon, 58. Kemie pura fero, 59. Aerolito, 62. Rivero inter Usono kaj Kanado, 63. Danca kunveno, 64. Amasveturil', 65. Kartludo, 66. Metala element', 67. Ago tiri post si ion.

VERTIKALE: 2. Estintaj, 3. Froti per ungoj (R), 4. Spacon inter du intersekcantaj linioj, 5. Radiumo, 6. Perbuŝe sciigos, 7. Valormetalon, 8. Mema, identa (R), 9. Victor Sadler, 10. Antikva nomo por Hispanujo, 11. Detala noto, 12. Grasa parto de la lakto, 13. Korneca fingrofinaĵo, 14. Plinovigantoj de la lingvo, 19. Kuraĝa, meritplena (R), 20. Tre pura, 22. Reagi al kulpo, 25. Eligi akran voĉon, 26. Kontraŭ malaria drog', 27. Reĝan moŝton, 28. La reago laŭ V.22., 29. Esti inda je io (R), 30. Imagaĵoj, sonĝaj bildoj, 32. Latina diin' de amo, 33. Negranda har', 35. Vira vestaĵ', 36. Bestĝardeno, 37. Terura haŭta malsano, 39. Infanoj faras, 40. „...diablon ne forpelas", 41. Perbuŝe sciigi, 43. La frandaĵ' el frajo de fiŝoj, 44. Tiu kiun oni trudas kuri, 45. Unu el la kvar koloroj de ludkartoj, 47. Verkon mokantan malvirtojn, 48. Speco de fruktoj, 49. Eniĝu internen, 51. Provizore doma, 52. Fatalo, 54. Peco de tegmentkovraĵo (R), 55. Irigi antaŭ si, 56. Alĝeria havenurbo, 58. Kolorigil', 59. Kontraŭa, 60. Organ' de aŭdkapablo, 61. Mezurunuoj de elektra rezistanco, 63. Bario kaj hid ogeno, 66. Kopar', 67. Identaj konsonantoj.

I.Z.

Solvoj de la krucenigmo en la n-ro 1987/1:

Literatura Mondo, Ora Duop(o), Tutmonda Sonoro, Lingvo, stilo, formo, Parnasa Gvidlibro, Strečita Kordo.

Premion gajnis per lotumado: Jerzy BANACKI, Tomaszów Maz., PL; Dieter BERNDT, Berlin, GDR; MEDVECZKI Gábor, Debrecen, H.



EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Serĉu mian sonĝon
de István Nemere

Tiu romano de la bone konata verkisto traktas gravajn fenomenojn de la nuntempo: la krudan subpremon de unu popolo fare de alia, kaj la tragikan reagon: la agadon de teroristoj. Dume atingas Venecion la nuptovojaĝantaj geamantoj...

1. En la romano plurfoje estas menciita alia libro, tiu de Franz Werfel. Kio estas ĝia titolo?
2. Kiel nomiĝas la atencinto?
3. De kie venas la titolo de la romano?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

La verko de la sekva ekzameno: 1987/6: „Dum nokta deĵoro" de Nevena Nedelĉeva.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1987/1:

1. Grauer testamentis 230 milionojn da dolaroj.
2. La urbo estas Strutmagen.
3. La filo de la testamentinto estas Cezaro Grauer.

Premion gajnis per lotumado: Sergej *Derevjannik*, Ufa, SU; Jana *Vavrichová*, Turnov, CS.

Korespondi deziras

Arturas *Reverstas* (26) maristo, fraŭlo, int. pri historio, turismo, muziko. *Jonava*, Pāuko 1-23, Litovio SU-235000. – Aleksandra R. *Paluszek* (18) lernantino, int. pri turismo, fotoarto, poezio, kol. bk. *Elblag* str. Krakusa 8/1, PL-82-300. – *Járóka* László kaj edzino okupiĝas hobie pri komputiloj kaj komputado, pri tiuj interŝanĝi konojn kaj opiniojn. *Budapest*, Szív u. 3. f.5. H-1063. – Urszula *Mokrzycka* (30) instruistino, pri literaturo, folkloro, turismo, kol. bk, prospektoj, etikedoj. *Biedrzyclowice 165*. PL-48-356. – Uwe *Hübner* (42) oficisto ktm. pĉt. *Stralsund*, Frankendamm 16. DDR-2300. – F-ino Rima *Medikaité* (17) ktm, pĉt. *Kapsukas* Pušinio 10-34. Litovio SU-234.520. – Rolandas *Pipyne* (19) studento, int. sporto. *Puodziunškiu KM*, Litovio, SU-235.323. – Dalia *Gudzevičiute* (25) ekonomikistino, pĉt. *Vilnius*, Taikos 25-20. Litovio SU-232.000. – Janne *Johansson* (22) sveda junulo pĉt. *Hägerstein*, Nitwägen 25, S-126 38. – Inĝ. Boris *Patrušev* (60) ktm, pri elektroreflekso-terapio, ankaŭ G, F. *Perm-39*, ab.k. 1600. – Aleksandr V. *Ivanov* (21) pri junularo, vivo, vojaĝoj, E-movado, politiko, ankaŭ A, F. *Gorkij*, Centralpošto, poste-rest. SU-603000. – Gregor *Wienc* (29) laboristo, pri turismo, jun. muziko, fotoarto, filmo, dancoj. *Owinska*, Dworcowa 5/9, PL-62-005. – Michal *Debski* (25) fraŭlo ktm, pri geografio, etnografio, kulturo k.s. *Warszawa*, ul. Teligi 2/43. PL-02-777. – Jurate *Šernaite* (22) int. medicino, kol. insignoj. *Vilnius* Suderves 30-89. Litovio SU-232.050. – F-ino Liana *Zdanevičiute* (29) int. muziko, psikologio. *Klaipeda* Mazvydo Aleja 9-13, SU-235.800. – E-Klubo en *Kirov* pri div.temoj, kol. bk, pm, E-aĵoj. Maklina 44-6, SU-610.035. –

Leterkesto

Otmar HEINEMANN, Holzhausen, GDR: Ni komprenis vian malpaciencon por aĉeti la volumon „Baza legolibro por komencantoj", ja ĝin ripete mendas diverslandaj librovendejoj, pro la postuloj de novaj kaj jam ne-novaj E-istoj. Eblas, ke en la Hungara Kulturcentro en Berlino printempe elĉerpiĝis la stoko de tiu libro, sed laŭ niaj informoj la Libroservo de HEA jam liveris al ĝi grandan kvanton. Verŝajne, depost tiam ankaŭ vi ĝuas jam tiun utile redaktitan legolibron.

S-ino Siga BÉRCE, Césis, Latvio, SU: Traduki kaj publikigi en nacilingvaj gazetoj el H.V. šajnas ĉiam bonvene por nia afero, t.e. se tio levas la prestiĝon de Eo, kaj konigas ion hungaran. Pro tio ankaŭ István Nemere *konsentas, se vi publikigos latvalingve lian novelon „Mato" (H.V. 1987|2.) en vialanda literatura aŭ teknika revuo. Ni rekomendas krome, ke la traduko estu reviziita de sperta esperantisto, ĉar tion mem la koncerna redaktoro eble ne povos plenumi. Kompreneble, decas sendi al la aŭtoro (al nia redakcio) ekzempleron de tiu revuo.*

Raoul CAHOUET, Vierzon, F: Nia leganto plendas, ke eksterlandaj korespondantoj skribas sian adreson permane ofte ne legeble, kun strangaj literoj. Kaj li rajte pensas, ke pro tio liaj erare adresitaj leteroj maltrafas la celon, sekve la korespondado ĉesas jam komence. Pri neglekteme skribitaj kursivliteraj nomoj kaj adresoj ankaŭ ni havas ofte malagrablajn spertojn (fojc eĉ cirilaj literoj aperas en ies adresoj). Multaj letersendantoj šajne ne konscias, ke en aliaj landoj oni *ne nepre uzas la samajn* manskribitajn literojn, tiurilate ne ekzistas internacia normo! (Ni petu tuj pardonon de la supre nimita s-ino, se šian nomon ni devus legi eble Liga aŭ Jiga?) Ekzistas internacie kvazaŭ severa „leĝo" prezenti nomon kaj adreson per klaraj PRESLITEROJ, sen „personaj" aldonoj aŭ forlasoj de strekoj. Skribante oni devas pensi pri la legonto, kiu ne ĉiam konas niajn naciajn skribokutimojn! Dankon pro la bonvenaj rimarkoj.

Valdo BANAITIS, Nova Vilnia, Litovio, SU: La fratinoj Polgár *akiris en la internacia šakmondo daŭre novajn sukcesojn.* Susana – *momente la 3a en la monda listo – post altgrada vira turniro en* Biel *(Svisio) ludis kontraŭ* Timman *(NL) grandmajstro en la Kolonja televido. La triopon en Svisio ĉirkaŭis dekoj da raportistoj, skribintaj kaj disaŭdigintaj multe pri ilia talento. La plej juna,* Judit *(11-jara) samtempe plenumis la normon de virina grandmajstro, partoprenante en teamo kontraŭ la svisa vira nacia teamo. Dum la svisa turniro ankaŭ* Sofia *(12) superis la normon de virina grandmajstro. – Koncerne la publikigon de l' artikolo primedicina de Pál* Avar, *same validas nia supre trovebla respondo. Artikoloj en revuoj ĝenerale ne elstaras pro ia inventaĵo, tiuj ricevas lokon prefere en faktgazetoj. Sekve la redaktoro decidos pri la publikigo laŭ siaj konoj pri la interesiĝo de sia legantaro, kaj ne laŭ la noveco de la medicinaj rimedoj, ĉar multaj bezonas ripetadon denove. Akceptu saluton!*

Lingva domeno!

Nova lingva ludilo por

*– **komencantoj,** kiuj povas per ĝi ekzerciĝi en la lingvo,*
*– por **spertaj esperantistoj,** kiuj elprovu per ĝi sian lingvan inventemon!*
Ludo, en kiu oni povas NUR GAJNI, riĉigante sian lingvoscion!

Oni mendu ĝin kontraŭ 15,- gld. (aŭ 98,-Ft) ĉe la Libroservo de HEA aŭ de UEA!



HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Pošto. Aboneblas en ĉiuj poštoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Pošto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poštmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

HUNGAROCHEMP
HUNGARA TRUSTO DE KANABINDUSTRIO
Szeged, Alsókikötő sor 11.
H-6701 Pf. 40
Telefono: 36-62-54 788
Telekso: 82-254, 82-255.

NIAJ PRODUKTOJ:

PEZAJ VELTOLOJ bone uzeblaj kiel veturilaj kovriloj, ankaŭ kiel kovraĵoj por la agrikulturo kaj deponejoj, same en la fabrikado de sportartikloj.

MALPEZAJ VELTOLOJ por tendoj, dorssakoj, saketoj, sunombreloj.

SINTEZAJ VELTOLOJ ŝmiritaj per polivinilklorido: akvoimunaj, rezistaj kontraŭ putrado, kemiaĵoj kaj frosto, laŭdezire eĉ malflamemaj. Tiuj estas tre kovenaj por veturilkovriloj, aerblovataj kaj streĉstrukturitaj tendegoj, siloj.

KOTONAJ ŜTOFOJ POR VESTAĴOJ: por ĝinz-vestaĵoj el indigobluaj varpofadenoj, laŭ diversaj fadendensecoj, garantiite en mezurtena kvalito.

STEBITAJ FELTOJ el kanabofibroj, kaj polipropilenaj hakitaj fibroj, laŭ diversaj fadendensecoj: por ŝuo- kaj meblofabrikado, remburado; por son- kaj termoizolado kiel subpargetaĵo; por subsurfacaj kaj bordoprotektaj konstruadoj, ankaŭ por melioraciaj filtroj.

TEKNIKAJ TEKSAĴOJ por industriaj celoj en multaj larĝecoj kaj densecoj el preskaŭ ĉiuj teksmaterialoj. El la multaj specoj de la produktoj ni proponas al la kaŭĉukindustrio intertolaĵon en ŝtofbendon, al fabrikoj de sukero, medikamentoj, kemiaĵoj, plastoj, nutraĵoj, vegetala oleo, kaj al la minerala kaj naftoindustrioj niajn filtrotolaĵojn.

KANABOFADENOJ inter larĝaj dikointervaloj, laŭ deziratai formoj kaj dimensioj, precipe por industria prilaborado.

KANABOSNUROJ estas nemalhaveblaj por plaĉa pakado. Per ili la nodoj ligeblas rapide kaj sekure. Mendeblaj en formo de krucbobeno kaj bulo, laŭ deziratai pezoj kaj dimensioj.

PÉPÉTEX FADENOJ KAJ ŜNUROJ: pakummaterialoj el polipropileno, kun granda tirrezisto kaj ŝarĝeblo; rezistaj kontraŭ akvo, putrado kaj vetero; pli malpezaj ol tiuj el ajna alia teksmaterialo. En multaj koloroj ni fabrikas ilin.

SAKOJ EL RAFIO: malpezaj – nur kelkdekgramaj – sakoj por agrikulturaj produktoj (terpomo, brasiko, cepo, kukumo, fruktoj).

MEBLOTABULOJ el kanabopistaĵoj kaj lignofrakasaĵoj, kaj kunmetitaj el tavoloj de diversgrandaj grajnoj; ankaŭ kun fajne glatigita surfaco, eĉ polurite. Dikecoj inter 14 kaj 40 mm.

Ferio+Hungario=

HungarHotels



Demandu iun ajn, kiu jam vizitis Hungarion: kie oni povas bone tranokti, bone manĝi kaj agrable pasigi la tempon? La evidenta respondo ĉiam estos: HungarHotels, la plej vasta hotela kaj restoracia kompanio. Ekde la etaj familiaj hoteloj ĝis la plej bonaj luksaj hoteloj tiu ĉi kompanio funkciigas en la tuta lando 48 hotelajn unuojn.

Vi trovos en niaj restoracioj hungarajn specialaĵojn, monduman vivon en niaj noktaj kluboj, amikan atmosferon en niaj kafejoj.

Nia personaro – 10,000 spertaj specialistoj – fieras labori en nia kompanio je via servo.

Estu nia gasto, kaj ankaŭ via respondo estos: HungarHotels.

HungarHotels en Budapeŝto: Hotel Duna Inter Coninental*** Hotel Béke**** Hotel Flamenco**** Forum Hotel Budapest**** Hotel Astoria*** Hotel Budapest*** Grand Hotel Hungaria*** Hotel Erzsébet*** Hotel Expo*** Hotel Stadion*** Hotel Vörös Csillag**

Novaj en 1987: en München: Hotel Budapest**

1987 NOV 12